

1989 aprilo
82-a jaro
n-ro 1000 (4)

(aperas monate escepte de aŭgusto)

esperanto

ISSN 0014-0635

universala esperanto-asocio (en konsultaj rilatoj kun un kaj unesko)
sidejo: nieuwe binnenweg 176 • 3015 bj rotterdam • nederlando



Vi trovos,

espereble, pli legeblan numeron ol la marta: pluraj protestis pri ties fajnaj kaj densaj literoj, kiuj rezultis el transiro al nia nova mikrokomputila kompost-tekniko. Survoje al propono de nova revua formato (per kiu ni esperas bonvenigi la venontan jaron), viaj reagoj helpas stiri nin ĝustadirekte. Sed ne limigu vin je tiaj! Ne nur alitemajn, sed ankaŭ alispecajn reagojn ni ŝatas kaj volas kuraĝigi. Tial, ĉi-numere, kvin paĝojn okupas recenzoj pri originalaj verkoj: esperantologia, kulturkleriga, instrumentodika, romana, poezia. Tial ĉi-enas pliaj kvar paĝoj pri Esperantaj libroj ĝenerale. Tial vi povas legi ĉe la interna dorsa kovrilo pri la roman-konkurso de Hungara Esperanto-Asocio. Prenu monujon, prenu skribilon, ne gravas kiun: ambaŭ specoj de reago riĉigas nian kulturon kaj vin mem samtempe.

Enhavo

- 61 Estrara kunsido (18-20 marto 1989): UEA leteros al UN pri problemoj en Rumanio (Mark Fettes)
- 62 Post 100 jaroj telekopie: La unua Esperanto-gazeto (Roland Schnell)
- 63 Landa agado: Vjetnamio malfermas la pordon (Dang Dinh Dam); Pacifika jarcento – jarcento de Esperanto? (Prof. Van Trong); Plufluas la “varma tajdo” (Wu Guojiang); Studenta asocio naskiĝis en manĝejo (Bi Rong)
- 65 Trarigardo de la Esperanta gazetaro: Kiel lumgardantoj kemas (kompilis mf)
- 67 Por unueca kultura bazo (Vilmos Benczik)
- 68 Baza legolisto de la originala Esperanta literaturo (W. Auld)
- 69 Libroservo: Pli klerige ol distre (N. Salvesen)
- 70 Kulturo: William Auld, la realisto (Mauro Nervi)
- 72 Reago: Ne fanfaroni – ne bagateligi! (Aldo de’ Giorgi)
- 73 Poezio: Lingvoj (Baldur Ragnarsson)
- 74 Recenzoj: *Studoj pri la internacia lingvo* de Michel Duc Goninaz (Edmund Brent); *Beletro, sed ne el katedro* de Gaston Waringhien (D. B. Gregor); *Karuseloj...* de Sara Larbar (Rejna de Jong); *En novan mondon* de Vilma S. Eichholz (Zsuzsa Barcsay)
- 76 Laste aperis . . . (novaj eldonaĵoj en aŭ pri Esperanto)
- 78 Loke – Fake – Persone (mallongaj novaĵoj)
- 80 Oficiala informilo

La kovrilo

. . . aŭ “Vi ne trovos”, kiel ni emas provizore retitoli ĉi tiun rubrikon, montras kvardekonon de la tuta vivhistorio de ĉi tiu periodaĵo. Honore al la mila numero, ni planis kunprezenton de la vivantaj eksredaktoroj, ses entute – sed ve! unu spertas premsonĝojn je ekpenso pri tiu periodo de sia vivo, unu dronas sub taskinundo, unu flegas memorojn tiel amarajn, ke li eĉ ne respondis la peton . . . Vi ne trovos, do, artikolon pri ĉi tiu revuo, sed jes ja pri aliaj, dudekkvino eĉ. Nu, fakte ne ĝuste pri, sed . . . Nu, kial ne turni vin al paĝo 65 kaj eltrovi mem?

esperanto

Oficiala organo de
Universala Esperanto-Asocio

Aperas monate (escepte de aŭgusto).

Fondita en 1905 de M. P. Berthelot (1881-1910); establita kiel organo de UEA en 1908 de Hector Hodler (1887-1920). Legata en 105 landoj. Voĉlegata por blinduloj.

Redaktoro: Mark Fettes.

Abonprezo: varias laŭlande (gld. 44,50; US\$ 21; GM 39; enoj 3600; ktp); petu informojn ĉe via landa asocio aŭ de la ĉi-suba adreso. Unuopa ekzemplero kostas 4,00 guldenojn.

Anonctarifo (gld.): 1 p. 1 400, 1/2 p. 740, 1/4 p. 400, 1/8 p. 240, 1/16 p. 150. Movada rabato 50%. Eksterakovrilaj anoncoj kostas duoble. Rabato por tuja ripeto 20%.

Adreso de la CO de UEA: Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando.

Telefono: + 3110 436 10 44 kaj 436 15 39.

Telefakso: + 3110 436 1751.

Telekso: 23721 uea nl.

Telegramoj: ESPERANTO ROTTERDAM.

Banko: Bank Mees & Hope, Postbus 749, NL-3000 AS Rotterdam (konto n-ro 25.52.89.804). Nederlanda poŝta ĝirkonto: 37 89 64 (UEA).

Ĝenerala Direktoro: Simo Milojević.

Direktoro de la CO: Neil Salvesen.

Estraro de UEA

Prezidanto (planado, esploro kaj dokumentado): d-ro Humphrey Tonkin, Office of the President, University of Hartford, West Hartford, CT 06117-0395; tel. (203) 243-4417; telefakso: (203) 243-4070; telekso 9102505313.

Vicprezidanto (financa evoluigo): s-ro Grégoire Maertens, Prins Leopoldstr. 51, B-8310 Brugge, Belgio; tel. (50) 35 49 35.

Vicprezidanto (kulturo): s-ro Yosimi Umeda, 2-15-10 Aobadai, Meguro-ku, Tōkyō, 153, Japanio; tel. (3) 770 64 86; telefakso + 81 3 461 7807; telekso J29400 tokinbth.

Ĝenerala Sekretario (kunordigo de la funkciado de la asociaj organoj): d-rino Flóra Szabó-Felső, Zója u 5/b VII.22, H-7624 Pécs, Hungario; tel. (72) 23 274.

Estrarano (landa, regiona, kaj faka agado): s-ro Jean-Louis Texier, 27 chemin des Carreaux, Cerny, F-91590 La Ferté Alais, Francio; tel. (1) 64 57 66 53.

Estrarano (scienca kaj teknika aplikado de Esperanto): prof. d-ro Ottó Haszpra, Rosenberg hp. 5, H-1054 Budapest, Hungario; tel. (36/1) 317 243; telefakso (36/1) 666 808; telekso 225931 muegy h.

Estrarano (eksteraj rilatoj): d-rino Barbara Despigny, 21 rue des Cuverons, F-92220 Bagneux, Francio; tel. (1) 46 65 22 16.

Estrarano (kongresoj): s-ro Diccon Masterman, “Quasi in Cima”, Via di Cecina 610, I-55029 S. Stefano di Moriano (LU), Italio; tel. (583) 570 66.

Observanto (Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj [ILEI]): s-ro Edward Symoens, Putsesteenweg 131 A, B-2180 Kalmthout (Heide), Belgio; tel. (03) 666 62 66.

Observanto (Tutmonda Esperantista Junulara Organizo [TEJO]): s-ro Jan Koszmaluk, 8 Villa Stendhal, F-75020 Paris, Francio; tel. (1) 43 66 63 47.

UEA leteros al UN pri problemoj en Rumanio

Finfine la Estraro kaj Centra Oficejo venis iom pli aferece al la marta estrarkunsido, la ĉefa okazo por diskutoj kaj planoj dum la tuta jaro. La ĝenerala sekretario kaj la du direktoroj investis konsiderindan tempon en antaŭpreparoj – kun kiel sola malavantaĝo la monteco de la rezulta paperstako, sed kun tre konstata pliefikigo de la tagordo.

Aliflanke, ĉi tiu kunsido havis multajn komunajn trajtojn kun la du antaŭaj. Rerigardante ilin kune, oni konstatas ke ĉi tiu Estraro tralaboris laŭdeve la rutinan demandaron; preter tiu, ĝi lasis sin porti de la vetera kaj kurenta hazardo. Mi certe ne estas la sola, kiu rimarkis tion; eĉ de unu-du estraranoj venis similaj pritaksoj.

La raporto de la ĉi-jara marta kunsido konsistas do precipe el tiuj rutinaj aferoj, kiuj necesas al la vivteno de UEA sed neniel animas ĝin. Inter ili troviĝas tamen kelkaj interesaĵoj – do ni konsilas plulegon!

Komitato, elektoj: Voĉdoniloj por la komitatanoj B dissendiĝis fine de aprilo kun la Jarlibro 1989; al aliĝintaj landaj kaj fakaj asocioj iros memorigilo pri la nomumo de komitatanoj A. En Braĵtono oni elektos novajn komitatanojn C kaj novan prezidanton kaj estraron de UEA. La elektokomisiono (D. Blanke, E. Symoens, P. Todorov) ricevis ĝis nun du formalajn kandidatiĝojn por la posteno de prezidanto: Yosimi Umeda (Japanio) kaj John Wells (Britio). Ĝi plu serĉas taŭgajn nomojn por komitatanoj C kaj estraranoj (kaj eventuale pliajn prezidantajn kandidatiĝojn). En cirkulero la komisiono skizis proponon pri la strukturo de la nova Estraro, rekomendante maksimume sep anojn kaj ampleksan reton de “fakgvidantoj”, kiujn la Estraro nomus kaj kunordigus. Pri reagoj al tiu cirkulero ni ankoraŭ ne havas informojn.

La Centra Oficejo havas stabilan laborantaron; daŭras teknika modernigo, precipe koncerne la komputilojn kaj rilatajn aparatojn.

Ĉefdelegitoj kaj perantoj: Novaj estas Gwenda Sutton (Novzelando), Milan Neubeler (Slovakio), Aleksandr Melnikov (Sovetunio), kaj en Aŭstralio Alan Towsey (ĉefdelegito) kaj Tom Elliott (peranto).

Membrokampanjo: Laŭ propono de la Centra Oficejo, la Estraro aprobis novan varbkampanjon kiu komenciĝos en la aŭtuno. Aperos i.a. novaj membrovarbiloj por UEA kaj TEJO.

Novjorka Oficejo: La ĉefa aktivulo en Novjorko, Julius Manson, suferis koratakon meze de parolado en kunveno de neregistaraj organizaĵoj, kie li reprezentis UEA. Li estis operaciita kaj nun kontentige resaniĝas. La transloĝiĝo al Hartford de la gvidanto de la novjorka laboro, Humphrey Tonkin, signifis ŝanĝon kaj plibonigon de la sekretaria fako.

Azia Kapitalo/Centro: Daŭras intertraktoj kun esperantistoj en Ŝanhajo pri vastigo de la tiea instrucentro al studentoj el aliaj landoj. Oni esperas povi en Braĵtono fari anoncon pri la aranĝo. Intertempe UEA translokis la tutan Azian Kapitalon – duonmilionon da guldenoj – al Roterdamo, kie ĝi gajnos pli altan renton kaj eniros la normalan administran sistemon de la Asocio.

Bjalistoka Centro: Tonkin venis al la estrarkunsido rekte el simpozio en Bjalistoko pri la celoj de la Centro. Okazis pozitivaj evoluoj: ekzemple, la rektoro de la loka universitato faris seriozan kaj konkretan proponon pri kunlaboro, kaj la urbo disponigos jam venontjare malnovan konstruaĵon por la provizora funkciado de la Centro. Aliflanke, la ĝenerala

necerteco de la ekonomia-socia situacio en Pollando malinstigas la polajn instancojn riski ion ajn, inkluzive investon en la projekto. Tonkin ellaboris leteron al la estraro de Fondumo Zamenhof, kiu emfazas la kunlaborem de UEA kaj la movado ĝenerale, sed precizigas la limojn de tiu kunlaboro, i.a. ke ĝi garantias nek monon nek publikon, sed ja varbadon, internaciajn kontaktojn, ekipadon kaj funkciigon. Tonkin ankaŭ plu aktivigas pri la organizo de monkolekta kampanjo en Usono (inter neesperantistoj).

Financoj: Okazis la necesa pritakto de la spezokonto kaj bilanco 1988. Ĉar tiuj aperos en la Estrara Raporto en junio, ni mencias ĉi tie nur ke UEA finis la jaron kun provizora deficito de 26 500 gld. La Estraro ankaŭ rigardis la proponitan buĝeton 1990, kiu prognozis deficiton de 118 000 guldenoj, kaj resendis ĝin al la Oficejo por retrakto cele al (minimуме) duonigo de la negativa saldo. Ĉe la kapitalo estis tamen pli pozitiva novaĵo. S-ino Truus Mantingh, Nederlando, heredigis al la Asocio domon kaj akciaron, kiuj kune valoras ĉ. duonmilionon da guldenoj. Laŭ la normala proceduro, tiu sumo ne estos elspezita; parto de ĝi tamen estos je dispono de la nova Estraro, elektota en Braĵtono, por la eventuala starigo de novaj fondaĵoj.

Unu ebla kandidato por tia subteno estos nova Volontula Fondaĵo. Donacoj al ĝi, de minimume 1000 guldenoj, konsistigos kapitalon netuŝeblan, kies rento subvencios la spertiĝon de junaj movadanoj per laboro en la Centra Oficejo, aŭ eventuale aliloke. (Tio povus esti aparte valora por la plej rapide kreskantaj landaj movadoj.) Starigita estas ankaŭ nova Belarta Fondaĵo, el kiu oni financos ĉiujare la premiojn en la Belartaj Konkursoj. La nova regularo por Fondaĵo Grabowski estas fintraktita kaj ĝia juĝkomisiono estas nomata, tiel ke ĝi povos denove aljuĝi kulturajn premiojn ekde 1990. Artikolo pri tiu temo aperos en la revuo. Kvankam ne tiel progresinta kiel Fondaĵo Grabowski, Instituto Hodler sukcesis repagi signifan parton de sia ŝuldo al UEA, kiu nun sumas malpli ol 90 000 gld.

La Estraro decidis malfermi specialan konton ĉe la Centra Oficejo por akcepti donacojn cele al la starigo de tomboŝtono honore al Ivo Lapenna (1909-1987), multjara prezidanto de UEA. La enhavo de tiu konto iros al la kopenhagaj organizantoj de la tomboŝtono. (Vd. anoncon en la venonta numero.)

Kongresoj: La Estraro aŭdis raportojn pri la preparoj por Braĵtono de LKK-prezidanto John Wells kaj kongresa sekretario Nikola Rasic. Kiel kutime, Kongresaj Komunikoj tenos niajn legantojn ĝisdataj pri la plej interesaj aspektoj. Loka Kongresa Komitato estas nomita por Havano (1990); la kongresa temo estos “Esperanto, evoluo, kultura diverseco”. La kongreskotizoj estos iom pli altaj ol kutime pro diversaj konsideroj, sed UEA proponos specialan aliĝperiodon ĝis la 15-a de aŭgusto 1989, dum kiu validos aparte granda rabato. Aliĝiloj tial dissendiĝos jam kun la Jarlibro 1989. Por la tri postaj jaroj, la kongresa fako jam traktas kun invitantaj instancoj, sed neniu estas sufiĉe definitiva por anonci nun.

TEJO iom pli fruas pri siaj planoj: post venontjara IJK en Kubo, ĝi jam definitive iros al Svedio en 1991 (Karlskoga). Kaj por la jaro 1994 (jes, naŭdek kvar) ĝi havas ambician celon: kongresi en Korea Respubliko.

Eldonaĵoj: La aĉeto de la tuta stoko de Stafeto-libroj kaj ilia bindigo montriĝis sufiĉe granda investo. Kelkaj, kies presfolioj ekzistas nur en centoj da ekzempleroj, ne reaperos pro la proporcio tro alta kosto; bindigo de la aliaj progresas kontentige, kaj oni anoncos pri ĉiuj haveblaj verkoj poste en ĉi tiu jaro.

Informado, esploro kaj dokumentado: La Estraro akceptis proponon de la Oficejo pri restarigo de Informa Fako, kies unua gvidanto estas Mark Fettes. La Informa Fako okupos sin pri informado al internaciaj novaĵagentejoj, pere de ties reprezentantoj en Nederlando, kaj pri interna informado en la movado. Interalie ĝi transprenos teknikan kunordigon de la serio Esperanto-dokumentoj, kunlabore kun eksteroficeja ĉefredaktoro. Masterman, la nuna redaktoro, aktive serĉas posteulon.

La Internacia (Vojaĝanta) Ekspozicio estos baldaŭ mendebla en la formo de lumbilda kompleto aŭ pli multekostaj afiŝoj; oni anoncos pri ĝi en la revuo. Lu Wunsch-Rolshoven prezentis projekton de telekopia prifesto de la centjara datreveno de la unua E-gazeto, kiun la Estraro konsentis aŭspicii. (Detaloj malsupre sur ĉi tiu paĝo.)

Tonkin daŭre okupiĝas pri eltrovo de nova eldonejo por *Lingvaj problemoj kaj lingvo-planado*; venis pluraj esplorindaj ofertoj. La Estraro aprobis Probal Daŝgupto kiel la novan ĉefredaktoron, kun Klaus Schubert kaj Humphrey Tonkin kiel respektive eŭropa kaj nordamerika helpredaktoroj (ankoraŭ konfirmenda ĉe la estraro de CED).

Landa, faka, ekstera agado: Okazas gravaj evoluoj sur ĉi tiuj terenoj, eĉ se malmulto iniciatita de la UEA-centro. Plej esperige, la daŭran maturiĝon de la movado en Azio kaj Afriko spegulas aliĝpetoj de la landaj asocioj en Pakistano kaj Eburabordo, kiujn la Estraro aprobis kaj pludonis al la Komitato kun rekomendo pri akcepto. Al kontaktoj kun la ekfloranta sovetia movado kontribuos vizito de la ĝenerala direktoro de UEA, Simo Milojevic, kiu ĉeestos kiel observanto la konsultiĝon de la E-asocioj en la socialismaj landoj (Moskvo, 17-23 aprilo). Malpli pozitive, kelkaj malnovaj landaj asocioj spertas financajn problemojn pro ekonomia krizo en sia lando. UEA klopodas mildigi la sekvojn en unu-du kazoj per portempa subvencio.

Malplej pozitiva estas la situacio en Rumanio, kie organizita Esperanto-agado fariĝis pli-malpli nebla. Post kelkfoja aliro al la aŭtoritatoj sen ajna kontentiga respondo, la Estraro komisiis Tonkin levi la problemon ĉe la Komisiono pri Homaj Rajtoj de

Unuiĝintaj Nacioj. La tekston de tiu publika letero, sendota kopie al la rumana UN-delegacio, ni esperas publikigi en venonta numero.

Menciinda estas la daŭranta plivigliĝo de la kunlaboro kun ILEI, kiun Audrey Childs-Mee reprezentis ĉe la kunsido. Ateista Tutmonda Esperanto-Organizo proponis kunlaboron kiel neneŭtrala faka asocio, kion oni pludonos kun jesa rekomendo al la Komitato. Sur aliaj terenoj, malmulto estos entreprenita de la Estraro antaŭ la diversaj kunsidoj planitaj por Brajtono.

Junularo: La prezidanto de TEJO Jan Koszmaluk ĉeestis la tutan kunsidon kaj intervenis plurfoje por provi varbi subtenon por TEJO. Laŭ lia raporto, la junulara sekcio de UEA sukcesis relevi sin el la polvo, kvankam ankoraŭ nur tri el la kvin estraranoj funkcias; la financoj estas reordigitaj, eksteraj rilatoj restariĝis, kongresoj estas ĝustatempe deciditaj. Ĉi tiu tagorda ero tamen okazigis la plej akrajn interŝanĝojn de la tuta kunsido. Ŝajnis ke daŭra komuniko-manko inter la du estraroj, kaj certgrade la Oficejo, lasis la grundon nepreta por utila diskuto. La Junulara Komisiono, kiu devus certigi tion, klare ne funkcias. Komisionanoj Koszmaluk kaj Despiney inter si ellaboros konkretajn proponojn por plibonigo de la situacio, kiujn oni diskutos en Brajtono.

Strategia Plano: Post travado de la leterinundo, Tonkin adaptis la Planon laŭ la proponoj pri vortŝanĝoj kaj plibonigoj je detaloj, sed lasis la centran skemon kaj filozofion neŝanĝitaj. La ĉefa ŝanĝo estos divido de la Plano en du partojn, el kiuj nur unu nomiĝos strategia: la alia fariĝos tradicia trijara laborplano. Ambaŭ dokumentojn, post redakta konsekveneco, oni prezentos al la Komitato en Brajtono.

* * *

Firmao kun malgrandaj pretendoj povus esti sufiĉe kontenta pri tia kunsido: oni traktis ĉion, registris kelkloke progreson, faris planojn. Sed mi demandas min: ĉu nur tia oni volas UEA? Eventuale la elektoj en Brajtono proponos ian respondon al tiu demando.

Mark Fettes

Post 100 jaroj telekopie: La unua Esperanto-gazeto

La unuan de septembro 1889, do antaŭ 100 jaroj, la unua Esperanto-gazeto *La Esperantisto* ekdisvastiĝis el la germana urbo Nurnberg tra la mondo. La Estraro de UEA decidis en sia marta kunsido ebligi al ĉiuj esperantistoj ricevi specimenon de la historia gazeto per telekopio (telefakso), unu el la plej modernaj metodoj de telekomunikado.

Tio ne nur estos ŝanco por kolektantoj de raraĵoj, sed okazo por informi pri la monda lingva problemoj kaj la solvo kiun ofertas Esperanto. Per modernaj komunikiloj estas eble sendi informojn dum ono de sekundo tra la tuta mondo, tamen ne estas eble samrapide kaj aŭtomate traduki la informojn el unu lingvo en alian. La ricevo de *La Esperantisto* per telekopio estu utiligata por montri ke Esperanto, havante pli ol 100-jaran tradicion, ne malmoderniĝis, sed ebligas pli racian utiligon de la telekomunikado.

La Estraro de UEA komisiis al laborgrupo prepari la necesajn tekstojn kaj dokumentojn, kiuj faciligas al ĉiu esperantisto, loka grupo kaj Landa Asocio de UEA informi la publikon, la gazetaron, kaj la aliajn komunikilojn. Estas konsilinde, ke la ricevo de la telekopio okazu je konvena horo dum la 1-a de

septembro 1989 en la ĉeesto de la publiko kaj observate de ĵurnalistoj.

En multaj landoj ekzistas la eblo ricevi telekopiojn en poŝtofoicejoj; krome estas multaj firmaoj, universitatoj kaj aliaj institucioj, kiuj utiligas telekopiilojn kaj certe permesas la ricevon de unusola kopio. UEA estas en kunlaboro kun granda entrepreno, produktanto de telekopiiloj, kies agentejoj tutmonde pretas helpi al la esperantistoj.

Ĉiuj, kiuj ŝatus ricevi la telekopion, eĉ se ili ankoraŭ ne povas disponi pri taŭga aparato, estas urĝe petataj sendi sian adreson al la prepargrupo "FAX". Ili ricevos utilajn konsilojn pri la informado de la gazetaro, la historio de *La Esperantisto* kaj de la telekopiado. Por la dissendo de la telekopio pagendas kotizo de \$US 10,00. La kotizo ebligas, ke esperantistoj en la tria mondo kaj netranspagipovaj landoj ricevu la telekopion senpage.

Pliaj informoj haveblas de la laborgrupo pri telekopiado (adreso malsupre), kiu ankaŭ kolektas ĉiujn konatajn numerojn de utiligeblaj telekopiiloj.

Roland Schnell, Laborgrupo "FAX"
Möckernstr. 71, D-1000 Berlin 61
UEA-konto: faxx-c

Vjetnamio malfermas la pordon

Inter la 16-a kaj 26-a de novembro 1988, du sovetiaj esperantistoj vizitis Vjetnaman Pacdefendan Esperantistan Asocion en Hanojo. Dmitrij Perevalov (Moskvo) kaj Anatoli Ionesov (Samarkand) ĝuis amikecan akcepton kaj fruktodonajn kun-sidojn kun la esperantistoj kaj reprezentantoj de kulturaj kaj aliaj instancoj.

En la Kulturpalaco de Vjetnamia-Sovetia Amikeco, vic-direktoro Vu Tien Lac kaj la estro de la kultura-eduka fako Mai Xuan Trinh intime gastigis la vizitantojn kaj la estraranojn de VPEA. Poste dudeko da E-kursanoj zorgis pri distra programo akompane al tradicia bankedo, kun poemoj kaj kantoj en Esperanto kaj la vjetnama. Oni kune dancis kaj kantis la rusan popolkanton "Katjuŝa" en Esperanto, kaj kiam VPEA-sekretario Dang Dinh Dam proponis Esperantan version de la vjetnama popolkanto "Trans la ponto", k-do Perevalov agrable surprizis siajn gastigantojn, kantante ĝin en la vjetnama.



Jam dua E-klubo fondiĝis en Ho Chi Minh-urbo, julie 1988.

La 18-an de novembro okazis kunveno por pridiskuti la staton de la Esperanto-movado en la regiono Azio-Pacifiko. Partoprenis, krom la esperantistoj, ankaŭ multaj reprezentantoj de kulturaj instancoj kaj amaskomunikiloj. K-doj Perevalov kaj Ionesov parolis pri la agado de sovetiaj esperantistoj por la paco, pri la E-eldonado, kaj prezentis lumbildaron i.a. pri la "Muzeo de la Paco" en Samarkando. Kontribuis vjetnamaj esperantistoj (k-doj Vu Cấn, Bui Hanh Cấn, Hồng Hạc kaj aliaj), kaj ankaŭ la estro de la Vjetnama Instituto pri Azio-Pacifiko, prof. Van Trong, kies skriba referaĵo montris klare lian simpatian al la Esperanto-movado (vd. apudan kadron).

En la urbo Hô Chi Minh same okazis akceptoj, vizitoj al vidindaj lokoj, kaj renkontiĝo kun la loka esperantistaro. Tiu lasta okazis en la Laborista Kulturdomo, kie pasintan julion fondiĝis oficiala Esperanto-klubo (*Esperanto* 1988/p.203), kaj kies direktoro Ngoc Anh estas apoganto de la movado. Prezidanto de la klubo d-ro Lê Nhiêm poste afable gastigis la vizitantojn, kune kun la vicprezidentino de VPEA Lê Tuyêt Thanh kaj la sekretario Dang Dinh Dam, ĉe la Sjagon-haveno, kie li laboras kiel ekonomia direktoro.

Post tiu mallonga sed intensa periodo de frataj vizitoj, sincera kunlaboro kaj bona interkompreniĝo, la sovetiaj kaj vjetnamiaj esperantistoj certe plifortigos ne nur sian amikecon, sed ankaŭ sian kontribuadon al la paco kaj stabileco en Azio kaj Pacifiko kaj en la mondo.

Dang Dinh Dam

PROF. VAN TRONG, VJETNAMIO:

Pacifika jarcento – jarcento de Esperanto? (resumo)

La regiono Azio-Pacifiko, kun proksimume duono de la tersurfaco kaj duono de la monda loĝantaro, pli kaj pli fariĝas regiono altiranta la atenton de la homaro. Tie koncentriĝas la ekonomiaj grandpotencoj, tie apud la socialismaj kaj merkataj ekonomioj jam vico de nacioj de la tria mondo pozitive progresas sur la vojo de soci-ekonomia evoluo.

Lastatempe, pluraj esploristoj de Oriento kaj Okcidento parolis pri la 21-a kiel la "pacifika jarcento". Jam fine de la pasinta jarcento Karl Marks prognozis, ke "Pacifiko rolos kiel nuntempa Atlantiko kaj kiel Mediteraneo en la malnova kaj meza epokoj – kiel granda marvojo por la internacia cirkulado." Pli ol ie ajn, hodiaŭ en ĉi tiu vastega kaj vigla regiono la paco kaj la evoluo fariĝis urĝaj postuloj de ĉiuj nacioj. Ankoraŭ en la sino de pluraj landoj, la kontraŭdiroj inter religioj kaj gentoj, plus intrigoj instigataj kaj helpataj de eksterlandaj malamikaj fortoj, plikomplikigas la soci-politikan situacion, malhelpas la ekonomian evoluon kaj minacas la politikan stabilecon.

Esperanto povas multe kontribui al la komuna afero de la popoloj luktantaj en tiu regiono, helpante al la interkompreniĝo de la nacioj pri kulturo, historio, kaj pri iliaj legitimaj aspiroj. La postuloj plifortigi la ekonomiajn kaj komercajn interrilatojn, interŝanĝi la atingojn kaj spertojn pri edukado, medicino, scienc-tekniko kaj industrio, eĉ pri la demografia kaj urba problemoj, pri la defendo de la viv-medio ktp, jam fariĝis objektiva premiso por la plivastigo de ĉiufanka kunlaborado en la regiono. Ankaŭ tio estas grava, se ne diri la plej grava, afero bezonanta la pozitivan helpon de Esperanto.

Permesu min esperi, ke Esperanto estos la akompananto de la popoloj en la regiono Azio-Pacifiko dum la longa marŝo en la 21-an jarcenton. Kaj kial ni rezignu la rajton esperi, ke tiu mirinda lingvo estos "la lingvo de la 21-a jarcento"?

Plufluas la "varma tajdo"

Antaŭ unu jaro ni raportis pri la rapida disvolviĝo de la movado en Ŝenjang, la ĉefurbo de la provinco Liaoning en nord-orienta Ĉinio (Esperanto 1988/p.62-3). Jen nun sekvo al tio, kiu pruvas ke la tajdo, laŭ ĉina esprimo, ankoraŭ varmas. . . .

En la provinco Liaoning, de majo ĝis oktobro 1988, okazis la unua provinca radia-televida Esperanto-kurso en Ĉinio. Ĉiutage dum la semajno, la radio dissendis dufoje po-20-minutan lecionon, kaj dimanĉe la televido faris help-elsendon pri la lecionoj de la tuta semajno. Kelkmil homoj anoncis sin por la kurso kaj trapasis la finan ekzamenon, inter la 27-a kaj 31-a de oktobro 1988, ricevante diplomon kiun subskribis Liaoning-a Kadra Buroo de Scienco kaj Tekniko (LKBST) kaj Liaoning-provinca Esperanto-Asocio (LEA). Tiu oficiale agnoskata diplomo estis unu el la novaĵoj kiuj altiris tiom da homoj al la kurso.

La kurso vekis atenton i.a. ĉe usona ekonomia konsulo Lawrence Walker, kiu laboras en Ŝenjang kaj vizitis LEA, kaj

raportisto Adi Ignatius de la usona ĵurnalo *The Wall Street Journal*, kiu speciale venis de Pekino por intervjui nin. Al lia demando, kial ni propagandas Esperanton kiam la angla lingvo estas tiel populara, ni povis doni kontentigan respondon.

En Liaoning-provinco la urboj Shenyang, Dalian, Jinzhou, Anshan kaj Fushun jam havas Esperanto-asociojn, kaj LEA nun koncentriĝas pri la fortigo de la komunikado inter ili. Dalian, kiel havenurbo, proponas bonajn kondiĉojn por kontaktoj kun eksterlando. La karb-urbo Fushun kaj la silka urbo Dan Dong ambaŭ emfazas Esperantan edukon inter infanoj. Ankaŭ la urboj Liaoyang kaj Panjin ofte organizas Esperantan agadon.

En la gubernio Xi Feng fondiĝis la unua gubernia Esperanto-asocio, kiu jam havas rektajn rilatojn kun la tiea poŝtoŝeĉejo (tiel ke sufiĉas la adreso "Xi Feng Esperanto-Asocio, Liaoning"). Esperanto enradikiĝis ankaŭ en la gubernioj Qin Yuan, Chang Tu kaj Kai Yuan. En Shenyang naskiĝis la unua komerca

E-kompanio en Ĉinio, nome Shenyang-Verdstela Serva Kompanio de Scienco kaj Tekniko. La kompanio celas altiri eksterlandajn investojn en Ĉinio, eksporti enlandajn produktaĵojn, kaj peri ekonomiajn informojn pri novaj teknikoj kaj produktaĵoj al mez- kaj malgrandskalaj entreprenoj. Ĝi jam ĉeestis la unuan Ĉinian-Sovetunian Komercon Konferencon en septembro 1988, kaj establis propran servan fakon de libroj kaj revuoj.

Nuntempe LEA kaj ĝiaj urbaj filioj havas rilatojn kun multaj asocioj aliloke en Ĉinio. Kelkaj koresponde rilatas kun aliaj landoj; nur en 1986 LEA kaj la urbaj asocioj akceptis pli ol 40 esperantistojn el 14 landoj. Ni volonte interŝanĝos kun ĉiuj esperantistoj en la mondo, samtempe ni ankaŭ volonte servos al asocioj, grupoj aŭ individuoj.

Wu Guojiang, Sekretario de LEA
Fushun Shiyoyichang Yanjiusuo
Fushun, Liaoning-sheng, Ĉinio


Studenta asocio naskiĝis en manĝejo

Iun tagmezon aŭtune de 1987, studento kaj studentino renkontiĝis en la manĝejo de Orientĉinia Normala Universitato en Ŝanhajo. Ambaŭ estis lernintoj de la somera Esperanto-kurso, kiun gvidis UEA-fakdelegito Ĉien Min-ĉi por 15 studentoj el diversaj fakultatoj. Leviĝis la ideo fondi studentan E-asociacion. "Ĉu ni faru?" "Jes, kial ne?"

Tiam ĉirkaŭ 70 studentoj jam sekvis kurson, sed neatendite, multaj montriĝis neinteresitaj pri daŭrigo. Apogate de Ĉien Min-ĉi, la gestudentoj Bi Rong (Bi Ĵon) kaj Gu Mei-zhen (Gu Mej-ĝen) okazigis plian kurson, kaj prezentis la E-dramon "La vazoj" en la dramfesto de OĈNU. Kvindek studentoj partoprenis la kurson; centoj da studentoj ekkonis Esperanton. La bazo konstruiĝis.

Jarfine, la 26-an de decembro 1987, fondiĝis Esperanto-Asocio de Orient-Ĉinia Normala Universitato. Fariĝis prezidanto alia studento, He Miao-zhuang (He Mjaŭ-ĝuan), kiu rapide progresis en la lingvo kaj varbis plurajn konatajn esperantistojn kiel niajn apogantojn. En la postaj naŭ monatoj ni okazigis ses kursojn por ĉ. 200 lernantoj. Niaj afiŝoj ĉie vidiĝis, tiel ke nun neniu en OĈNU ne aŭdis pri Esperanto. Samtempe, ni tenis oftan korespondadon kun multaj aliaj E-asocioj en Ĉinio.

La dolĉan majon, en nia lernejo okazis "Ŝanhaja E-kurso" kaj la unua "Ŝanhaja Kunveno pri Scienc-tekniko kaj Ekonomio en Esperanto". Ariĝis centoj da esperantistoj, eĉ iuj el aliaj provincoj. En varma aŭgusto, kvin OĈNU-anoj partoprenis la duan IAKSTE (*Esperanto* 1988/p.185-6) en Pekino. Tie la



Solena inaŭguro: Ĉinaj studentoj kantas "La espero" ĉe la lanĉo de la E-Asocio de Orient-Ĉinia Normala Universitato.

asocia bulteno *Edeno* multe interesis la kunvenintojn, kiel la unua granda E-gazeto en la nuna Ŝanhajo. Ĝiajn 120 paĝojn plenigas E-poemoj, eseoj, noveloj, kursoj, ŝercoj, informoj ktp.

Nun OĈNU-EA fariĝis respektata asocio en la tuta lando. La fondinto-studentino Gu Mei-zhen jam diplomiĝis, sed ekster la lernejo ŝi ankoraŭ aktivas por Esperanto. La studento Bi Rong, ĉefredaktoro de *Edeno*, daŭras labori kiel vicprezidanto. Li plej ŝatas manĝi ĉe la tablo de la manĝejo kie fondiĝis la asocio – ĉar kie, sen la ĉarmo de Esperanto, troviĝus asocio fondita en manĝejo?

Bi Rong (Ĉinio)



"Parizo 1989", tio estas la titolo de granda mitingo junula okazonta inter la 21-a kaj 26-a de aŭgusto.

La organizantoj, kvar internaciaj politikaj junulorganizoj, celas venigi ĉ. 10 000 homojn el plejeble multaj landoj por "festi la liberecon, defendi la demokration" okaze de la ducentjara jubileo de la franca revolucio kaj deklaro de la homaj rajtoj. Oni diskutos (france, angle, hispane) la temojn "Libereco – liberecoj", "Ŝanc-egaleco", "Mondo pli gefrata", "Demokratio". Oni amuziĝos kaj malkovros Parizon.

TEJO kaj JEFO (la franca Esperanto-junularo) decidis partopreni tiun eventon por prezenti nian komunikan modelon al granda publiko juna kaj diverslingva. Ni volas atentigi pri la neceso de ŝanc-egaleco ankaŭ inter la kulturoj kaj postuli la homan rajton je komunikado.

Multnombre ni estos pli fortaj, efikaj kaj ankaŭ pli gajaj. Ju pli frue vi anoncos vian ĉeeston, des pli grandaj la ŝancoj ke ni trovos senkoston tranokteblecon por vi ĉe parizaj esperantistoj. Se vi aliĝos antaŭ la 20-a de junio, vi ricevos senkoston semajnan metrobileton kaj detalan informilaron. Do, ek! Skribu al Aline Boulet-Koszmaluk, 8 villa Stendhal, F-75020 Paris. Tel. +33/43 66 63 47.

Kiel lumgardantoj kernas

*"Fermita rondo"? Ĉu ni fakte fermas
En sorĉan rondon nin, socipretere?
Sed se ni kiel lumgardantoj kernas
Ĝis venos nia ĝusta hor' konkere?"*

William Auld

El ĉiuj manifestaĵoj de la vivanteco de Esperanto, plej karakterizaj kaj centraj estas ĝia gazetaro kaj la internaciaj radioelsendoj. Malmultaj el ni havas la okazon regule foliumi preskaŭ ĉiun el la ĉ. 200 movadaj periodaĵoj. Tia tamen estas la principa devo de la redaktoro de Esperanto. Sidante en Nieuwe Binnenweg ĉe mia skribotablo, mi sentas ke mi kvazaŭ subaŭskultas interkontinentan konversacion: jen kion la movadanoj planas, sentas, spertas, bedaŭras, timas, esperas. De cent jaroj jam, jen la ĉefa fenestro, krom Universala Kongreso, al la penskulturo de Esperantujo.

El la lastaj monatoj mi kaptis kelkajn erojn por dividi kun vi, niaj legantoj. Ne temas pri kompleta bildo, kaj iuj partoj de la mondo restas malantaŭ siaj lingvaj baroj. (Kial Japanio, ekzemple, ne aperigas internacian revuon apud la altkvalita sed nacilingva Revuo orienta? Movada mistero . . .) Sed eĉ ĉi tiu limigita gamo de perspektivoj ja vastas. Jen, streĉu la orelojn.

TEJO-tutmonde 6/88: "TEJO daŭre luktas kontraŭ malfacile solveblaj problemoj – interna funkciado, burokrataĵoj, vojaĝ-, mon- kaj tempoproblemoj de funkciuloj, rilatado kun

Lumo (Kanado), vintro 88-89: "[Unu membro] pretigis entute 500 inform-pakaĵojn, intencitajn por la [turismo-] kongresanaj dosierujoj. Sed li renkontiĝis kun evidenta rezisto aŭ ignorado, kiam li traktis kun la organizantoj antaŭ la konferenco. Simile okazis ankaŭ dum la konferenco – neceso forta persisto por almenaŭ havi rajton disdoni la pakaĵojn. Ambaŭ [membroj] konstatis post la kvin labor-plenaj kaj lacigaj konferencaj tagoj, ke ĉi tiu konferenco estis por Esperanto 'perdita batalo'."

Saksa kuriero (Germana DR) 1/89: "Mi, kiel instruisto de la lingvoj angla, turka kaj Esperanto . . . ofte ŝanĝas mian plej amatan lingvon. Ke mi ofte revenas al Esperanto mi dankas al la fascino de la lingvo kaj de la Esperanto-ideo. Sed tro ofte mi poste estas forigita, enuigita, ĉagrenita, eĉ naŭzita pro kelkaj movadanoj. Mi certe ne ŝatus pasigi mian vivon en mucida atmosfero de tipa germana klubovivo, ĉefe ne kun homoj kiuj arde – sed ofte aĉe! – varbas por Esperanto, kiuj arde – sed ofte aĉe! – instruas Esperanton kiel memstarigitaj instruistoj. . . . Malbona instruado povas forigi lernemulojn, malbona varbado estas pli malbona ol neniu varbado!"

Aŭstralia esperantisto 1/89: "Oni konjektas ke estas eble 600 esperantistoj en Aŭstralio. El ili apenaŭ 200 estas membroj de AEA. Malpli ol 200 efektive pagis sian kotizon. Oni kalkulis ke se la statistiko ne radikale ŝanĝiĝos, en la jaro 2000 ekzistos eĉ ne unu membro en AEA."



kaj reprezentiĝo en neesperantistaj mondaj organizaĵoj, financoj, iuj kvereloj pro malsamaj opinioj rezultantaj el diversaj imagoj pri la funkciado de organizaĵo k.a. Denove seniluziiga estas la silentado flanke de la TEJO-komitatoj. Ne pli ol jare averaĝe po 10 el la ĉ. 60 komitatanoj sendas ion al mi.

"Ne la lingvo, sed la distancoj kaŭzas perturbojn. . . . La distancoj kaj landlimoj ofte estas mezuriloj por tio, kiom malglate kaj malrapide funkcias nia internacia laboro kaj kiom variaj povas esti la ideoj en la kapoj de la homoj. . . ."

Dia regno 1/89: "La muroj de indiferento, ignoro kaj simpla nescio staras altegaj. . . . Kaj kion faras la esperantistoj? Ili malŝparas sian energion kaj inteligenton por revarmigi lingvajn herezojn kaj endanĝerigi la unuecon de bone establita lingvo-uzo, aŭ ili tute ne zorgas kulturi sian lingvo-nivelon lege, skribe kaj parole. Kaj kion faras la kristanoj? Ili malŝparas sian energion kaj inteligenton por ree elstarigi la diferencojn inter la eklezioj kaj rerampi inter la sekurajn murojn de la propra konfesio."

Internacia fervojisto 1/89: "Bedaŭrinde la plej akra problemo estas la evoluo de la membraro. Ne nur, ke la membronombro ĝenerale montras negativan tendencon, sed ankaŭ la konsisto de la membraro laŭ aĝo fariĝas de jaro al jaro pli malfavora. . . . Ni nenion alian povas fari ol plifortigi kaj modernigi – same kiel la Esperanto-movado entute – la informadon kiel eble plej vaste."

Nia bulteno (Portugalia) 1/89: "Demandite pri la kaŭzo de l' nuna malvigleco de E-o nialande, plej ofte portugala esperantisto ŝablone kulpigas 'la plurjardekan malpermeson de E-o en Portugalio', 'la influon de la franca kaj angla kulturoj', 'la malkonfidon kaj malfavoran antaŭjuĝon flanke de nuntempaj aŭtoritatoj', ks. Tamen ni ne dubas aserti, ke pri tia malforteco kulpas unuarange la e-istoj mem, la nuntempaj e-istoj!"

"En aliaj landoj, precipe en orienta Eŭropo kaj Azio, E-o fariĝas pli kaj pli vigla. Tie oni laboras, disvastigas, propagandas; oni kongresas, konferencas, seminarias; oni ekskursas, pupteatras, brodkastas; oni beletras, verkas, eldonas; oni kantas, babilas, konversacias; oni kotopo-as en E-o!"

Bulgara esperantisto 2/89: "La celo de la renovigo en BEA estas klara. Sed samtempe tute klara estas ia (mem)izoliĝo kaj silentiĝo de apartaj E-societoj. Ne gravas ĉu la kaŭzo estas malproksimeco de la centro kaj manko de subinstancoj, aŭ la malnova kutimo atendi 'de supre' instrukcion, planon, instigon, ideon . . . La Centra Estraro de BEA havas je sia dispono sufiĉan kvanton da membroj, kies plimulto, ne pro sia kulpo, kunsidas nur 1-2-foje dum la jaro kaj revenas hejmen sen iu ajn kontribuo al la komuna afero. . . . Ekzistas delonge tradicioj kontraŭ la izoliĝo kaj pasiveco: intersocietaj, regionaj kaj enlandaj konferencoj, kunvenoj, interŝanĝo de sperto, komunaj ekskursoj, amuzaj vesperoj, festenoj. Ĉe la nunaj cirkonstancoj tiuj formoj estas nepre efektivigendaj. Sed kiamaniere?"

Aŭstralia esperantisto 1/89: “Male al la sperto de niaj samideanoj en la giganta Ĉinio, ni aŭstralianoj ankoraŭ ne povas kalkuli je oficiala apogo por la internacia lingvo. Ankoraŭ ni devos plugi la propran sulkon, daŭrigi ĉefe sur la nivelo de lokaj grupoj, varbi inter niaj konatoj, uzi laŭeble la ekzistantajn komunikilojn. Du aliajn aferojn ni ne subtakso: ni plibonigu nian lingvoscion kaj plue kultivu la amikecon, kiu estas tradicie unu el la allogoj de nia movado.”

Norvega esperantisto 5-6/88: “Nia norvega movado dum la pasinta jaro spertis sukcesojn kaj malfacilaĵojn. Du aferoj malĝojigis min, nome la malfruigo de *Norvega esperantisto* . . . [kaj] la stato de nia oficejo. . . . Nia organizo pli kaj pli partoprenas en aranĝoj kun aliaj organizoj, parencaj. Tio estas stimula por ni, interesa, kaj ankaŭ donas al ni eblecon informi pri nia movado.”

Aveno 1/89: “La lasta numero de nia bulteno aperis en decembro 1986, do verŝajne multaj el niaj membroj estis supozantaj ke *Aveno* mortis . . . [Tamen] mi havas la impreson ke nun estas multe pli da esperantistaj verduloj ol kiam AVE fondiĝis, eble iom ‘antaŭ sia horo’ . . .”

Sennaciulo 2/89: “Vi sendube rimarkis, ke post interrompo de kvindek jaroj, denove SAT havas landan peranton en Sovetunio. Bonvenon kaj kuraĝon! . . .”

“De kvar jaroj la situacio en kaj ekster SAT profunde modifiĝas: renovigo kaj aŭtomatigo de la SAT-centro, unua kongreso en la tria mondo, nova SAT-servo la Amikeca Reto, la fenestro ekmalŝlosiĝas en orientaj landoj kaj kelkaj junaj kolektivoj fakte interesiĝas pri la celoj de SAT. . . . Tiuj konstatoj klare montras ke ekzistas bonaj bazoj por la (re)progreso de nia Asocio kaj ĝiaj idealoj.”

malhelpas la organizan laboron. Tion oni rimarkas plej unue en la Komitato kaj en la Estraro de UEA, kie multaj pretas doni teoriajn konsilojn, sed malmultaj pretas labori kun Zamenhofa obstino inter du kunsidoj. Sekve de tio, la definitiva Strategia Plano devus antaŭvidi necesan reformon de la labormetodoj, eĉ de la spirito, de la supre menciitaj organoj.”

GEJ-gazeto (FR Germanio) 1/89: “En novembro la estraro ekdiskutis la celojn de GEJ: Kiu estas la celo de nia agado en la 90-aj jaroj? Kiun rolon havos lokaj grupoj? Kiel pliefikigi la informreton, kion celu nia informado? Kiuj estu niaj politikaj celoj? En kiuj kampoj GEJ politike engaĝiĝu, ĉu ekzemple en kazo de kontraŭ-etnaj diskriminacioj? . . .”

“Oni jam pensas kiel festi la 10-jariĝon de *GEJ-gazeto* . . . La estraro planas diskuton inter redaktoroj kaj legantoj pri la estonta enhavo, ekzemple havi pli da politikaj/instruaj artikoloj pri la landoj, kie okazas IJK, UK kaj aliaj renkontiĝoj.”

Informoj de Esperanto-Asocio de Estonio 1/89: “La lasta numero de [ĉi tiu bulteno] aperis la 5-an de aŭgusto 1940. . . . [Nun ĝi] provas elpuŝi sian novan ĝermofolion – kia estas la klimato? Kion ĝi atendu en la nuna socio? Kiujn taskojn oni donos al ĝi? Kun kiuj sloganoj pluiru la movado?”

“La nova *Informoj de EAE* siaflanke starigas jenajn principojn: internacieco, iniciatemo, praktika aplikado.

“La internacieco signifas, ke la respublika E-movado ne fermu sin en la kadroj de lokaj kluboj aŭ rondoj. Ĝi serĉu kontaktojn kun alilandaj movadoj, alinaciaj medioj kaj kulturoj, konsiderante ĉiujn naciojn kaj kulturojn egale valoraj, indaj por reciproka konatiĝo kaj estimo.

“La iniciatemo signifas, ke lokaj kluboj, societoj kaj rondoj ne atendu ordonojn de la respublika aŭ tutlanda centro. Laŭ la



Kvinpinto 1/89: “Nun verŝajne estas la tempo. La mondo ektrovis Esperanton kaj nun ne estas la tempo rigardi ĝoje la okazaĵojn, ĉar ili facile povas fariĝi okazINTaĵoj, kvazaŭ nura tremo sur ondo de la granda oceano de la historio. Nun ni havas ŝancon igi Esperanton unu el la ondoj. Mi petas, ne perdu la ŝancon.”

Literatura foiro 115: “Ni estas esperantistoj ĉar ni sukcesis rigardi trans la limoj de nia nacia horizonto. . . . Ĉu ni kapablas realigi la oportunan ekvilibron, pensante globe kaj agante loke, aŭ ni riskas enfermiĝi en propran getton, kiel multaj mikrosocioj ene de la makrosocio?”

“Ĉu ni insistos pri la bezono kreski kvante por esti pli multaj kaj tiel pli multnombre premi ĉe la institucioj por akceptigi niajn principojn – aŭ ĉu ni decidus esti pli multaj tute simple por vivi pli multnombre laŭ niaj principoj, plaĉu tio aŭ ne al la institucioj?”

“Ĉu ni estos en la dua jarcento minoritato en konstanta frustracio – aŭ ni estos minoritato kvalite kreskanta, konsciaj pri la eblo ludi rolon avangardan rilate al la makrosocio?”

Heroldo 3/89: “Ni rajtas esperi, ke en la kadro de la Strategia Plano en antaŭvidebla tempo UEA komisiu al grupo de kompetentaj intelektuloj movadaj la studon de la sociaj, psikologiaj, ekonomiaj kaj politikaj aspektoj de la monda lingvo-problemo kaj de nia agado. . . . La nuna reganta individuismo

karaktero kaj kapabloj de siaj membroj ili trovu agadterenojn, agu meminitate, per siaj iniciatoj instigu aliajn.

“Praktika aplikado signifas laŭeble multajn interkontaktojn de samfakuloj en loka organizaĵo, respubliko, regiono kaj vast-internacie. La internacia lingvo estas kreita tiucele, nur tia apliko de ĝi rajtigas ĝian ekzistadon kaj disvastigon.”

Hungara vivo 5/88: “HEA troviĝas inter la plej aktivaj movadaj eldonantoj, sian renomon ĝi gajnis precipe en la periodo 1980-85, kiam regule aperis deko da titoloj jare: represoj, didaktikaĵoj, popular-beletraĵoj kaj -sciencaĵoj. . . . Restas ĉe HEA forta morala devo avangardi en la Esperant-lingva eldonado, pro ĝia unika pozicio. Libro, kiun oni eldonus okcidente en mil ekzempleroj povas ĉi tie aperi en kvinmil.

“Fine restas imperativo por la publiko. Tiu profito kaj reinvestblo naskiĝas nur pro viaj aĉetemo kaj legemo. Eldonadi margene profitajn Esperantajn librojn oni povas nur se troviĝas por ili sufiĉa publiko. Pro sia diseco, la Esperanta komunumo, pli ol aliaj, dependas de libroj. . . . Sekve, kiam mi uzas la vortojn ‘profito’ kaj ‘reinvesto’ mi pensas [ankaŭ] pri la spirita profito de nia komunumo kaj investado en ĝia regenero kaj plufortiĝo.”

Fonto 7/88: “Esperanto estas tio, kion ni faras el ĝi verkante, kaj tiu kontribuado al la grandioza verko de Zamenhof meritas la plej rigoran atenton. Ni nepre ne eternigu erarojn aŭ senvalorajn tekstojn. . . . Se la nivelo malplialtiĝos, certe multaj

legantoj ĉesos aboni *Fonto* kaj nia revuo riskos malaperi.”

La gazeto 1/89: “Ĉiuj etnolingvoj bezonis kvin-ses jarcentojn por fariĝi kulturlingvoj. Eĉ se nin helpas la akcelo de la historio, endos du-tri jarcentoj por ke ĉirkaŭ nia lingvo kristaliĝu civilizo. Kondiĉe ke ni laboru kaj ni klare sentu nian kulturan devon. La bazo de ĉi tiu devo estas interesiĝi pri la determinaj kulturvaloroj de ĉiuj popoloj. Esperantisto estas tiu, kiu esperas, ke li sukcesos kompreni la valorojn de la aliuloj kaj komprenigi al aliuloj la siajn.”

Simpozio 12/sept.88: “Post bilanco de ĉiuj notoj kaj prete verkitaj tekstoj, kiujn mi faris dum mia tempo de studento kaj tridek jaroj de instruado, mi decidis rekrei ĉion Esperante, helpe de sekretariino kaj sekretario. . . . Nur la estonteco diros ĝis kie atingos mia trajno. Optimisme mi laboras.”

Hungara vivo 6/88: “La unua romano aperis en la jaro 1907; post tio oni spertas solidan kreskon ĝis la eksplodo de la dua mondmilito. Poste sekvas kvaronjarcento da vera stagnado, neniel motivebla nur per la milito: inter 1941-1974 aperis entute nur dek romanoj de kvar aŭtoroj. Aliflanke, dum la okdekaj jaroj oni spertas veran eksplodon: dum jardeko neplena eliras 35 romanoj, t.e. pli ol triono de la tuta produkto (94).”

Ateismo 1/89: “Esperantujo sojlas ĉe nova kultura etapo; ekzemple pripensu la alvokon de A. Fjodorov en lastatempa numero de *Esperanto*. Io neplenumita kaj ekscita naskiĝas en Esperantujo, kaj ATEO estas en la avangardo klopodante krei pli profundan, kleran, seriozan, kvalithavan Esperantan kulturon!”

Jugoslavia stelo 4/88: “Kiel lingvistika profesiulo mi povas diri ke la konado de Esperanto . . . valoris al mi en pure profesia senco almenaŭ kiom la konado de du malsamstrukturaj kaj

diversgentaj lingvoj, do, kvazaŭ mi ellernis ekz. la araban kaj la japanan, aŭ la svahilan kaj la keĉuan. Ĉar Esperanto liberigas la homon el sklaviĝo al la gepatra lingvo, t.e. el sklaviĝo al la tipo, strukturo de la gepatra lingvo kaj el sklaviĝo al la lingva familio al kiu la gepatra lingvo apartenas. La scipovo eĉ de kelkaj hind-eŭropaj lingvoj ne liberigos nin el tiu sklaviĝo.”

ELNA Newsletter (Usono) 6-8/88: “Antaŭ ol esti usonano, mi vivis en Rumanio, kie mi lernis, devige, du “internaciajn” lingvojn: la francan dum 10 jaroj kaj la anglan dum 4 jaroj. Krome, vivante en Transilvanio, mi kapablis uzi, por ĉiutagaj bezonoj, la hungaran kaj, iomete, la germanan. Dum mia dusemajna restado en Italio, mi surprize konstatis, ke mi kapablas uzi ankaŭ la italan. Enkalkulante mian gepatran lingvon – la rumanan, mi kapablas uzi, pli-malpli sperte, ses naciajn lingvojn. Sed neniu, mi ripetas, neniu el la supremenciitaj lingvoj helpis al mi tiom, kiom Esperanto faris. . . Kvankam mi oficiale eniris Usonon kaj vole decidis resti tie ĉi, mi ankoraŭ estas ‘alien’ (necivitano). Sed dank’ al Esperanto, mi tute ne sentas tion. Por fremdulo, kia ankoraŭ (post sep semajnoj) mi estas, la Esperanto-kunvenoj ne estas simplaj, protokolaj kunvenoj, sed pli: ili estas familiaj renkontiĝoj.”

La skolta mondo 4/88: “Bedaŭrinde aliaj malbonoj insidas la nuntempan homaron: militoj, malsato, polucio, narkot-drogoj, perforto! SEL sola ne povas venki, submeti ĉi tiujn malfeliĉojn . . . [ĝi] eĉ ne volas esti elita, ekstravaganca eminentularo de konformistoj inter skoltoj kaj inter esperantistoj. Pro tio, nerekte, pere de siaj anoj, nia Asocio povas agi kapiliare precize kontraŭ ĉiujn tiujn malbonojn, aŭ per la internacieco de sia lingvo, aŭ per la universaleco de siaj edukaj rimedoj.”

kompilis mf

Por unueca kultura bazo

Sur la sekva paĝo aperas materialo, kiu devus esti pli grava por ni, ol ĉiuj ceteraj paĝoj de tiu ĉi revuo kaj de ĉiuj aliaj revuoj. Tiu materialo estas fakte represita el la nova libro de William Auld: *La fenomeno Esperanto*. Ĵetante rigardon al tiu paĝo, oni povas konstati ke la titolo de la represaĵo estas *Baza Legolisto de la Originala Esperanta Literaturo*.

La listo konsistas el 51 titoloj: 22 poemplibro kaj 29 prozaj verkoj, kreitaj dum sepdek unu jaroj, inter 1912 kaj 1983. Kronologie la unua estas la poemaro *Tra l’ silento* de Edmond Privat, la lasta la romano *Sur kampo granita* de István Nemere. Verŝajne estas pli ol hazardo, ke el la 51 libroj 11 venas el la plumo de hungaraj aŭtoroj.

Sed mi ne celas nun fari hungaran propagandon. Min pensigas tiu listo, pri kies iu aŭ tiu ero oni povus eble diskuti, sed tio ne havus sencon. La listo de Auld estas zorge pripensita, elektita surbaze de lia admirinda kono de nia beletro. Ni devas cerbumi pri tio, kiel utiligi ĝin.

Oni ofte konstatis, ke en la disvastigado de la Esperanta kulturo la ĉefa malhelpo estas tio, ke Esperantujo ne havas kulturan substrukturnon, t.e. lernejan reton, kiel la naciaj kulturoj. Pro tio la kulturaj-literaturaj konoj de la esperantistoj estas tre hazardaj, mankas al ili komuna bazo. Nun ni havas la bazon, produkton de la ĉefa korifeo de nia literaturo. Ni uzu ĝin.

Kiel? Unue, tiu ĉi listo devas esti diskonigita ĉie. Mi petas ĉiun kolegon-redaktoron represi ĝin. Ĝi atingu senescepte ĉiun esperantiston, kiu scias legi. Se plurfoje, do tiom pli bone. Due, iamaniere ĝi eniru niajn ekzamenajn postularojn. Kompreneble oni ne devas preskribi por la ekzameniĝantoj en mezgrada ekzameno legi ĉiujn 51 librojn. Sed ja, oni povas devigi ilin elekti la kutime legendajn 3, 5 aŭ 6 librojn ĝuste el *tiu ĉi* listo!

Oni povas objeti, ke preskaŭ duono de la listo momente ne troviĝas en la merkato. Tio estas vero, Kaj eĉ pli, multaj el la aĉeteblaj titoloj estas riceveblaj nur kontraŭ internacie ŝanĝebla valuto. Tamen, la demando estas alirebla ankaŭ alimaniere. Nome, *pli ol duono de la listigitaj libroj aĉeteblas*, kaj kelkaj el ili aĉeteblas ankaŭ en la valut-malriĉa Orienta Eŭropo . . .

Sed sendube estas farendaĵoj ĉi-kampe. La Eldonejo de Hungara Esperanto-Asocio promesas koncentri siajn eldonrimedojn por ŝtopi la truojn en tiu ĉi listo. La libroj, kiuj laŭ niaj planoj eliros ĝis la venontjara UK, estos verŝajne la sekvaj: *Pilgrimo*, *Preter la vivo*, *Sur sanga tero* kaj *Viktimoj* de Baghy, *Koko krias jam!* kaj *La granda aventuro* de Szilágyi, sed eble ankaŭ aliaj, provizitaj per praktika studcela postparolo – kaj represoj de la tuta listo en ĉiu volumo.

Ni eklaboru ĉiuj: redaktoroj de internaciaj revuoj kaj lokaj bultenoj, membroj de ekzamenaj komisionoj, eldonistoj, libroservoj kaj eĉ kunmetantoj de klubaj programoj. Por la Esperanta kulturo. Por la unueca kultura bazo de ĉiuj esperantistoj.

Vilmos Benczik
(el *Hungara vivo*, 3, 1988)



Baza legolisto de la originala Esperanta literaturo

(Prezo indikas ke la libro estas havebla de la Libroservo de UEA.)

POEZIO

- AULD, WILLIAM (red.). *Esperanta antologio*. Dua eldono, reviziita kaj kompletigita. Universala Esperanto-Asocio, Rotterdam, 1984. 887p. 60,00 gld.
- AULD, W.; DINWOODIE, J. S.; FRANCIS, J. I.; ROSSETTI, R. *Kvaropo*. J. Régulo, La Laguna, 1952. 267p. Prezo anoncota.
- AULD, WILLIAM. *La infana raso*. J. Régulo, La Laguna, 1956. 104p. 16,50 gld.
- BAGHY, JULIO. *Pilgrimo*. Budapest, 1926. 124p.
- BAGHY, JULIO. *Preter la vivo*. Literatura Mondo, Budapest, 1923. 124p.
- BOULTON, MARJORIE. *Eroj*. J. Régulo, La Laguna, 1955. 286p. 36,00 gld.
- HOHLOV, N. *La tajdo*. Heroldo de Esperanto, 1928. 61p.
- KALOCSAY, KALMÁN. *Streĉita kordo*. Literatura Mondo, Budapest, 1931. 189p. Reeld. Artur E. Iltis, 1978. 21,00 gld.
- KOCK, EDWIN DE. *Fajro sur mia lango*. J. Régulo, La Laguna, 1967. 119p. 9,00 gld.
- KURZENS, NIKOLAI. *Mia spektro*. Literatura Mondo, Budapest, 1938. 64p. Reeld. E-Rondo de Toronto, 1985. 13,50 gld.
- MAURA, G. E. *Duonvoĉe*. J. Régulo, La Laguna, 2-a eld., 1963. 179p. 15,00 gld.
- MIHALSKI, EUGENO. *Prologo*. SAT, Leipzig, 1929. 62p.
- MIYAMOTO MASAO. *Invit' al japanesko*. J. Régulo, La Laguna, 1971. 110p. 9,00 gld.
- PENETER, PETER. *Sekretaj sonetoj*. Konfidencie, Budapest, 1931 (?). En *Libro de amo*. L' Akacio, Byblos, 1969 (J. Régulo). 262p. 21,00 gld.
- PRIVAT, EDMOND. *Tra l' silento*. Genevo, 1912. 29p.
- RAGNARSSON, BALDUR. *Ŝtupoj sen nomo*. J. Régulo, La Laguna, 1959. 127p. 7,50 gld.
- ROSSETTI, RETO. *Pinta kraĵono*. J. Régulo, La Laguna, 1959. 128p. 7,50 gld.
- SADLER, VICTOR. *Memkritiko*. Eldonejo Koko, Kopenhago, 1967. 60p. 6,00 gld.
- SCHWARTZ, RAYMOND. *La stranga butiko*. Esperantista Centra Librejo, Parizo, 1931. 127p.
- SCHWARTZ, RAYMOND. *Verdkata testamento*. Centra Librejo Esperanta, Parizo, 1926. 123p.
- TARKONY, LAJOS. *Soifo*. J. Régulo, La Laguna, 1964. 231p. 21,00 gld.
- UEYAMA MASAO. *Por forviŝi la memoron pri ŝi*. L' Omnibuso, Kioto, 1974. 95p. 7,80 gld.

PROZA FIKCIO

- BAGHY, JULIO. *Sur sanga tero*. 2-a eld. Szalay, Budapest, 1933. 254p.
- BAGHY, JULIO. *Viktimoj*. Hungara Esperanto-Instituto, Budapest, 1925. 162p.
- BOULTON, MARJORIE. *Okuloj*. J. Régulo, La Laguna, 1967. 177p. 15,00 gld.
- BULTHUIS, H. J. *Idoj de Orfeo*. Den Haag, 1923. 542p.
- ENGHOLM, STELLAN. *Homoj sur la tero*. Literatura Mondo, Budapest, 1932. 201p. Reeld. J. Régulo, La Laguna, 1963. 30,00 gld.
- FORGE, JEAN. *Mr Tot aĉetas mil okulojn*. Literatura Mondo, Budapest, 1934. 243p. Reeld. Fondumo E, 1973. 15,90 gld.
- FRANCIS, JOHN. *La granda kaldrono*. TK/Stafeto, Antverpeno, 1978. 592p.
- FRANCIS, JOHN. *Vitrato*. J. Régulo, La Laguna, 1960. 135p. 18,00 gld.
- KONISI GAKU. *Vage tra la dimensioj*. Japana Esperanto-Ligo, 1976. 77p. 12,60 gld.
- LORJAK. *Regulus*. Eldono Gabrielli, Ascoli Piceno, 1981. 340p. 32,40 gld.
- LUYKEN, H. A. *Pro Iŝtar*. Hirt & Sohn, Leipzig, 1924. 304p. 9,00 gld.
- MIYAMOTO MASAO. *Naskitaj sur la ruino – Okinavo*. Librejo Pirato, 1976. 146p. 16,20 gld.
- NEMERE, ISTVAN. *Sur kampo granita*. Hungara Esperanto-Asocio, Budapest, 1983. 125p. 15,00 gld.
- NEWELL, L. N. *Bakŝis*. Literatura Mondo, Budapest, 1938. 149p. Reeld. Artur E. Iltis, 1983. 24,60 gld.
- PIC, KAROLO. *La litomiŝla tombejo*. Artur E. Iltis, Saarbrücken, 1981. 276p. 48,00 gld.
- RIBILLARD, JEAN. *Vivo kaj opinioj de majstro M' Saud*. J. Régulo, La Laguna, 1963. 143p.
- ROBINSON, KENELM. *Se grenereto . . .* Londono, 1930. 158p.
- ROSBACH, JOHAN HAMMOND. *Fianĉo de l' sorto*. Dansk Esperanto-Forlag, 1977. 192p.
- ROSSETTI, CEZARO. *Kredu min, sinjorino!* Heroldo de Esperanto, Scheveningen, 1950. 259p. 14,40 gld.
- ROSSETTI, RETO. *El la maniko*. J. Régulo, La Laguna, 1955. 221p. 30,00 gld.
- ROSSETTI, R.; SZILAGYI, F. *33 rakontoj: La Esperanta novelarto*. J. Régulo, La Laguna, 1964. 328p. 45,00 gld.
- SCHWARTZ, RAYMOND. *Kiel akvo de l' rivero*. J. Régulo, La Laguna, 1963. 487p. Prezo anoncota.
- SCHWARTZ, RAYMOND. *Vole . . . novele*. TK, Kopenhago, 1971. 192p. Reeld. Artur E. Iltis, 1987. 30,00 gld.
- STURMER, K. R. C. *Por recenzo!* The Esperanto Publishing Co., Londono, 1930. 61p.
- SZATHMARI, SANDOR. *Vojaĝo al Kazohinio*. SAT, Parizo, 1958. 315p. 23,70 gld.
- SZILAGYI, FERENC. *Koko krias jam!* J. Régulo, La Laguna, 1955. 225p. 24,00 gld.
- SZILAGYI, FERENC. *La granda aventuro*. Eldona Societo Esperanto, Stockholm, 1945. 143p.
- TOTH, ENDRE. *Lappar, la Antikristo*. Hungara Esperanto-Asocio, Budapest, 1982. 137p. 13,80 gld.
- VARANKIN, VLADIMIR. *Metropoliteno*. Ekrelo, Amsterdam, 1933. 200p.

Pli klerige ol distre

La unua ĉi-paĝa listo estas kompilita laŭ nia kutima aprila modelo. Ĝi prezentas titolojn de la dudek libroj, plej venditaj en unuopaj ekzempleroj el nia libroservo dum 1988. La zeniton atingas *La danĝera lingvo* kaj la duan lokon la longe atendita *Bildvortaro*. SAT gajnas sian viceron per la *Suplemento*, ankaŭ trovebla kunbindite kun *PIV*. Novaj eldonaĵoj de UEA okupas tri altajn ŝtupojn. El la dudek, nur kvin ripetigas el la pasintjara registro.

Sed ĉi-jare ni prezentas duan liston kunmetitan laŭ alia principo. Temas pri la tuta vendokvanto de la koncernaj titoloj el nia libroservo, laŭ furor-rango. Estas vero, ke tiuj libroj grandkvante iras rabate al aliaj revendistoj kaj ne nepre atingis la publikon jam pasintjare. Tamen, la dua listo donas super-rigardon eble pli fidindan pri la vera aĉetprefero de la klientoj en tutmonda merkato.

Komunaj al ambaŭ listoj restas ok titoloj, inter kiuj plu pintas *La danĝera lingvo*. Oni vidas eĉ pli klare la lastatempan rolon de UEA kiel eldonejo laŭ la dua listo, ĉar – krom financi la eldonon de la libro de Lins – UEA ankaŭ respondecas pri represoj de *Saluton!*, kaj lanĉis la verkojn de Auld kaj Janton, dum *Jubileo* estis redaktita sine de la CO. Enviciĝas ankaŭ *Laŭdo de l' Stulteco* kaj *Infoduktoj*. Kvankam la nove binditaj Stafeto-libroj reprezentigas nur per *Proverbaro Esperanta*, pliaj dek kaŝas sin en la kulisoj de la postaj dudek kvin titoloj.

La ceteraj verkoj estas precipe lingvaj, vortaraj, gramatikaj, kaj leg- aŭ lernolibraj. Tiu konsisto de la listo indikas ian ĝeneralan soifon al solide bonaj konsultverkoj. Pro la roterdama kongreso *Muelejoj* eniras, sed la sola alispecaĵo estas *La nigra insulo*; dume tute mankas al la dua listo noveloj, romanoj kaj poezio.

1988 estis jaro escepte riĉa je novaj libroj. Se ni kapablu kunmeti trian liston pri la tutmovadaj vendokvantoj de ĉiuj libroj, ĝi sendube alprenus alian aspekton, ĉar nia libroservo estas kanalo parte difinita de la eldonpolitiko de UEA. Tiu montriĝas pli kleriga ol distra, jes; sed per tia irigacio oni tamen rikoltas kaj ĝuas la romanojn kiuj ja abundas.

En la venonta aprilo, atendu raporton ankaŭ pri la muzika fako de la libroservo; jam la artistoj de la kasedoj meritas sian rekonon.

ns

Supre, dekstre: Gaston Waringhien, aŭtoro aŭ redaktinto de kvar el la plej furoraj titoloj el la pasinta jaro, subskribas librojn ĉe la 73-a Universala Kongreso en Roterdamo.



*“Nu, ĵetu polvon al la vizaĝo de l' ĉieloj!
Drinku kaj flirtu ĉirkaŭ la ridetantaj beloj!
Ĉu decus ia kulto, ĉu decus preĝo, nun ke
neniu jam rebrilis el l' estingitaj steloj?”*

Rubaiyat of Omar Khayyam in 30 Languages
(La robaijoj de Omar Kajjam en 30 lingvoj).

Unika kolekto, lukse ilustrita kaj bindita, 710p. 198,00 gld.

VENDOJ UNUOPE

1. La danĝera lingvo (Lins)	66,00
2. Esperanta bildvortaro (red. Eichholz)	90,00
3. La fenomeno Esperanto (Auld)	18,00
4. PIV-suplemento (red. Levreaud/Waringhien)	12,90
5. Plena ilustrita vortaro (red. Waringhien)	138,00
6. Knedu min sinjorino! (red. Corsetti)	7,50
7. Studoj pri la internacia lingvo (red. Duc Goninaz)	39,00
8. Jubileo (red. Fettes)	57,00
9. Esperanto: lingvo-literaturo-movado (Janton)	18,00
10. La nigra insulo (Hergé)	16,50
11. Syntactic Tree Structures in DLT (Schubert)	66,00
12. Fundamento de Esperanto (Zamenhof)	9,90/15,00
13. Plena analiza gramatiko (Kalocsay/Waringhien)	48,00
14. Terra (Nemere)	18,00
15. Nederlands-Esperanto-Nederlands (Middelkoop)	23,40
16. Beletro, sed ne el katedro (Waringhien)	34,50
17. Zamenhofa ekzemplaro (red. Nomura)	75,00
18. Vetero kaj klimato de la mondo (Riley/Spolton)	28,50
19. La franca periodo de Esperanto (Ludovikito)	48,00
20. Kulturo de la amo (Szilágy)	21,00

VENDOJ ENTUTE

1. La danĝera lingvo (Lins)	66,00
2. Saluton! (Childs-Mee)	24,00
3. La fenomeno Esperanto (Auld)	18,00
4. Esperanto: lingvo-literaturo-movado (Janton)	18,00
5. Jubileo (red. Fettes)	57,00
6. Muelejoj en Nederlando	6,00
7. Dictionnaire francais-Espéranto (Léger/Albault)	13,50
8. Fundamento de Esperanto (Zamenhof)	9,90/15,00
9. Plena analiza gramatiko (Kalocsay/Waringhien)	48,00
10. PIV-suplemento (red. Levreaud/Waringhien)	12,90
11. Praktika bildvortaro de Esperanto	14,40
12. Laŭdo de l' Stulteco (Erasmus)	30,00
13. Esperanta bildvortaro (red. Eichholz)	90,00
14. Faktoj kaj fantazioj (Boulton)	36,00
15. Infoduktoj (De Brabandere)	30,00
16. Proverbaro Esperanta (Zamenhof)	18,00
17. La nigra insulo (Hergé)	16,50
18. Dictionnaire de poche	7,80
19. Gerda malaperis! (Piron)	5,70
20. Ĉu Sabe ustad Esperanto? (Hess)	8,10

William Auld, la realisto

En barko senpilota. Plena originala poemaro. William Auld (1924), redaktis Aldo de' Giorgi. Pizo: Edistudio, 1987. 874 p. 18 cm. Bind. ISBN 88-7036-030-4. 81,00 gld.

*Fragila estas tradicio,
sed grava por la lingvo arta*

Ekzistas libroj, kiuj nanigas la recenzanton, kaj certe ĉi tiu volumo vekas en ni ĉiuj admiron pri ĝia koncepto kaj pri ĝia enhavo. Oni unue rimarku, ke ĝi estas unu el la maloftaj provoj eldoni tutan originalan poemaron de iu aŭtoro, kaj oni devas danki la eldonejon Edistudio pro ĉi tiu laŭdinda entrepreno, kiu promesas fariĝi grava por la Esperanta kulturo. Multaj aliaj klasikuloj (unue Kalocsay, sed ankaŭ Waringhien, Tárkony, Miĥalski kma) meritis tiel kompletan resumon, por savi ilian kontribuon kaj revivigi ĝin ĉe la novaj generacioj. Prave oni komencas la serion per la nomo de William Auld, kies vivdaŭra engaĝiĝo pri la Esperanta tradicio ankaŭ lastatempe produktis la grandiozan duan eldonon de la *Esperanta antologio*. Krome, gravas ke la serio startas per la verkaro de humanisto, kies seninterrompa interesiĝo pri la homo kaj la socio estas kvalito des pli aprecinda en la ofte malkonkrete Esperanta kulturo.

Homon kaj socion Auld rigardas el historia vidpunkto, kaj, kiel ofte okazas ĉe ĝismedolaj progresistoj, pri la historio li montras fundamentan optimismon: la "infana raso" estas ĉeno de individuoj ankoraŭ ĉekomenca, tamen daŭre progresanta al pli bonaj, pli perfektaj, pli raciaj vivmanieroj. Homo estas io, kion oni devas superi, kaj nur tial ni povas ami lin; ni vidas lin kiel ponton al nova, adolta homo, kiu vere kapablos vivi homece. Spuron de tiu fido ni trovas en la simpla fakto, ke la vorton *humaneco* ni uzas laŭ pozitiva senco – tio signifas, ke en la homo ni vidas la burĝonon de hela estonteco, kiu tamen ankoraŭ ne realiĝis, ĉar tro grandaj ankoraŭ estas malamo kaj perforto. En pli nigra momento, Auld nomas la homaron "tuberkolozo de la Ter' ", sed ni preferas kredi lin pli sincera kiam li fidis – aŭ devigas sin al la fido – ke laŭ spontanea evoluo nia raso fine atingos racian kaj feliĉan plenkreskiĝon.

Malgraŭ lia intensa partopreno en la sociaj problemoj, la humuro de Auld restas milda kaj komprenema. Li preferas reagi al maljustaĵoj per indigniĝo kaj ne per satiro; eventuale li proksimas al Hood, kiu (p. 350) "socireformojn . . . postulas per vortlud' " (bela ekzemplo de tiu ĝenro troviĝas en la fama "Laŭ gonoraloj, la milit' necesas . . .", p. 240). Sed li majstras en la ĝenro de humura portreto, kiel en "Anna", unu el la malmultaj Esperantaj poemoj (krom la versaĵoj de Zamenhof), kiuj relative famiĝis inter la esperantistoj. "Anna, diskura kaj enua . . ." lule komenciĝas la poemo, kaj jam la unua frazo, tiel sinbalance longa (de komo al komo, ĝi estingiĝas nur post tri strofoj), enkondukas etoson ameman, teneran kaj patrinecan, kun dolĉa, iom felineca finalo:

*kaj premus kun avid' purpura
vizaĝon inter ŝiaj mamoj,
kusenaj mamoj de matura
graseta spertulin' pri amoj.*

Tian fizikan allogon li tamen ne kredas vera amo: Anna akceptus lin "pro simpatio kaj kompato". La poeto komprenas, ke la patrineca sento estus tro forta, kaj ke tian amon oni neniam povus difini plenkreska. Do, post la momenta silento, dum kiu okazis la implicita deflankiĝo, ili ambaŭ revenas al realo kaj

racio, kaj ridete ankaŭ la leganto revigliĝas, kvazaŭ travivinte ian danĝeron:

*Anna, subite rekonscia,
babilas jam pri nova libro.*

En tiu rekonsciiĝo, en tiu intenca gajeco kuŝas la preciza sento, ke la tempo forfluas, kaj ke ĝi forfluas senfrukte. Ankaŭ en ĉi tiu verko, plej alta humura atingiĝo, Auld ĉiam fidelas al sia kerna, implicita tragiko.

Multajn tipe auldajn temojn oni trovas en lia plej strukturita verko, nome *La infana raso* (LIR). Tio kreis la ĝeneralan impreson, ke LIR estas la ĉefverko de Auld, kiun li neniam poste superis: dubinde, ĉu tiun kritikan aserton oni povas senkondiĉe akcepti, ĉar el pure poezia vidpunkto *Unufingraj melodioj* kaj *Humoroj* entenas verkojn eĉ pli gravajn. Sed ja veras, kion V. Benczik asertas en eseo kiun ĉi tiu volumo inkluzivas: "[LIR] estas verko pretendema, iel ĝi entenas la tuton de ĉio." Do, ĝi ne celas esti iu libro, sed *la* libro, kiel siatempe *La dia komedio*, aŭ *Uliso* de Joyce, aŭ la *Recherche* de Proust. Ĝi entenas tutan metafizikon, kaj la poeto volas pentri en 25 ĉapitroj sian ĝeneralan mondrigardon. Ni povas legi ĝin kiel grandiozan sinprezenton, dum kiu la poeto skizas la temojn kiuj ruĝfadene plektiĝos tra lia vivo; LIR estas metafizika enkonduko al eksterordinara vivoverko.



La originalaj ilustraĵoj de George McIntosh el la dua eldono de La infana raso (Stafeto, 1968).



Auld certe spertas ian metafizikan obsedon, kaj li sentas la devon esplori la "misterojn kernajn de la vivo" (p. 312) per racio kaj intuicio. Sed samtempe li sentas ankaŭ, ke poezio neniam estos taŭga ilo por filozofie argumenti, kaj ke arto celas ne ian rektan komunikadon, sed estetikan priskribon de la mondo. La poeta laboro


*. . . ne estas populara:
siajn figurfadenojn li ne plektas
por tiu, kiu volas nepre klara
kion per vortoj oni nur konjektas.*

Kaj en la sama poemo li ankaŭ elmetas la esencan realismon kaj raciismon de sia poetiko:

Edistudio ... la arto eldoni

LIBROKATALOGO DE LA VERKOJ EN KAJ PRI ESPERANTO

MAJO 1989



ENHAVO

POEZIO	paĝo 2
PROZO	paĝo 3
ANTOLOGIOJ	paĝo 4
TEATRO	paĝo 4
ESEOJ	paĝo 5
KURSOJ	paĝo 5
VORTAROJ	paĝo 5
MUZIKO	paĝo 6
Vendokondiĉoj	paĝo 8
Mendokarto	paĝo 8

POEZIO



Julius Balbin: Imperio de l' koroj,
du poemaroj
ISBN 88-7036-037-1, Edistudio, 1989
240 p., 12 × 21 cm, bindita
19500 it.liroj — 30 nl.gld.

Julius Balbin pasigis preskaŭ tri jarojn en koncentrejoj kaj sklavlaborejoj. Dum tri jaroj li vivadis sub ĉiutaga peza ombro de murdo-danĝero, en intence konstruitaj turmentejoj, kie oni sisteme mizerigis, malsanigis, degradis, humiligis kaj ofte murdis judojn kaj aliajn ofendantojn kontraŭ la obseda rasismo de la nazioj. Duono de lia nuna volumo estas «Damenoj», lia terure potenca akuzo pri naziaj rasismaj kruelaĵoj. Kaj la alia duono estas «Imperio de l' koroj», kies temoj tre varias: troviĝas ankaŭ satiro, pli profunda; Balbin ne hezitis kritiki negativajn aspektojn de tiu lando, Usono, kie finfine li sukcesis fari karieron kaj relative komfortan vivon.

La esenca impresio, kiun la poemaro lasas ĉe ni, estas tre pozitiva: jen libera, sendependa homa spirito, kiu kreas artaĵojn el la malfacila vivo, kaj tiel insiste ekzempligas ion nevenkeblan en la individua homo

Marjorie Boulton (el la «Enkonduko»)

Johán Valano: Malmalice,
originalaj poemoj
LNF/LF, 1977. 59 p., 15 × 21 cm.
9900 it.liroj — 15 nl.gld.

Kolekto ege riĉa laŭ la vario de la temoj kaj formoj, ĝi montras entute freŝan koncepton pri la rimedoj kaj la celoj de la poemarto. Per sia simpla kaj kristala neteco, ĝi ne ambicias iĝi «popolara», sed, pli ĝuste, komprenebla por ĉiuj aŭ almenaŭ por la plimulto el la legontoj.

Henry Vatré

Giuseppe Ungaretti, trad. N. Rossi
La doloro, poemoj (1937-1946)
LNF, 1975, 62 p., 15 × 21 cm.
9900 it.liroj — 15 nl.gld.

Ungaretti (1888-1970) estis unu el la elstaraj poetoj de la nuntempa Italio, kaj unu el la plej konataj ekster sia lando.

Nicolino Rossi preskaŭ ĉiam sukcesis redoni la originalecon kaj geniecon de la itala teksto, almenaŭ kiom ebligis la diferenco inter la du lingvoj.


Gaston Waringhien



William Auld: En barko senpilota,
plena originala poemaro
red. Aldo de' Giorgi
ISBN 88-7036-030-4, Edistudio, 1987
874 p., 17 cm., bindita,
52000 it.liroj — 81 nl.gld.

Ĉiuj originalaj poemoj de nia plej granda vivanta aŭtoro, inkluzive cent-paĝa kolekto de poemoj neniam antaŭe libroforme prezentitaj, enkondukitaj de ses ampleksaj eseoj de elstaraj esperanto-verkistoj: Aldo de' Giorgi, Juan Régulo Pérez, Edwin de Kock, Rejna de Jong, Marjorie Boulton, Henry Vatré.

Notoj kaj antaŭparoloj al la diversaj poemaroj, listo de la verkoj de W. Auld — tradukoj, lernolibroj k.t.p. — kaj esenca bibliografio pri W. Auld kompletigas la dikan volumon, prestiĝe bindita kaj ŝirmita.



William Shakespeare, trad. W. Auld:
The sonnets / La sonetoj
Serio Oriento-Okcidento n-ro 16
Prezento de H. Tonkin
ISBN 88-7036-013-X, Edistudio, 1981
Dulingva, 326 p., 15 × 21 cm., bindita
26000 it.liroj — 40,20 nl.gld.

Unika kolekto de la tuta ciklo da sonetoj de la granda angla verkisto, tradukita de nia granda skota poeto. Ne multaj aliaj lingvoj povas vanti tian tradukon en versoj, tiom respektive de la originalo kaj tiom potence poezian.

La frontpaĝa dulingva prezento ankoraŭ plivalorigas tiun ĉi nemalhaveblan volumon, brila simbolo de la esprimkapablo de la internacia lingvo, fronte ankaŭ al la ĉefverkoj de la monda kulturo.

Aldo de' Giorgi: Pretertempe,
versaĵoj
kun rimportreto de Reto Rossetti, enkonduko de Marjorie Boulton kaj ilustraĵoj de Jean E. Bomford
ISBN 88-7036-015-6, Edistudio, 1982
63 p., 21 × 30 cm., ilustrita, bindita
12000 it.liroj — 18 nl.gld.

La poemoj de Aldo de' Giorgi grandparte naskiĝis el persona tragedio, el amo perdita. Ili do estas komplete subjektivaj. Sed arto objektiva tutsimple ne ekzistas: komitatoj ne kreas poezion.

La poemaro estas elektaĵo el multe pli abunda kolekto verkita de de' Giorgi. Kvankam la ĉeftemo trafadenanta la selektaĵon estas la menciita tragedio, tamen la poeto enplektis ankaŭ plurajn alitemajn, malpli obsedajn, verkojn. Lia gamo estas efektive larĝa, liaj tonoj diversaj.

Al la granda formato kaj bele grandaj preslieroj aldoniĝas multaj tutpaĝaj ilustraĵoj (aŭ dekoracioj, se vi preferas) fare de la brila angla artistino Jean Bomford, kiuj kvazaŭ ĝemele konformiĝas kun la poezia teksto. Maloftaj estas tiel belegaj volumoj sur niaj bretoj, kaj ĝi estas de ĉiuj literatur- kaj art-amantoj posedinda.

William Auld



G.G. Belli, trad. Gaudenzio Pisoni:
Elektitaj sonetoj
CoEdEs, 1982, 65 p., 15 × 21 cm.,
6000 it.liroj — 10,50 nl.gld.

Belli estas la plej fama dialekta poeto de Romo; liaj sonetoj priskribas la ĉiutagan vivon en Romo, ĉefurbo de la Pontifika Ŝtato, komence de la 18-a jarcento. Liaj protagonistoj estas ordinaj popolanoj de Romo, metiistoj, servistoj, soldatoj, ŝtelistoj, putinoj, kaj la temoj tre varias: jen komikaj, jen tragediaj, jen vulgaraj, jen kortuŝaj.

Maurizio Caprile, trad. Mauro Nervi:
Blinda ermito, poem-kolekto
ISBN 88-7036-004-0, Edistudio, 1979
60 p., 15 × 21 cm.,
9900 it.liroj — 15 nl.gld.

Tiu ĉi malgranda poemkolekto estas senmanke aŭtentika prezento de poezia arto en Esperanto. Tion certigas kaj la subtile multifaceta valoro de la originalo, kaj ĝia rekreo, ĝia interpreto fare de Mauro Nervi, kiu ĉi tiun novan verkon transdonas al ni per profunda kompreno, per majstra tekniko. Tiu ĉi debuto de Nervi kiel tradukisto ne malpli brilas ol lia debuto originala per *La Turoj de l' Ĉefurbo*.

Baldur Ragnarsson

PROZO

MANJO AUSTIN INSULO DE REVOJ

NOVELO




Edistudio



Manjo Austin: Insulo de revoj, novelo
Premio EVA-Edistudio 1989
ISBN 88-7036-038-X, Edistudio, 1989
96 p., 15×21 cm.,
18000 it.liroj, 27 nl.gld.

Por la angla sinjorino Tereza, ferioj en Sicilio estas okazo por malkovri la alian duonon de sia personeco, kaj, komplicaj la suno kaj la foresto de la hejma medio, akcepti la ampropojn de belaspekta italo; la idilia etoso de la mediteranea plaĝo lulas afable la mallongdaŭran sed intensa rilato, kiun la reveno en Britujo definitive interrompos.

Per elegante simpla, senenafekta kaj fluanta lingvo la aŭtorino lerte prezentas la lokojn, la karakterojn, la okazaĵojn, donante al ni simplajn kaj agrablajn paĝojn de romantika kaj atentokapta rakonto, kiu gajnis la premion 1989 de EVA-Edistudio por la plej bona manuskripto.



Edistudio



Bernard Golden: Bestoj kaj homoj, noveloj
ISBN 88-7036-035-5, Edistudio, 1986
137 p., 21 cm.,
18000 it.liroj — 27 nl.gld.


Per siaj eseoj, Bernard Golden iĝis mondkonata, sed liaj rakontoj estas same valoraj kaj interesaj. Jen lia dua novelaro, kiu arigas 13 rakontojn pri plej diversaj temoj, intrigoj, mondpartoj, situacioj. Apud amaj, milde eroti-

kecaj noveloj, aperas kelkaj iom detektivstilaj, aliaj kun karaktero didaktike historia aŭ priskribe geografia. Aliaj estas pure fantaziaj.

Grava atuto en la verkoj de Golden estas, laŭ mi, la de li uzata lingvaĵo. Eble nemultaj konas la esperantan leksikonon kiel li, kaj nemultaj certe kapablas muldi kaj kunplekti la vortojn tiel precize, tiel riĉe kaj varie. Sed, malgraŭ tiu abunda vortouzo, Golden restas esence kaj strikte laŭfundamenta.

Temas pri libro facile kaj ĝue legebla por bonaj konantoj de Esperanto aŭ por komentantoj dezirantaj rapide lerni.

Aldo de' Giorgi




Spomenka Štimec
Ombro sur interna pejzaĝo, romano
ISBN 88-7036-019-9, Edistudio, 1984
141 p., 13×21 cm., bindita
16000 it.liroj, 24 nl.gld.

La "ombro sur interna pejzaĝo" de la titolo estas la fino de amrilato. La rakontanto, jugoslavo, kiel la verkistino dum kelkaj jaroj loĝas kun viro el malproksima lando, kiu lasas ŝin pro alia virino. La romano estas sekvo de internaj meditoj (de la rakontanto) kiuj montras ŝiajn pensojn pri la disiĝo kaj pri ŝia rilato kun la alilanda amanto, kaj ankaŭ rakontas la historion de tiu rilato. La malsamaj landoj gravas: tiu romano Esperanta temas pri rilato Esperanta. Ligitaj per komuna lingvo de socia movado, kiu ĉefe pritraktas somerajn renkontiĝojn kaj kulturajn interŝanĝojn, la geamantoj firme tenas la propran kulturon. Loĝante dumtempe en lia lando, ŝi rifuzas ĝian lingvon kaj kutimojn. Verdire, la interna pejzaĝo estas ne nur tiu de ŝia menso, sed ankaŭ de la nestabila interlingva mondo, kie la geamantoj renkontas kaj tuŝas unu la alian. Transiradonte landlimojn — al Hungario serĉante konsolon, al Francio ĉasante postan amanton por malakrigi la doloron pro la perdo de la unua — la rakontanto kondamniĝas loĝi "en la lando de esti sola".

La relativa simpleco de la rakonto, sume kun la malemo ekzameni la kialojn de Jan en la kreo de la disiĝo (aŭ eĉ ŝia ebla kontribuo al tiu disiĝo) faciligas la identiĝon de la leganto kun la rakontanto. Ŝia lingva kapablo, ŝia lertece trovi taŭgan frazon, ŝia atento pri detaloj — tiuj transportas nin en ŝian rakonton. Je la fino de la rakonto, kiam la franca amanto preparas ŝian egoismon, kaj kiel ŝi "uzis" lin, liaj kritikoj surprizis nin apenaŭ malpli ol ŝin.

Humphrey Tonkin



Edistudio

Tibor Sekelj: Mondo de travivaĵoj, rakontoj
ISBN 88-7036-012-1, Edistudio, 1981
286 p., 15×21 cm., ilustrita,
16000 it.liroj — 24 nl.gld.

Mortis pasintjare la rava aŭtoro de tiuj ĉi rakontoj, kiuj trakuras lian tutan vivon de mond-vagulo kiu, kelkfoje en vivdanĝero, dum preskaŭ duonjarcento ĝuis senhejman vagabondecon kaj vizitis strangajn popolojn kaj preskaŭ nekonatajn landojn. "Mondo" enhavas rakontojn pri la tridek plej ekscitaj travivaĵoj de la aŭtoro en kvin kontinentoj. Ĉiu ĉapitro priskribas apartan vojaĝon: de la sanktaj riveroj de Azio oni translokiĝas al la danakila dezerto, de la glacio de Kilimanĝaro al la koro de Aŭstralio, kun laŭdindaj detalaj priskriboj. La stilo estas simpla, inda por ĵusbakitaj esperantistoj, kiuj havas intereson al riskaj aventuroj.



Edistudio

Fulvio Tomizza, trad. P.G. Soranzo
Materada, romano
ISBN 88-7036-017-2, Edistudio, 1983
159 p., 15×21 cm.,
16000 it.liroj, 24 nl.gld.

Inter 1947 kaj 1955 ducentmil homoj forlasis la istrian duoninsulon en Jugoslavio por enmigri Italio. Kial ili decidis elmigri, tion deziras klarigi Fulvio Tomizza en la romano *Materada*, kiu allogas priskribas homojn, morojn kaj pejzaĝon, kaj admirinde agnoskas la kompleksan multflankecon de la eventoj: en la decido elmigri ludas faktoroj personaj, ekonomiaj, sociaj, politikaj, eĉ erotikaj. Eksterordinare forte la romano sentigas historion, ĉar la verkisto scias serĉi ĝin en la konkretaj konsekvencoj sentebaj en la unuopaj vivoj de etuloj. Tiun ĉi potencon romanon inteligente kaj fidele la tradukis Pier Giorgio Soranzo.

ANTOLOGIOJ

***, Aŭstralia Antologio,

redaktis Alan Towsey

Serio Oriento-Okcidento n-ro 24

ISBN 88-7036-036-3, Edistudio, 1988


429 p., 15×21 cm, bindita

49000 it.liroj — 75 nl.gld.

La aŭstralia literaturo, verkita dum du jarcentoj en varianta de la angla lingvo, kiu pli kaj pli diferenciĝas de la dialekto de Oksfordo, estas malmulte konata eĉ en landoj kie oni parolas unu el la anglaj lingvoj, kaj preskaŭ tute ne en aliaj landoj, kun escepto pri kelkaj romanoj. Ĝis nun nur kelkaj tradukoj de noveloj kaj eseoj aperis en esperantaj revuoj, kaj kelkaj kantoj en la bonega antologio de Tibor Sekelj «Elpafu la sagon».

Do la Aŭstralia Esperanto-Asocio, kiu aspiris dum multaj jaroj eldoni antologion, ĝojis kiam Alan Towsey akceptis la komision redakti ĉi tiun volumon. Ĝi estas taŭga aldono al la Serio "Oriento-Okcidento" de UEA-UNESKO, ĉar ĝi prezentas al Esperantistoj la kulturon de tuta kontinento dum ducent jaroj de evoluo ĝis moderna multkultura socio.

Ralph Harry, Prezidanto de AEA



***, Itala Antologio,

redaktis Giordano Azzi

ISBN 88-85872-02-6, CoEdEs, 1987

477 p., 15×21 cm., ilustrita,

35000 it.liroj — 54 nl.gld.

Akuŝo koncipita antaŭ pli ol 50 jaroj ĉi tiu de "Itala Antologio". Estis fakte jam en 1934 ke "Literatura Mondo" planis eldoni ĝin. La dua mondmilito vanigis la projekton. Rezulto de tiu plurjara laboro estas dika eleganta volumo, kies indekso nombras 72 aŭtorojn, tradukitaj

de 29 homoj, inter tiuj elstaraj nomoj, kiel Kalocsay, Waringhien, Tarkony, Vatré, Conterno, Minnaja, Pisoni, Corsetti k.a.

Tiu verko estos impona kontribuo, kaj kro- ma, efika demonstraro pri la senfinaj eblecoj de Esperanto por esprimi, senperde kaj senperfide, la plej altajn pintojn de kulturo. La "Itala Antologio" plej digne kaj reprezente rangos apud la jam ekzistantaj el aliaj nacilingvoj.

Aldo de' Giorgi



TEATRO

Jan Kokto' (Jean Cocteau),

trad. Georgo Lagrang':

La fatomaŝino (*La machine infernale*)
kvarakta teatraĵo


ISBN 88-7036-009-1, Edistudio, 1979

125 p., 15×21 cm.,

9900 it.liroj — 15 nl.gld.

Temas pri la tragedio de Edipo, vaste konata, reskribita de Jan Kokto'. Edipo, filo de Lajo kaj Jokasta, estis kondamnita al la morto, ĉar la dioj diris, ke li mortigos la patron kaj edziĝos al la patrino. Tio devis esti evitota. Sed la fatomaŝino laboris por Edipo kaj fine li vere mortigis la patron kaj edziĝis al Jokasta.

Jean Cocteau estis polimorfa artisto, kies produktado enkalkulas teatraĵojn, filmojn, freskojn ktp. Liaj verkoj — ankaŭ la plej bonaj — parte spegulas lian emon al skandalo kaj al facila paradoksado, kun kuriozaj kaj foje interesaj efektoj pri la uzata lingvaĵo.



Farok Topan, Ebrahim Husein,

trad. Nino Vesela, **Salale !**

du teatraĵoj el la ŝuahila

Antaŭparolo de R. Korseti

ISBN 88-7036-021-0, Edistudio, 1984

175 p., 15×21 cm.,

16000 it.liroj — 24 nl.gld.

Du teatraĵoj de la afrika literaturo, kun atentinda enkonduko de Korseti: "Monda kulturo per monda lingvo".

En la unua teatraĵo, "Gustuminta Paradizon" de Farok Topan, ekzistas konfuzo inter la ĉefanĝeloj; unu homo, kiun la mortanĝelo prenis unu jaron tro frue, estas revivigita kiel kato! Pri tiu, kaj ĉiu, konfuzo kulpas Ibiliso (Satan), kiu fine en monologo konkludas, ke Dio amas lin, ĉar sen li homoj estus nur pupoj.

La dua verko, "Diabloj" de Ebrahim Husein, estas pli komplika; ĝi temas pri rompiĝo de amikeco inter filo de ekspropriigitaj terposedantoj kaj filino de riĉiĝintaj parvenuoj. Oni ofte uzas anglajn vortojn, ŝajne por montri sian edukitecon, same kiel en Eŭropo antaŭ jarcento nefrancoj uzis francajn vortojn.

Carlo Goldoni, trad. Carlo Minnaja

La gastejestrino, (*La locandiera*)

triakta komedio

ISBN 88-7036-014-8, Edistudio, 1981


154 p., 15×21 cm.,

12000 it.liroj — 18 nl.gld.

Carlo Goldoni (1707-1793), estas la plej granda komediverkisto de Italujo, kaj «La Gastejestrino» inter liaj plej konataj verkoj.

La gastejestrino Mirandolina estas bela kaj viveca virino, kiu ŝatas esti admirata, sed ŝi kontraŭstaras ĉiun sieĝon de la viraj gastoj; ŝi sukcesas "pluvivi individue" pere de siaj individuaj kvalitoj kaj ne cedas eĉ al la propono edzinligiĝi al nobelo. Ŝia ĉefa kontraŭrolanto estas la Kavaliro de Ripefratta, kiun, paŝo post paŝo, Mirandolina puŝas al la abismo, en la serioza disvolviĝo de tiu vivproksima komedio.


La traduko de Carlo Minnaja estas lingve elstara, riĉa kaj vigle lerta, kaj ĝi ankaŭ bone taŭgas por inda teatra prezentado de tiu ĉi merite klasika verkaĵo.



ESEOJ

K. Kalocsay, G. Waringhien, R. Bernard Parnasa gvidlibro, Tria eldono reviziita kaj kompletigita de G. Waringhien
ISBN 88-7036-018-0, Edistudio, 1984
208 p., 15×21 cm.,
18000 it.liroj — 27 nl.gld.

Ĝisdatigita eldono de grava studo pri la Esperanta poetiko. Unue la metrikon (ritmon, versojn, strofojn) analizas Waringhien; poste C.E.R. Bumy (=Kalocsay) en longa didaktika sed sprite atentokapta poemo donas valoregajn konsilojn en sia "Arto poetika"; fine Waringhien kaj Bernard liveras ĝisdatan rimvortaron.



Helmut Sonnabend: Esperanto - lerneja eksperimento

Raporto, analizo, konkludo
kajeroj de IPR-1
ISBN 88-7036-005-9, Edistudio, 1979
157 p., 15×21 cm.,
9900 it.liroj — 15 nl.gld.

Ekde 1968 ILEI plane kaj metode esploras kaj studas la eblecojn eksperimente pruvi la taŭgecon de Esperanto kiel ideala dua lingvo por homaj interrilatoj.

La lerneja eksperimento daŭris tri jarojn de 1971 ĝis 1974, kaj partoprenis 30 klasoj. E-senca trajto estis la aldono de paralelaj klasoj, en kiuj estis instruataj aliaj fremdaj lingvoj.

Estis pruvende, ĉu Esperanto sub similaj kondiĉoj kiel por aliaj fremdaj lingvoj, sub normalaj lernejaĵaj cirkonstancoj, havos pli altan lernefikon ol la aliaj instruataj lingvoj.

La libro prezentas la historion de la eksperimento, ĝian didaktikan raporton, analizo de ĝiaj evoluo kaj rezultoj, konkludoj eltireblaj el ĝi. Senkompara dokumento por pruvi la avantaĝojn de lernado de la internacia lingvo.

La Sesdekoka — ĉu decida jaro?

eseoj, red. G. Silfer kaj aliaj
LNF, 1978, 28 p., 21×30 cm., ilustrita,
4500 it.liroj — 6,90 nl.gld.


La kajero, originale celita kiel numero de *Kontakto*, kunigas elektitajn artikolojn pri 1968 — la jaro de la vastiĝinta studenta movado, de la majaj manifestacioj en Francio, de la aŭgustaj eventoj en Ĉeĥoslovakio. La kontribuoj, inter ili ankaŭ intervjuo kun Herbert Marcuse, datiĝas ĉefe el tiu jaro mem; nur du estas pli freŝdataj.

Ulrich Lins



Marinko Ĝivoje: Onimoj,
listo de antonimoj, homonimoj, paronimoj, sinonimoj kaj vortludoj
2-a eld. Enkonduko de I. Szerdahelyi
ISBN 88-7036-007-5, Edistudio, 1979
119 p., 12×17 cm.,
9900 it.liroj — 15 nl.gld.

Temas pri la ĝis nun unusola, kaj tamen plurflanke sukcesa kaj konvinka, provo katalogi la latentajn povojn de Esperanto sur la kampo de vorto-familioj, kaj estas baza dokumento por ĉiu serioza studento de la lingvo. Cetero, la libreto evitas esti nur seka vorto-tabelo, dank' al la karakteriza ironi-sento de la aŭtoro.



Bruno Migliorini: Lingvaj aspektoj de Esperanto, (1924-1963) esoj
ISBN 88-7036-033-9, Edistudio, 1985
96 p., 15×21 cm., bindita,
16000 it.liroj — 24 nl.gld.

La aŭtoro estis la plej prestiĝa kompetentulo pri la itala lingvo kaj pri ĉiuj lingvistikaj problemoj. Sed, verŝajne, nur la esperantistoj scias, ke li estis ankaŭ unu el la unuaj, kaj el la plej grandaj, sciencnivelaĵaj studentoj de la Internacia Lingvo, konvinka pledanto por Esperanto en la internaciaj lingvistikaj rondoj, profunda analizanto de la avantaĝoj de Esperanto en komparo kun la aliaj planlingvaj projektoj.

Tiel la nuna libro, kiu kolektas kelkajn el liaj pritemaj esoj, estas aparte valora, ne nur pro tio, ke tiuj studoj estis jam delonge malfacile retroveblaj, sed ankaŭ ĉar ili, aperas kiel neelĉerpebla fonto de instruoj kaj de plifirmigo en la konvinko pri la nepre scienca valoro de Esperanto, pri ĝia nedubebla venka futuro.

KURSOJ

R. Corsetti, M. La Torre, N. Vessella Lingua Esperanto, Corso di base
ISBN 88-7036-016-4, Edistudio, 1984
302 p., 15×21 cm.,
18000 it.liroj — 27 nl.gld.

Vigla prezento de la lingva materialo per gradigita serio da ekzemploj el normale uzata Esperanto (libroj, revuoj), estas nuntempe la plej kompleta gramatiko de la Internacia Lingvo por itallingvanoj.

A. Menabene, G.F. Barbalace Corso di Esperanto, per gli studenti delle scuole medie e superiori
ISBN 88-7036-006-7, Edistudio, 1979
236 p., 17×24 cm.,
18000 it.liroj — 27 nl.gld.

Verkita laŭ la tradicia lerneja metodo, kun detalaj ekzemploj kaj tradukekzercoj. Ĝi estas taŭga ankaŭ por memlernantoj.

Bruno Migliorini, Manuale di Esperanto
CoEdEs, 1980, 157 pagoj, 21×15 cm.,
7500 it.liroj — 12 nl.gld.

De longa tempo la plej uzata kurso de Esperanto en Italujo, verkita de la fama lingvisto. En malmultaj paĝoj prezentas la lingvon klare kaj ekvilibre.

Z. Tišljär k.a.: Esperanto - manuale della Lingua Internazionale
CoEdEs, 1986, 82 p., 15×21 cm.,
7500 it.liroj — 12 nl.gld.

Itala versio de la internacie konata «Zagreba Metodo» por rapida instruado de la lingvo. Ĝi maksimume eluzas la avantaĝojn de Esperanto, kaj evitas ŝablone kopii la nacilingvajn lernolibrojn de fremdaj lingvoj.

John Wells: Jen nia mondo
CoEdEs, 1974, 58 p., 21×15 cm.
Libro plus 3 kasedoj C60
28000 it.liroj — 43,50 nl.gld.

Moderne konceptita kurso, taŭga por memlernantoj, kaj ripete uzata ĉe radiaj kursoj. Tre altkvalitaj bendoj, miksanteroj, dialogojn kaj gramatikajn klarigojn helpas la lernanton tre plaĉe "promeni" tra la bele ilustrita akompana libreto.

VORTAROJ

Umberto Broccatelli Vocabolario esperanto-italiano
CoEdEs, 1984, 498 p., 21×15 cm.
35000 it.liroj — 57 nl.gld.


Plaĉe kaj klare presita, forte broŝurita, tiu ĉi vortaro estas bazita sur PIV, kiel "verko aŭtoritata". Tiel la signoj kiuj distingas kapvortojn kaj nuancoj estas numeritaj laŭeble kiel en PIV. Adopto al nacia lingvo kunportas, ke difinoj ne ĉiam necesas, tiel oni gajnas spacon, utilan kiam oni tamen volas difini. Jen itala PIV, ĉiel laŭdinda. Ĝi staros apud PIV sur miaj bretoj.

D.B. Gregor

MUZIKO

Edistudio prezentas al vi la plej grandan muzikan sortimenton de la Esperanto-movado: 10 kasedojn da moderna muziko, ĉiu kun sia teksto-libro aŭ -kajero por plej bone sekvi la kanzonojn.

Ĉiuj kasedoj estas surbendigitaj en profesiaj studioj, kun stereofona tekniko, por plej bona ĝuo de la muzikoj.




Georgo Handzlik Vivu Esperantujo

Edistudio, 1989, kun teksto-kajero
ISBN 88-7036-039-8
14000 it.liroj — 21 nl.gld.

El Pollando, la patrujo de Esperanto, venas al ni la notoj de Georgo Handzlik, poeto, tradukisto, dramverkisto, kiu de pli ol dek jaroj vadas tra esperantaj scenejoj. Liaj kantoj rakontas pri homoj en malsimplaj situacioj, pri vojoj kaj misvojoj de nuntempo. Fojfoje ili estas lirikaj baladoj, fojfoje batalkantoj. Ĉio plektiĝas kun verda humoro kaj primoko de ne ĉiam plej noblaj trajtoj de Esperantujo. Plej ofte li mem verkas siajn tekstojn kaj melodiojn, sed li ankaŭ tradukas ŝatatajn poetojn: Petöfi, Okudĵava, Gałczyński. Neniam li kantas pri nenio. Liaj kantoj rakontas pri amo, perforto, rido aŭ larmoj. Kun sia simpla, iom raŭkeska voĉo kaj propra gitarakompano li estas la plej bona plenumanto de siaj kantoj. Ĝisnunaj multfojaj prezentadoj (inkluzive la U.K. en Varsovio) ĉiam akiris varman aplaŭdon de la aŭskultantoj.

Flanko A: domo • kongres' • soldato el papero • vespere, vespere... • je sano de avinjo! • kanto pri malnovaj amikoj

Flanko B: • vivu esperantujo • se viro, estu viro... • esperantisto ekesto kaj malapero • fabelo pri rata reĝo • balado pri titanik • ĝis reviso • por vi mi volis



Jak Le Puil Dangera ul'

Edistudio, 1980, kun teksto-kajero
14000 it.liroj — 21 nl.gld.

La unua el la kolektoj de la pariza kanzonisto Ĵak Le Puil, kiu kantas sian kritikan perceptron de la mondo, foje per propraj muzikoj, foje per tradukoj de francaj kanzonoj, kelkaj tre famaj.

Flanko A: danco-kanzono • homa vivo • vilaĝano • prizonoj • tion neniam vidis mi • la dizertonto.

Flanko B: paraŝutisto • dangera ul' • leteroj • kion vi lernis en lernejo? • botel' da vin'



Jak Le Puil Revenas mi

Edistudio, 1982, kun teksto-kajero
14000 it.liroj — 21 nl.gld.

En la dua kolekto Ĵak Le Puil daŭrigas siajn temojn, nun kun pli oftaj koncedoj al jen romantikaj («revenas mi»), jen «verdecaj» temoj («la kongresurboj»). Ĉiuj pecoj atestas pri la alta profesia nivelo de nia kanzonisto.

Flanko A (tradukitaj): revenas mi • la rekruto • lili • ĉio for • ekkiam venos am' sur ter'

Flanko B (originalaj): versaĵo sen fino • sopiro • por vi, por vi • hazarde • kongresurboj


Jak Le Puil De pont-Aven al Varsovi'

Edistudio, 1985, kun teksto-kajero
14000 it.liroj — 21 nl.gld.

Per krescendo en la instrumenta akompano, de la popola medio de la mar-urbeto Pont-Aven al la pompaj remparoj de Varsovio prikskribitaj en la kanzono de Ĵak Brel, Ĵak Le Puil akompanas nin en vojaĝon tra emocie muzika mondo.

Flanko A: pont-aven • matenmanĝo • la montaro • gejo • esperanto

Flanko B: kiom malfacilas al am' • la konscienco • dum televida nefunkci' • la sorĉa ŝalo • la rempar' de varsovi'



Suzana Per nia nura vol'

Edistudio, 1985, kun teksto-kajero
2a eldono
14000 it.liroj — 21 nl.gld.


De jarcentoj virinoj batalas pro siaj rajtoj, sed ili ankoraŭ ne atingis sian celon: egalecon kun viroj. «Per nia nura vol'» kantas tiun ĉi longan lukton kontraŭ subpremo, kiu daŭras jam de tro longa tempo.

Suzana, kiu prezentis plurajn recitalojn ankaŭ dum Universalaj Kongresoj, vestas la kanzonojn per sia ampleksa kaj zorge uzata voĉo.

Flanko A: ol duono • la viroj • monaĥino • balado pri ana brenan • kvankam ni virinas

Flanko B: lulas panjo • mariŝa • manjo • ni jam enuis • en ĉi-arbaro





Ĝanfranko La vojo

Edistudio, 1979, kun teksto-libro
3a eldono, 14000 it.liroj — 21 nl.gld.

Jam klasika estas tiu ĉi kolekto, kies tekstoj troviĝas en la plej furoraj «kantaretoj» de la movado. La varma voĉo de Ĝanfranko kompletigas muzikojn neforgeseblajn kaj tekstojn zorge elektitajn.

Flanko A: verda ĉapo • samtempaj sezonoj • franca majo • la milito de pjero • iu diras jes, iu diras ne • Córdoba • novembra spleno • 70.000

Flanko B: ŝpinu la lanon • ja ni venkos • vjetnama patrino • ludoviko • la ŝipestro de morogoro • la vojo • por paco



Ĝanfranko Kontakto

Edistudio, 1979, kun teksto-libro
14000 it.liroj — 21 nl.gld.

Saĝo estas scii ridi pri si mem, kaj la Internacia Lingvo ĉi tie montras sian kapablon moki siajn proprajn misvirtojn.

Flanko A: • duonvoĉe • ni zipus • la espero-blus' • la movado • kontakto • la tojvo

Flanko B: • printempa kanzono • hamburgen • tiuj kiuj • renkonto

Ĝanfranko, Gido, Marĉela Baf !


Edistudio, 1985, kun teksto-kajero
14000 it.liroj — 21 nl.gld.

Fabrizio De Andrè, Francesco De Gregori, Francesco Guccini, Hannes Wader estas la aŭtoroj de tiuj ĉi kanzonoj.

Gido Brandenburg, Marĉela Fasani kaj Ĝanfranko Molle estas la voĉoj kiuj, alterne, kantas tiun ĉi ravan elekton de altvaloraj muzikoj kaj tekstoj. La rezulto estas juvelaro de nuntempa muziko.

Flanko A: jam morgaŭ • anorako • tro valoras por mi • mia patro jen ulo normala • mi vojaĝas al la sudo • rimini

Flanko B: jam estas la hor' • renkontiĝo • maljunulo kaj infano • foriris vere longa temp' • send-krik • kokain'



Marĉela Venos liber'

Edistudio, 1979, kun teksto-kajero
14000 it.liroj — 21 nl.gld.

Tre modulita voĉo, tiu de Marĉela, kiu interpretas kanzonojn de la lingvaj malplimultoj de Hispanujo: galegaj, vaskaj kaj katalunaj pecoj dancas ĉirkaŭ ni per siaj doloraj popolaj temoj.

Flanko A: • jukas mia haŭt' • rapide, knab' • venos liber' • birdeca bird' • ni amas la tutan mondon • orfino

Flanko B: • eliras la eŭska al sun' • novembro 72a • la paliso • maŭrisi • la valizo • gete



Ĝanfranko, Ĝuljo Horo de opozicio

Edistudio, 1979, kun teksto-kajero,
14000 it.liroj — 21 nl.gld.

La luktoj por libereco en la mondo produktis ankaŭ tre belajn muzikojn, kelkaj el kiuj neforgeseblaj. Jen elekto da tiaj.

Flanko A: • grandula, urbeto bruna • ĉasado de ĥimero • al vi, lugan', adiaŭ • ne atendu bonan onton! • ja ni venkos • ĝis revido gerilestro ĉe-gevara • pablo • kie flankas vi?

Flanko B: • tiu ul' (kamarado gramŝi) • ĉe l' vilaĝet' kĵot-subran' • balado pri pineli • la rajto je la viv' en pac' • balado pri ulo • malliberejo • usonaj armeaj bazoj

Ne maltrafu niajn venontajn eldonaĵojn

Same kiel lakto kaj ovoj, la libroj kaj la kasedoj estas pli agrablaj kiam ili estas freŝaj. Eblas ricevi la eldonaĵojn de Edistudio tuj post ilia apero per aparta aranĝo kiu nomiĝas «Daŭra Mendo».


La daŭra mendo povas rilati ĉu al unuopa ekzemplero de ĉiu nova eldonaĵo, ĉu al pluraj ekzempleroj (por libroservoj): ĉiukaze vi tuj ricevos la libron post ĝia apero, eĉ pli frue ol ĝin mencias la revuoj, kaj krome ĝuos apartan rabaton sur la normala vendo-prezo.

Eblas peti "daŭran mendon" de nur unu aŭ kelkaj kategorioj de eldonaĵoj: ekzemple nur de la beletro, aŭ nur de la muziko, laŭ la propraj interesoj.

La pago okazos ĉiukaze post la ricevo de la libroj, kaj vi rajtos kiam ajn rezigni pri la daŭra mendo kaj ĝin nuligi.

Se vi estas interesita pri tiu ĉi oferto, bonvolu skribi al ni por ricevi pli detalajn informojn.

Kaj skribante, profitu la okazon mendi tiujn niajn librojn, kiujn vi ankoraŭ ne posedas, uzante la mendokarton kiun vi trovos sur la lasta paĝo.



La instalaĵoj de Edistudio: la fotokompostilo kaj la elektronaj videoenpaĝigiloj.

kvanto	MENDO	prezo (it. liroj)	sumo
.....	Auld: En barko senpilota (plena poezia verkaro)	NB 52.000	
	Balbin: Imperio de l' koroj	NB 19.500	
	Belli (Pisoni): Elektitaj Sonetoj	6.000	
	Caprile (Nervi): Blinda ermito	★ 9.900	
	De' Giorgi: Pretertempe	B 12.000	
	Shakespeare (Auld): The Sonnets / La Sonetoj	B 26.000	
	Ungaretti (Rossi): La doloro	★ 9.900	
	Valano: Malmalice	★ 9.900	
	Austin: Insulo de revoj	N 19.500	
	Golden: Bestoj kaj homoj	N 18.000	
	Sekelj: Mondo de travivaĵoj	★ 16.000	
	Ŝtimec: Ombro sur interna pejzaĝo	B 16.000	
	Tomizza (Soranzo): Materada	16.000	
	Azzi (red.): Itala antologio	N 29.000	
	Towsen (red.): Aŭstralia antologio	NB 49.000	
	Cocteau (Lagrange): La fatomaŝino	9.900	
.....	Goldoni (Minnaja C.): La gastejestrino	12.000	
	Topan, Husein (Vessella, Corsetti): Salale!	16.000	
	Ĝivoje: (Esperanto)nimoj	9.900	
	Kalocsay, Waringhien, Bernard: Parnasa gvidlibro	18.000	
	Migliorini B.: Lingvaj aspektoj de Esperanto	B 16.000	
	Silfer (red.): La 68-a — ĉu decida jaro?	4.500	
	Sonnabend: Esperanto - lerneja eksperimento	9.900	
	Corsetti k.a.: Esperanto - Corso di base	18.000	
	Menabene, Barbalace: Corso di Esperanto	18.000	
	Migliorini B.: Manuale di Esperanto	7.500	
	Tiŝljär: Esperanto - manuale della lingua internazionale	7.500	
	Wells: Jen Nia Mondo	26.000	
	Broccatelli: Vocabolario esperanto-italiano	35.000	
	Ĝanfranko: La vojo (kasedo kun tekstoj)	14.000	
	Ĝanfranko: Kontakto (kasedo kun tekstoj)	14.000	
	Ĝanfranko, Gido, Marcĉela: Baf ! (kasedo kun tekstoj)	14.000	
	Ĝanfranko, Ĝuljo: Horo da opozicio (kasedo kun tekstoj)	14.000	
	Handzlik: Vivu Esperantujo (kasedo kun tekstoj)	N 14.000	
	Le Puil: Danĝera ul' (kasedo kun tekstoj)	14.000	
	Le Puil: Revenas mi (kasedo kun tekstoj)	14.000	
	Le Puil: De pont-Aven al Varsovi' (kasedo kun tekstoj)	14.000	
	Marcĉela: Venos liber' (kasedo kun tekstoj)	14.000	
.....	Suzana: Per nia nura vol' (kasedo kun tekstoj)	14.000	
	N - Novaĵo; B - Bindita; ★ - Elĉerpiĝanta volumo	sumo	

Tiu ĉi katalogo inkluzivas nur la eldonaĵon en Esperanto de Edistudio, La Nuova Frontiera kaj CoEdEs, kiujn Edistudio ekskluzive distribuas eksterlanden. Pri ceteraj eldonaĵoj bv. vin turni al vialanda libroservo. I-taloj trovos niajn eldonaĵojn (je la samaj prezoj kaj samaj vend-kondiĉoj) ĉe la Libroservo de CoEdEs, via Villoresi 38, 20143 Milano, tf. 02/8350857, pĉk 13647201. Alilandanoj povas mendi niajn eldonaĵojn rekte ĉe ni aŭ, kun iom malsamaj vendokondiĉoj, ĉe UEA (la prezoj en gld. de ties libroservo estas indikataj en tiu ĉi libro-katalogo), aŭ ĉe sialanda libroservo.

VENDOKONDIĈOJ

- Prezoj:** jam enhavas ĉiujn necesajn impostojn.
- Rabato:** 33%-a por mendoj de almenaŭ tri ekzempleroj de la sama titolo.
- Sendokostoj:** se vi pagas la librojn samtempe kun la mendo, vi ne devas aldoni sendokostojn. Se vi pagos ilin post la alveno, via fakturo ankaŭ enhavos 10%-an sumon pro administraj kaj ekspedaj kostoj.

- Pagmanieroj:**
1. Per ĝiro al nia poŝtĉekkonto 12230561 "Edistudio", poŝtoŭicejo Romo.
 2. Per internacia poŝtmandato.
 3. Per ĝiro al nia bank-konto 220-00 "Edistudio" ĉe «Cassa di Risparmio di Firenze - Agenzia di Pisa» aŭ 241-05207 "Edistudio" ĉe «Cassa di Risparmio di Pisa - Agenzia 4». (*)
 4. Per internacia ĉeko. (*)
- En ĉiu kazo indiku vian nomon kaj la numeron de la fakturo, aŭ menciu la mendon.
- (*) Pagante per manieroj 3. aŭ 4. bonvolu nepre aldoni 4.000 lirojn pro la bank-kostoj, kiujn la banko deprenas.

TIUN ĈI KATALOGON NI DISTRIBUAS SENPAGE: se vi kornas interesulojn, bonvolu indiki al ni iliajn adresojn, kaj ni ĝin sendos al ili. Vi ankaŭ pvas peti de ni laŭbezonan stokon da ekzempleroj.

Edistudio, c.p. 213, I-56100 Pisa, Italujo
telefono +39-50-48670 - telekopiilo +39-50-500585
pĉk. 12230561 Romo

UZU TIUN ĈI MENDOKARTON

*Malnova penso estas senvalora
sen nova kaj rivela lumofeto,
kaj intelekto akra kaj esplora
utilas pli ol koro al poeto.*

“Generas arton malkontento . . .” (p. 493): sed ankaŭ atentemo, realismo, kaj la kapablo indigniĝi. Auld apartenas al tiu poeta familio, kies lingvan forton inspiras aparta sentivo pri la sociaj problemoj, kaj la deziro, ke malaperu la netolereblaj maljustaĵoj, ke oni senmaskigu ĉiuspecajn hipokritaĵojn. En tiu multnombra spirita familio ni trovas la nomojn de Juvenalo kaj Dante, de Heine kaj Brecht. Kiel tiuj granduloj, Auld sentas, ke tamen plorejo kaj sentimentalismo plej maltrafe volas solvi la problemon; ke finfine, ili estas instrumentoj de la konservativismo, kaj tial li kompletigas sian formulon per: “. . . do, ne sopiru ni pri molo.” Ĝuste en la *Rimletoj* la realismo de Auld elmergiĝas plej evidente kaj eksplicite, foje eĉ iom brutale. Tie la temaro varias de metafiziko ĝis la klerisma opinio pri la graveco de edukado (p. 565); la poemoj en tiu kolekto estas verŝajne la plej maldensaj el poezia vidpunkto, sed ankaŭ la plej eksplicitaj pri la auldaj idearo kaj pensmaniero. Kio tie evidentas, tion oni devas eltrovi en la rafinitaj formoj de la ceteraj verkoj; kaj ĝenerale oni devas admiri la precizecon de la auldaj esprimoj, kaj ilian metaforan taŭgecon eĉ en la simplaj komparoj. Kiam li indigniĝas ĉar anglaj lordoj ŝtelis grundon al kamparanoj por krei ĉasbienon, tio venas al lia buŝo tiel:



*. . . ĉar anglaj lordoj vin elpremis
el viaj ruraj domoj
kiel kernetojn el citronoj . . .* (p. 205)

Kaj kiam “Kapitalismo venkis en Britujo”, li fajre priskribas la “rabobestojn grasajn”, sed poste, preskaŭ flustre, li rakontas la simplajn gestojn de la venkitoj:

*sed ie-tie homoj rememoras . . .
Avino en angulo softe ploras,
tro zorge vir’ bruligas cigaredon . . .* (p. 649)

Kaj la bildo de tiu viro, kiu tiom senespere bruligis sian cigaredon en 1951, ankoraŭ vivas en la hodiaŭa leganto, kiu bone scias ke en la nuna Britio kapitalismo estas pli forta ol iam

ajn antaŭe. “Ne venkas amo, kaj la mondon ne heredos / la malfortuloj” (p. 473). Kontraŭ ĉia memtrompiĝo la voĉo de Auld noble kaj senhezite leviĝas. En “Festeno” (p. 405) li trovas mirindan esprimon por difini la ĉiutagan rutinon:

*Anima grizo, langoj raspaj, ruktoj,
pafado de enu-kartoĉoj,
kaj kunekzisto senpripensa . . .*

Senpripense homoj vivas unu apud la alia, kaj la fizika proksimeco en la modernaj urboj ŝajne faciligis la kompletan fremdiĝon; niaj urboj ebligis tute novan formon de malespero kaj soleco, kiun la antikvuloj ne konis, kaj pri kiu la moderna kulturo unufoje konsciiĝis en la verkoj de Poe kaj Baudelaire. Ja bodlerece versas Auld en “La urbo de mia animo” (p. 408), kiu metrikvarie donacas al ni ĉi tiun majstran priskribon:

*Kaj tamen bruletas fajro en iu frida
ventbalaata korto tra kiu singultas
ĵurnalĉifonoj, kaj flava neĝo sepultas
falintajn brikojn en sia sino sordida.*

Kaj en la poemo “Nokte” (p. 207), la homan vivon en la urboj li komparas al la formika, “sur ambaŭ bordoj de l’ river’ olea”; dum malproksime “obtuzaj tramoj trenas lumovoston”, jen “formikohomoj pugnas, ronkas, brulas / en la etaĝodomoj . . .” Auld volas fariĝi voĉo por tiu “animobando mute vea”, kies doloro senspure malaperos en la forfluo de la historio. Kaj tiun anonimecon li sentas pli forta en la urbaj uzinoj ol en la ruraj vilaĝoj, kie finfine homo ankoraŭ estas homo. Ne temas pri idealo asketa (“Baldaŭ tudas min vivo en sol’,” li diras aliloke, p. 437), sed pri simpla amo al aŭtentike homa interrilato. Homo ĉiam restas nemalhavebla; en LIR li foje imagas mondon senhoman, kaj tuj sentas la neceson aserti ĝian neekziston:

*kaj lagoj lekas frapete la ombrajn bordojn
kaj ne ekzistas se mankas oreloj homaj . . .* (p. 252)

Kaj, paralele al tiuj du versoj, ni legas pli poste:

*. . . kaj preter tio, preter tio,
galaksio, galaksio,
kie dio?
Mankas. (p. 295)*

Do, en la aulda filozofio, homo, kaj ne Dio, estas nepre necesa por la pluekzisto de la mondo; homo estas la senmova motoro de la universo. Rimarku la majstran mallongigon de la versoj, ĝis tiu nuda trokeo (“Mankas”), kies vortumo nepre haltigas la poemon, kvazaŭ en angorplena vakuo. Tiom intensan ligo de sento kaj ritmo la Esperanta poezio ne plu havis de post Miĥalski. Kune kun la rusa poeto, Auld estas unu el la grandaj majstroj de la Esperanta formo, kaj facile oni konstatas, ke en multaj momentoj la proksimeco kun Miĥalski plej eksplicite kaj impone manifestiĝas. Temas pri la momentoj kiam la “korvo de la grako noktas”, en la mallumo kaj la malespero. Kiel ekzemplo sufiĉu la “Andante” kaj la “Adaĝo” en *Unufingraj melodioj*, kiuj tiom miĥalskece uzas vortojn (*MORT* kaj *VIV*) kiel finajn agordojn; aŭ la urbo “sub verda lun’ dormanta” (p. 392); aŭ en *Humoroj* la nekonceptebla luno, kiu pendas “cisnube”; kaj, kompreneble, multaj aliaj versoj. Ĉi tie oni devas substreki, ke la citita poemo “Adaĝo” en *Unufingraj melodioj* estas granda majstroverko. En ĝi la aulda lingvaĵo atingas suverenan muzikecon; tiom plena alproprigo de la Esperanta ritmo pensigas pri la vortoj de Pater, kiu opiniis ke “ĉiuj artoj strebas al muziko, kiu estas nura formo.” Sed nura formo “Adaĝo” ja ne estas, ĉar nokto ligiĝas en ĝi al la ideo de nekonscio, kaj ĉi-lasto al medito pri iluzio, finfine sopirata (“se liaj songoj lante iĝos koŝmaroj, nin ne koncernas tio hodiaŭ

vespere”) sed ja neatingebla por la aulda naturo, kies senelira realismo estas saviĝo kaj kondamno samtempe.

“Mi estas fremda al pasintaj mioj . . . Ne trafas min kutimaj nostalgioj” (p. 706). Tia konfeso sonas neordinara en poeto; ĉar memoro kaj nostalgio ŝajnas plej gravaj fontoj de intensaj, “poeziecaj” sentoj por ĉiu homo. Sed ankaŭ en tio Auld originalas: lia poezio estas esence, profunde mallirika. Li ne perdiĝas en nebula mempsikologio; misteron kaj hermetikan sinesprimon li ne toleras en siaj versoj; eĉ lian metafizikon akompanas scienca malvarmo, kiun pliintensigas, en famega kaj eksterordinara poemo, la manko de la “tro homaj” interpunkciaj signoj:

*ju alten oni soras des glacie
opresas la aero nigre rara . . .* (p. 309)

Tiel poezio pli kaj pli similas al robota vortumado, al komputila seninterrompa informo, kiu strange kaj korŝire kontrastas kun la pura muzikeco de la vortoj, de la frazoj kaj de la konceptoj. Tiel la ŝajne senemocia vortofluo fine informas nin, ke en tiuj poeziaj altoj

*vokas animo al anim' parenca
pli diste disaj ol du fridaj steloj . . .*

Do: formo servas la koncepton, kaj ne inverse; la poemo koncernas la eksteran mondon, la socian interrilaton, kaj ne la poeton. Foje Auld majstre ironias pri alies sentimentalito: tiel en “Printemposojle” (p. 446), kiun li tre lirikeme komencas (“Ornaton sian tajlis aŭror’ el silko ora . . .”) kaj daŭrigas dum tri buntaj kaj delikataj kvarversoj, sed kiun li oreŝire finas per la drastaj vortoj:

*Sed mia kor’ sardona mokas je primaveroj:
rebatumas la himero de l’ idiot-esperoj!*

– kaj la tuta antaŭa priskribo subite riveligas kiel akra blago. Auld konscias, ke la ĉiutaga vivo estas io seka, kaj lia poezio emas redoni la krudan mekanismon; foje ankaŭ lia stilo kohere imitas tiun mankon de eksteraj ornamoj, kaj ĉi-sence ekstremisma ekzemplo estas “Mankas krotaloj” (p. 438), en kiu Auld preskaŭ prozece satiras pri la bestigo en la socia vivo. Sed pli ofte li preferas utiligi sian majstran posedon de la poeziaj artifiko por priskribi mallirikan objekton, kia estas industrio por ŝipkonstruado en Glasgovo:

*. . . kaj cikoniarganoj svingas lante
kapojn longbekajn en aero plenda
kvazaŭ fiŝetojn en river’ serĉante.
La teron skuas bruo orelfenda,
dum homoj nigraj sur la monstro svarmas,
tegante ĝin per karapaco blenda . . .* (p. 651)

Vidu do: poezio kaj vero, laŭ la goeta formulo, kaj kvankam li malakceptas la printempajn idiotaĵojn de diletantaj lirikistoj, lia “kor’ sardona” tamen respektive kliniĝas antaŭ la ĉiutaga laciĝo de la laboristoj. Ni havas ĉi tie grandan lecionon pri realismo kaj pri la fundamentaj principoj de poezio.

Konklude, kaj pli eksplicite: William Auld estas pinto de la Esperanta literaturo, kaj unu el niaj malmultaj realismaj aŭtoroj. La unuvoluma apero de lia originala poemaro estas profitenda okazo por paŝi al “plena posedo”, ne nur de la lingvo, sed ankaŭ de pli matura – kaj ne diletanta – ideo pri poezio; en ĝi la homa ĉiutago viviĝas sub la lumo de la poeta rigardo, kaj poezio mem moviĝas en regionoj kie, laŭ tipe aulda kontrasto,

furioze fajfas la vento sub klara ĉielo.

Mauro Nervi (Italio)

REAGO

Ne fanfaroni – ne bagateligi!

Kun ega surprizo, sed ankaŭ kun konsterno, mi legis la artikolon de Aleksandr Fjodorov, en la pasinta julia-aŭgusta numero de la revuo.

Malofte mi vidis kune tioman abundon da aprioraj juĝoj, senbazaj deklaroj, paralogikaj rezonadoj kaj iluziaj proponoj, tamen ĉio lerte kamuflita per scienceco, objektiva analizado, kaj pragmataj diagnozo kaj recepto.

Fjodorov startas per nepre defetismaj, seniluziigaj konstatoj koncerne nian movadon ĝenerale kaj nian literaturon aparte. Apogante sin sur la asertoj de kelkaj elstaraj engaĝitoj (Symoens, Ragnarsson, Leyk, Tišljär, Silfer, Benczik, Lagrange), li skizas nigran panoramon pri la aktuala situacio de Esperanto en la mondo. Li elpafas frazojn kiel: “Mucida atmosfero”, “struta konduto”, “la praktika efiko mizeras, nulas”, “tradicia servutismo” ktp ktp. Li substrekas aliulajn asertojn, kiuj konfirmas liajn ege pesimismajn analizojn. “Ni facile fanfaronas pri sukcesoj, kiuj estas nur guto en la maro” (Symoens), “Nia poezio neniel samvaloras kun la nacilingvaj poezioj, se ni konsideras la kvanton de bonaj poemoj jare aperantaj” (Benczik), “La esperantistoj kutime malfruas unu aŭ du generaciojn rilate la tutmondan literaturon” (Lagrange), ktp.



La aŭtoro vervas ĉe junulara kunsido en la roterdama UK.

La supraj asertoj estas grandparte veraj (bedaŭrinde) sed nur relative, ĉar, antaŭ ol starigi komparojn kaj juĝojn, oni devus enkadrigi la terminojn en ĝustajn, koherajn proporciojn. Matematiko nin instruas, ke komparoj povas esti farataj *nur inter homogenaj faktoroj*. Do, ĉu ĝustas kompari la Esperantan literaturon kun iu ajn nacia? Mi kredas ke ne. Kaj ni vidu kial.

Kiu ajn explorebla kaj juĝebla nacilingva literaturo povas kalkuli kaj mezuri siajn nombrojn kaj kvalitojn sur *miliono* da potencialaj legantoj. Etnoj kun nur kelkcentmiloj (aŭ eĉ kelkdekcentmiloj) da parolantoj apenaŭ povas esprimi, sed nepre ne diskonigi, propran, aŭtonoman kaj atentindan literaturon.

Do, antaŭ ol starigi komparojn, ni devus respondi la eternan demandon: kiom da esperantistoj ekzistas en la mondo? Aŭ, pli ĝuste: kiom da homoj scias legi kaj paroli Esperanton? Kiom posedas sufiĉan konon kaj spiritan predispozicion por apreci (kaj eventuale produkti) internacilingvan literaturon?

Kiel sciante, al tiuj demandoj oni respondis per la plej diversaj, ofte fantaziaj kaj neverŝajnaj ciferoj.

Persone mi faris mian propran studon. Kaj jen la rezultoj.

Antaŭ kelkaj jaroj, en Italio, ni faris skriban enketon por koni la juĝojn kaj dezirojn de la legantoj pri nia nacia revuo. El tiu enketo (kaj el mia dekjara sperto kiel redaktoro) rezultis ke, el ĉ. 1500 asociaj membroj, maksimume 40-50 homoj regule legas la revuon (3%). Mi taksas, ke tiu procento nemulte varias ankaŭ en aliaj landoj.

Ni vidu alian hipotezon. UEA havas ĉ. 40 000 asociajn membrojn. Mi povas konjekti ke, en la mondo, la esperantistoj estas almenaŭ kvaroble pli multaj, do ĉ. 160 000. (Mi certas, ke tiu cifero estas kredinda. Kaj tiuj, kiuj skandaliĝas, indiku al mi kie estas la aliaj milionoj!) Kaj ni konsideru ankaŭ ke, ĝenerale, almenaŭ triono de la anoj de kiu ajn asocio konsistas el familianoj aŭ ĵusaj aliĝintoj (komencantoj, kiuj regule anstataŭas la forlasintojn).

Sed, je ĉi tiu punkto, revenas la antaŭa demando: kiom el tiuj "verduloj" funde scias Esperanton? Kiom emas aŭ povas aboni gazeton kaj profite legi beletraĵojn? Se iom valoras la rezultoj kaj nombroj de la enketo pri la legantoj de nia itala revuo, kaj se oni povas starigi paralelon, la legkapablaj, literaturemaj esperantistoj en la mondo ne superas 10 000 (ekzakte 5 333, laŭproportio).

Tenante en konsidero la suprajn premisojn, ni revenu al Fjodorov. Post la komencaj, kapitulacpuŝaj deklaroj, li abrupte kaj surprize ŝanĝas centokdek-grade sian vidpunkton kaj, fine, malkaŝas sian celon. Li diras: "La Esperanta komunumo havas kolosajn potencojn kaj avantaĝojn kompare al iuj ajn naciaj kulturportantoj, kaj la Esperanta kulturo havas ĉion por fariĝi avangardo kulturoporta en monda skalo." Poste li iom nebule klopodas ekspliki sian savrecepton. Li alpaŝas per la kutima, ŝablona refreno (nenio nova sub la suno!): "nia komunumo bezonas novajn integrajn fortojn (valorojn, kvalitojn)..." Kaj li pafas la solvrimedon. Jen la panaceo: kreado! Li asertas: "La plej grava kaj dinamika faktoro de kulturo estas kreado." Kaj: "Kion unu intelekto aprecas en alia, estas antaŭ ĉio la eksplodo de nova ideo." Do, necesas "elformiĝo de komunumo, konsistanta el kreantoj".

Jen, simple kaj klare, ĉu ne?

Fjodorov, lamentante troan mozaikecon kaj fragmentecon de nia literaturo (kiu literaturo ne estas mozaika, fragmenta? laŭ mi la Esperanta malpli ol aliaj), aŭspicias la elkreon de novtipa, revolucie avangarda literatura revuo, kiu estu gvido, modelo, stimulo, homogenigilo, kiu devus "eferveski" pri "artologio, psikologio de krea agado, vivstrategio de krea persono, tradukologio, fonduso de novaj ideoj... kaj... kaj..."

Kaj jen, je la fino, riveligas la fablomoralo: sinjoro Aleksandr Fjodorov estas ĝuste redaktoro de la revuo *Literatura skatolo*, kiu prezentiĝas laŭt-trumpete, pere de (aparte publikigita) fiera kaj zenitpretenda proklamo, subskribita de iu "Unuiĝo por Nova Internacia Kulturo".

Nun la ludo estas klara: ni frontas novspecan (sed tre similan) Raŭmismon, kiu estas ĉi-kaze rigardata el vidpunkto de homo vivanta en socio, kiu "trudas al la socianoj denaske programitajn rolojn, ... kreante barojn, limojn por manifestiĝo de ĉiuj esence kreaĵoj fortoj ..." (Kial venas al mi en la menson Pasternak, Solĵenitsin, Brodski?)

Se tiel estas, mi tre skeptikas. Evidente tiuj bombastaj deklaroj, tiuj eble sinceraj sed funde nerealismaj perspektivoj fontas el neinformiteco (kaj misinformiteco) pri la realaj konsisto kaj situacio de nia movado ĝenerale. Neinformiteco tre probable ŝuldata al la "izoliteco" priplendata de la aŭtoro.

Kaj tio revenigas nin al la problemo de la reala nombra konsisto de nia movado. Do, ĉu vere ni bezonas novan literaturan revuon por potenciala 10 000-kapa legantaro? Male, mi pensas ke la ekzistantaj jam troas. Ni ne forgesu, ke la ĉ. 120

periodaĵoj presiĝantaj en nia verda mikrokosmo (el kiuj almenaŭ deko okupiĝas, komplete aŭ grandparte, pri literaturo) ne estas bagatela nombro por tiom neamasa (kaj ofte neabonpova) profituntaro.

Sed, fine, por ne ŝajni pli pesimisma ol Fjodorov kaj kompanio, mi ripetas la diraĵon, ke "kvanto ne ĉiam proporcias kun kvalito." Do mi nur parte konsentas la asertojn de Benczik kaj Lagrange pri la neta malsupero de nia literaturo kompare kun la naciaj. Por liveri ekzemplon: Mi partoprenis en la juĝkomisionoj de plurdekoj da literaturaj konkursoj, pli-malpli egalnombro en la itala kaj en Esperanto. Nu, laŭ mia juĝo (kaj respektante la nombrajn proporciojn, kiujn mi kalkulis averaĝe 1000:50 aŭ 20:1), la procento de la nepraj fuŝaĵoj estis ĝenerale pli alta en la nacilingvaj sekcioj. Male pri la arta kvalito. Do, resume, jes, sendube nia beletro longe postrestis, arkaikemis (ni daŭre parnasumis dum la aliaj ... futurismis aŭ hermetikis), sed la situacio iom post iom modifiĝas ... niafavore. Ja, Nemere vendas po 3 000 ekzemplerojn esperantlingve, sed ankaŭ milionojn hungarlingve. Post la parnasismo alvenis ankaŭ Kris Long, Timothy Carr, Mauro Nervi, István Ertl,...

Kaj ni konsideru ke (mi estu malavara!) 10 000 ĝis 20 000 homoj kapablas vivteni 120 periodaĵojn. Ja, tio estas nepre signo de vigleco, de matura kulturiteco, de fajna elitismo.

Kaj senbezone de Manifestoj kaj de novaj profetoj!

Konklude, Fjodorov kaj la aliaj parte pravas: ni ne estu tro fanfaronemaj, ni ne blagu aŭ blufu pri milionoj, epokfaraj sukcesoj, poezia panteono kaj simile!

Sed, aliflanke, ni ankaŭ ne estu tro defetismaj, membagateligantaj, suicidaj!

Kaj, almenaŭ, ni atentu homogenecon de la faktoroj antaŭ ol fari komparojn.

Aldo de' Giorgi (Italio)

Noto de la red.: Atingis nin raportoj, ke LITERATURA SKATOLO estas nun rebaptita SURVOJE, kvankam ni ankoraŭ ne disponas pri ekzemplero por prezenti ĝin al la legantoj.

BELARTAJ KONKURSOJ 1988:

POEZIO, HONORA MENCIO

Lingvoj

Dum la nokto
malpeza neĝo
grizigis la monton
tamen ne la rokojn kiuj nigre
kontrastas vertikale.

Horizonte

luma strio montras la ĉeeston
de la malalta suno kiu strebas
kontakti mian koron
per lingvo sena je fleksioj.

Tiun lingvon

mi devas elkompreni, lingvon rektan
kiun subtenas nur la cirkonstanca
sintakso.

Antaŭ la kontrastoj

mi sidas: tiu lumo kaj la nigra roko
kaj la grizo nedifinebla, kaj mi sentas
ke ne nur la lumo verkas indan lingvon
sed ankaŭ la roko kaj la griza palo.

Baldur Ragnarsson (Islando)

Pri problemoj provoke kaj profite

Studoj pri la internacia lingvo. Red. Michel Duc Goninaz (1933). Gent: Association internationale pour le développement de la communication interculturelle (AIMAV; Internacia asocio por la evoluigo de la interkultura komunikado), 1987. 155p. 24cm. Prezo: 39,00 gld.

Inter la antaŭ nelonge ekhaveblaj publikaĵoj kiuj science traktas Esperanton, elstaras kvalite la pluraŭtora studaro redaktita de Michel Duc Goninaz. Temas pri naŭ artikoloj de konataj esperantologoj kiuj prilumas, en kvaropo da lingvoj (Esperanto, franca, angla, germana), sufiĉe larĝan gamon da problemoj priesperantiaj kaj priesperantaj.

Tri artikoloj traktas eksterajn, *socicentrajn*, aspektojn de Esperanto. Jerzy LEYK prezentas poluritan sociologian analizon (esperantlingvan) pri la Esperanto-komunumo. Tiu ĉi “kritika studo”, enfokusiganta la rilatojn inter la esperantistaro kaj la ekstera medio, dubindigas gravajn priesperantajn mitojn. Stimula, eĉ provoka, ĝi estas certe la plej grava kontribuado al tiu ĉi volumo kaj inda je la atento de ĉiu kiu volas kompreni la socian funkciadon de Esperanto. Ulrich LINS kontribuas solidan historiografian studon (germanlingvan kun dupaĝa E-resumo) kiu priskribas la ŝajne paradoksajn rilatojn inter Esperanto kaj la marksismo. La specialiston de la zamenhofa biografio inte-

resas la detalaj, eruditaj komentoj kaj notoj (anglalingvaj kun E-resumeto) de David L. GOLD pri unu verko de N. Z. Maimon (*La kaŝita vivo de Zamenhof*).

Dua triopo da artikoloj, *malforte lingvocentraj*, ekzamenas la rilatojn inter la Esperanto-uzantoj kaj la Esperanta lingvokodo. Inter ili la verkaĵo de Richard E. WOOD prezentas (anglalingve kun E-resumo) materialon pri la historio kaj nuna situacio de prononcaj normoj de Esperanto, interalie el la aŭtoritataj *Lingvaj respondoj* de Zamenhof kaj la idiosinkrazia *Plena analiza gramatiko* de Kalocsay kaj Waringhien. Krom la antaŭparolo (duversia: Esperanta kaj franca), Michel DUC GONINAZ kontribuas mem skizon (franclingvan kun E-resumo) pri la kultura dependeco de la Esperanta leksiko: tiu konsistas nome el multaj formoj kiuj estas markitaj kiel semantike eŭrooriginaj (ekz-e *homolpersonolindividuo*). La seksismo de la Esperantaj vortfarado kaj pronomuzado kaj la kutima forviŝo de la nombra distingo en la duapersona pronomo estas frapaj ekzemploj de la mankanta aŭtonomeco de Esperanto. La fiksado de universalaj konceptoj estas efektive unu el la plej gravaj problemoj traktotaj de la esperantologoj. La edukan valoron de Esperanto substrekas el psikolingvistika vidpunkto Claude PIRON (franclingve kun detala E-resumo). Laŭ li, tial ke Esperanto – kompare al naciaj lingvoj – estas lingvo norme tre libera kaj tamen rigora, ĝi stimulas disciplinan lingvokreemon ĉe la infanoj Ĝin lernantaj.

Pierre Janton, Ryszard Rokicki kaj István Szerdahelyi liveras *forte lingvocentran* triopon da artikoloj (esperantlingvaj). Laŭ la strukturismo de André Martinet, JANTON priskribas la supoze unikan strukturon de la Esperantaj morfologio kaj sintakso kaj proponas plenan ekspluatadon de ties latentaj potencialoj, interalie per la oficialigo de la akuzativa regado inter substantivoj

Motivo por esperantistiĝo

Beletro, sed ne el katedro. Gaston Waringhien. Antverpeno: Flandra Esperanto-Ligo, 1987. 258p. 21cm. Dua eldono reviziita kaj pliampleksigita. Serio “Stafeto” n-ro 4. Prezo: 34,50 gld.

Je sia unua apero, la unua volumo de la *Eseoj* de G. Waringhien rikoltis meritatajn laŭdojn. William Auld (*Esperanto* 1957/11) nomis ĝin “unuaranga ĉefverko”, per kiu Waringhien “riĉigas la kritikan literaturon de la tuta mondo”. Por K. R. C. Sturmer (*British Esperantist*, okt. 1956/134) ĝi estis “volumo nepre havigenda, kiu faras honoron al Esperanto”. Kaj por Makkink (*Scienca revuo* 9/1, 26) ĝi estis “unu el la plej gravaj libroj iam aperintaj en Esperanto”. La nova eldono aldonas al la titolo “sed ne el katedro”, sed ni certigas al la verkisto, ke li plene rajtas tiel paroli kaj ke ni volonte submetiĝas al “la aŭtoritato de tia rajtigita lekcianto”, por citi PIV.

La nova generacio do povas fidi je nia verdikto kaj danke preni en manojn ĉi tiun klasikaĵon. Mi memoras mian penson, ke laŭ unu el la kruelaj ŝercoj de la vivo, same kiel Cicerono neniam legis la *Eneidon*, Zamenhof neniam legis ĉi tiujn eseojn. Do ni, pli privilegiataj ol li, povas ĝui la perfekte miksitajn ingrediencojn de erudicio kaj humuro, kaj senti kiel Esperanto tute ne postlumas la etnajn lingvojn en la kapableco kun ĉarmo kaj fleksebleco respondi al ĉiuj movoj de la menso. Estas rimarkinde, kiamaniere gravaj aldonoj al la scio, kiuj estus meritintaj esti aperintaj en fakaj revuoj kaj tie estus vekintaj la atenton de fakuloj, ĉi tie ŝajnas esti faritaj hazarde, tiel ke senpene ni ekscias pri nova strukturo de *Hamleto*, pri araba fonto de *La dia komedio*, pri malmulte konata teksto de A. Huxley, jam ne parolante pri korektitaj mistradukoj aŭ preseraroj, kaj ke Diogeno la Cinikulo estis antaŭulo de la *Sennaciistoj*.

Posedantoj de la unua eldono ŝatos ekscii, kiamaniere la dua diferencas. Unue, ĉiuj *Postĝustigoj* estas faritaj, escepte de la proponitaj kaj aprobindaj ŝanĝoj por p. 149 (do la akcento sur *la* bedaŭrinde restas) (156). Novaj preseraroj tamen enŝteliĝis, dum kelkaj eraroj restis kaj aliaj nerimarkitaj estas korektitaj. Aldonoj al piednotoj, kutime pri intertempaj tradukoj, troviĝas kune kun tute novaj notoj pri *glosolalia* (18), Virgilio kaj Dante (41), Heine (65), PIV (68), mistraduko de Zamenhof (70), la M. Kalergis de p. 130 (144-45), robaĵoj (158-9), hajko (164), traduko de Auld (177), kaj traduko el Góngora (189).

La “Glosareto” enhavas dek du novajn nomojn (kaj P. Logan Smith estas pli bone konata kiel eseisto), novajn difinojn por kvar (Nylén, Schwartz, Simenon, Szilágyi), kaj dek vortojn unuafoje (*frustri*, *holmo*, *horto*, *krifo*, *krino*, *loza*, *noci*, *rojo*, *ruro* kaj *svaga*, el kiuj la unuaj du mankas en PIV).

Ne sufiĉas tamen ĝisdatigo kaj ĝustigo: jen 23 paĝoj de tri eseoj novaj: “Letero al Bleier” substrekas la signifon de Baghy kaj Kalocsay por nia kulturo. “Triobla triptiko” prezentas en tri “paneloj” po tri poemojn de tri poetoj (Eichendorff, Carducci, Mallarmé) supozeble sed longe ne memevidente kunligitaj de “tri aspektoj de unu sento”. La redono de la ritmo kaj rimo estas mirinda (kiel jam por “La blanka elefanto”). “La bestalbumo de poetoj” portas nin de Anakreon al Yeats, pasante tra tradukoj el Kalocsay, Zamenhof, kaj Waringhien mem (“La tigro” de Blake, 237). Interesas kompari alian tradukon de ĉi tiu fare de Franco en *Esperanto* 1960/5 kaj tiun de Auld jam donitan 1956/3.

Do kun la sama vervo kaj sagaca penetremo, kiujn ni konis kaj admiris, la verko sin prezentas al la nova generacio. Se iu demandas al vi kion vi ŝuldas al Esperanto, respondu: Mi ŝuldas la ĝuon legi ĉi tiun libron.

D. B. Gregor (Britio)

(ekz-e “por savo la landon”) kaj de la sintezaj kompleksaj verboformoj (ekz-e “mi devintus”). Tre utilan analizon de la vortklasa naturo de la Esperantaj morfemoj liveras ROKICKI. Prave kritikante la klasifajn skemojn de Zamenhof, Drezen, la Akademio de Esperanto kaj Szerdahelyi, li mem proponas novan skemon lingvistike fonditan. La “enkonduka skizo” de SZERDAHELYI pri la Esperanta etimologio prilumas per multaj konkretaj ekzemploj gravan studobjekton de la esperantologio, pri kiu ĝis nun ekzistas, krom pluraj diletantaĵoj, nur malmultaj esplorfragmentoj. Szerdahelyi tamen limigas la taskon de la Esperanta etimologio al sinkrona esplorado de pruntaĵoj kaj bedaŭrinde preterlasas la distingon de praheredaĵoj.

Cetere, eble okaze de reeldono, endas forigi la konsiderinde grandan nombron da prezeraroj, kiuj ĝenas precipe en la artikoloj de Wood kaj Szerdahelyi. Ke la studaro grave kontribuas al la scienca traktado de Esperanto estas ĉiukaze nekontesteble. Dum certaj partoj estas por laiko tro fakaj, pluraj artikoloj estas ĝenerale kompreneblaj kaj legindaj por serioza esperantisto. Por esperantologia aŭ interlingvistika fakulo la tuta verko estas nemalhavebla.

Edmund Brent (Kanado)



**INTERNACIAJ
lingvaj
ludoj**
1909 1989

ALVOKO

Inter la premioj: Rozo, por la plej kvalita am-tema poemo; Eglanterio, por la plej kvalita esperantisma aŭ alitema poemo; Violo, por la plej humanisma aŭ etika poemo; Frederic Pujulà i Vallès, por la plej kvalita novelo/fabelo; Amaranto, por la plej kvalita beletra eseo.

Por la regularo skribu al la Sekretario de la Konservantaro, Joan Ramon Guiñón i Roset, Carrer Vilamarí 106-108 baixos interior segona, E-08015 Barcelona, Catalunya/Katalunio (Hispanio).

Limdato por konkursaĵoj: la 16-a de majo 1989. Premiitoj ricevos inviton al la Festo en Barcelono, oktobron 1989.

Amo kaj arto surprizas

Karuseloj... Sara Larbar. Chapecó: G. R. Ledon/Fonto, 1987. 117p. 21cm. Prezo: 12,00 gld.

La aŭtorino de ĉi tiu originala amromano kreis rakonton tre apartan. Ĝi konsistas el diverskoloraj, diversmezuraj kubo, al kiuj mankas unu faco, tiel ke pli granda ĉiam enhavas malpli grandan. Laŭ kiu sistemo la verkistino enmanigas al ni tiujn kubo, la legantoj mem malkovru, por ke restu la efiko. Jen libro, kiun oni ne povas legi duondorme por distri sin en libera horo, sed kiu postulas plenan atenton. Tamen la leganto ne bedaŭros sian penon, ĉar apud la oftaj surprizoj, kiujn per tiu speciala procedo havigos al li Sara Larbar, li trovos ankoraŭ multajn aliajn frandindaĵojn.

Tra la tuta verko dissemiĵoj, troviĝas ĝiaj belaj poeziaj bildoj. Jen du ekzemploj:

Oni estis brodinta kampajn floretojn sur tiu tuta ondumanta tapiŝo, multfoje pikante al si la fingrojn, ĉar ruĝaj sangogutoj tie kaj jene makulis la flavajn korolarojn.

Pale flavaj lumoj de la verando skrapmordetis la absolutan nokton, sendanĝere, naive, stulte, kiel... kiel naciflagoj enbatitaj en la lunkraterojn...

Ravas la detalaj, bildigaj priskriboj de lumoj kaj ombroj sur muro, de akvario kaj pluraj aliaĵoj. Ĉe tio ŝi ne hezitas utiligi nekutimajn vortojn, ofte el la sferoj de medicino, filozofio, religio, juro. Mirigis min la granda nombro de tiaj vortoj, kiujn ŝi uzas tute nature kun trafa certeco. Mi ne hontas diri, ke mi plurfoje devis konsulti PIV por poste admire konstati, ke preskaŭ ĉiam ŝi elektis plej trafan vorton.

Libro pri amo: amo persona de pluraj rolantoj, kaj amo ĝenerala, ligita ankaŭ al Esperanto. La verkistino estas denaska esperantisto kaj plene vivas sian esperantistecon. La klasifiko de la esperantistaro en kvar specojn estas amuza kaj elvokis mian plenan simpatian. Kiam ŝin provokas patriotisma neesperantisto ĝiaj pensoj envortiĝas i.a. jene:

Aj!! kiam do la homoj komprenos la manipuladojn, kiuj ludas per ili kiel futbalistoj per pilko?! – Nur esperantistoj, nur la veraj esperantistoj konas la valoron de landaj kulturoj kaj scias ilin prizorgi por tutmonda kunĝuado!

Multaj pensoj kaj diroj de Sara Larbar pripensigas kaj pluraj sendube estigos konsenton en la legantoj. La legado estis por mi neordinara travivaĵo, la libro vere fascinis min kaj mi esperas, ke multaj spertos la samon. Ĝenis min nur la daŭra uzo de *ci*, kiun vorton nia lingvo – almenaŭ laŭ mia sento – tute ne bezonas; nia demokrata *vi* servas admirinde ankaŭ en la plej intimaj rilatoj!

Jen do nova verko originala, ne por komencantoj, sed multvaloraĵo por pli spertaj esperantistoj, debuta romano, kiun espereble sekvos pliaj libroj el la plumo de ĉi tiu talenta aŭtorino.

Rejna de Jong (Nederlando)

Spirite riĉiga metodiko

En novan mondon. Rektmetoda kurso por geknaboj. Gvidlibro. Vilma S. Eichholz (1926). Bailieboro, Kanado: Esperanto Press, 1986. 150p. + folio. Ilus. Mimeo. 21cm. ISBN 0 919186 26 2. Prezo: 33,30 gld.

Anticipe menciendas, ke la kurso-kompleto konsistas el:

- 8 teksto-kajeroj
- 1 lernvort-kajero sen traduko
- 1 lernvort-kajero kun anglalingva traduko
- 1 gvidlibro
- paroligiloj (bildoj, kartetoj)
- 2 kasedoj 90-minutaj + 2 ludiloj.

La jena recenzo koncernas la Gvidlibron, unuflanke ĉar tio estas mia tasko, aliflanke ĉar mi ne havis eblon posedi aŭ eĉ nur legi la ceterajn kajerojn.

Tio estas je mia granda bedaŭro, ĉar legante/leginte la Gvidlibron (kaj en ĝi la antaŭparolon de d-ro Drake), mi pli kaj pli konvinkiĝas, ke ne nur tasko, sed eĉ devo de Esperanto-instruistoj estas unuavice edukado je paco, komprenemo, kunlaboro, helpemo, respekto k.s., kiel tion fiksas la Rekomendoj de la Ĝenerala Kunsido de Unesko en 1972. Mi do plene bonvenigas la edukcelojn kaj ilian realigon en la kurso de V. S. Eichholz.

Detalajn konsilojn, proponojn ŝi faras, kiel en la ĉiutaga vivo, dum kaj ekster instruhoroj praktike trejni sin, ke la konscio donu pozitivajn ordonojn al la subkonscio por agi je ĉies favoro; kiel ekkoni kaj plibonigi sin mem; kiel instigi al lernado ne per konkurso *kontraŭ*, sed per reciproka helpado *kun* la sam-grupanoj, ekskludante ĉiuspecan rivaladon k.s.

La aŭtorino antaŭvidas tri fazojn de E-instruado resp. edukado:

1. *La patrina periodo*, kiam oni instruu instinkte uzi la lingvon kiel patrinoj instruas siajn infanojn. Gravus ĉiam korekti la erarojn sen ofendi la lernantojn!

2. Dum la *lerneja periodo* la instruisto konsciigu pri la gramatiko.

3. *Libera, konscia aplikado* de la lingvo kun celo "plivastigi la horizonton de infanoj el ĉiuj mondpartoj".

Ankaŭ la temoelekto okazas laŭ tiu tria kriterio: "transdoni informojn al infanoj, kiuj kutime ne troviĝas en lingvaj lernolibroj, kaj pri kiuj oni ne trovis lokon en lernejaj studprogramoj, sed kiuj povas kapti la intereson de infanoj . . ." La aŭtorino konsideras kursanojn de la tuta planedo, kiam ŝi evitas paroli pri "luksa, malŝparema, egoisma vivostilo", pri la sezonoj, pri politika aŭ religia sinteno ktp. La leksikon ŝi elektas laŭbezzone, kaj instigas ĉiun instruiston sekvi tiun vojon.

La metodikaj paŝoj kaj artifikoj estas kiel kutime en la rekta metodo. Menciindas, ke ili estas zorge prilaboritaj kaj adaptitaj al la aĝo de 12-14 jaroj. La utilaj kaj tre praktikaj konsiloj tuŝas ankaŭ tion, kiel aranĝi la sidordon, kial kaj kiel instrui kanti, kiel fari demonstrilojn, kiel desegni sur tabulo ktp. La aŭtorino substrekas la gravecon de varia instruado kaj donas abunde modelojn de riĉenhavaj dialogoj, diskutoj, ludoj, kantoj, teatraĵetoj, enigmoj k.s., kiel elekti por si E-nomon (?), kiel komune festi, kiel montri amikemon ktp.

El psikologia vidpunkto du faktoj meritas apartan atenton:

1. Uzante simio-pupon Kuno, kaj ofte ŝajn-konversaciante kun ĝi, la instruisto kreas komunikan situacion, kiun la lernantoj partoprenas ĉu pasive, ĉu aktive.

2. "Amika prizorgado", t.e. kreo de sekura, amika atmosfero en la klaso forigas malemon en la lernantoj libere paroli en la cellovo.

Pri la lingvaĵo de la Gvidlibro (kaj verŝajne ankaŭ de la kursmaterialo) mi devas fari kelkajn rimarkojn.

1. Kvankam sur p. 29 kaj ankaŭ poste la aŭtorino fiksas: "estas por mi memkompreneble, ke vi parolas perfekte kaj flue E-on," ŝi mem ne ĉiam sufiĉe zorge uzas la lingvon. Ekz-e "mi nomas la unuajn du kajerojn . . . patrinan metodon" (anstataŭ "patrina metodo"); "ne permesu, ke tempo perdiĝas" (anstataŭ "perdiĝu"); "ĵus parolas" (anstataŭ "ĝuste nun parolas"); "evoluas la regulojn" (anstataŭ "evoluigas"); ktp. Erara estas la vortordo ĉe "nur", kaj aperas aliaj ofte ripetigantaj malkorektaĵoj.

2. Ŝi enkondukas kelkajn proprajn neologismojn (kvankam ŝi ne devigas je ilia transpreno), ekz-e prefikson *go-*, pronomon *ŝili* (pri tio vd. diskutojn de R. Schulz, de B. Golden en revuo *Esperanto* 7-8/1982, kaj de V. S. Eichholz en *Akademioj studoj* 1986), kaj krome plurajn vortojn, ekz-e *lingviko* "ĉar ne temas pri scienco pri lingvistoj" (!).

3. Kuno, la simio, estas "li" (p. 65), sed infano "ĝi" (p. 17). Ĉu??

Kvankam la kurso estas dediĉita ĉefe al edukado de gejunuloj en la tria mondo kaj antaŭvidas ĉiutagajn lecionojn, mi nepre rekomendas ĝin je la atento de ĉiuj kursgvidantoj en la t.n. unua kaj dua mondoj – kaj precipe la Gvidlibron, eĉ se vi tute ne instruas laŭ tiu ĉi kurso. La Gvidlibro mem multe pliriĉigas morale nin ĉiujn.

Zsuzsa Barcsay (Hungario)

Laste aperis...

Almanako Lorenz 1989. Div. aŭtoroj. Rio de Janeiro: Spirita Eldona Societo F.V. Lorenz, 1989. 96p. 20cm. Spiritismaj eseetoj, poemoj ktp. 9,00 gld.

Arbo de la sciado, La. Pío Baroja (1872-1956). El la hispana trad. Fernando de Diego. La Laguna: J. Régulo, 1973; dua bindo, Roterdamo: UEA, 1989. 222p. 21cm. Stafeto: Belliteratura serio 31. Filozofia romano pri la sopiro al homa perfektigo: amara, melankolia, ĝi tamen lasas impreson de trankvilo. 24,00 gld.

Aventuroj de pioniro. Edmond Privat (1889-1962). La Laguna: J. Régulo, 1962; dua bindo, Roterdamo: UEA, 1989. 143p. 19cm. Fotoj. Stafeto: Beletraj Kajeroj 17. La tekstoj de 55 mallongaj radioprelegoj, kiuj skizas la karieron, movadan kaj nemovadan, de unu el la plej gravaj intermilitaj aktivuloj. 18,00 gld.

Bapto de Caro Vladimir, La. Karel Havlíček Borovský (1821-1856). El la ĉeĥa trad. Tomás Pumpr (1906-1972). La Laguna: J. Régulo, 1953; dua bindo, Roterdamo: UEA, 1989. 141p. 22cm. Stafeto, Belliteratura serio 2. Humuraj ilustraĵoj de Josef Lada. Ridinde komika historio pri la dronigo de dio, en majstra traduko. 30,00 gld.

Bibliografio de disertacioj pri Esperanto kaj interlingvistiko. Komp. Edward Symoens. Rotterdam: CED/UEA, 1989. 159p. 20cm. Listigas pli ol 120 verkojn, kune kun teknikaj detaloj kaj resumo de la enhavo. 27,00 gld.



Chongjon. La baza skribo de Wonbulgyo. El la korea trad. Ch'oe Tae-sok, Hong Song-jo, Yook Cheol. Seulo: Wonbulgyo-Esperantista Societo, 1988. 175p. 18cm. Bela dulingva eldono de la baza skribo de korea budhisma religio, fondita de Pak Chung-bin (1891-1943). 14,10 gld.

De Mickiewicz al Goethe. Iam kompletigota plena verkaro de L.L. Zamenhof: Tradukaĵoj, volumo 2. Kioto: Eldonejo Ludovikito, 1988. 499p. 21cm. Enhavas la originalajn tekstojn de i.a. *La revizoro*, *La predikanto*, *La rabistoj*, *La psalmaro*, du fabelojn de Andersen, kaj *Ifigenio en Taurido*. 48,00 gld.

De Molière al Ŝalom-Alejĥem. Iam kompletigota verkaro de L.L. Zamenhof: Tradukaĵoj, volumo 3. Kioto: Eldonejo Ludovikito, 1988. 499p. 21cm. Enhavas la originalajn tekstojn de i.a. *Georgo Dandin*, *Marta*, *La sentencoj de Salomono*, *Proverbaro Esperanta*, *La gimnazio*. 48,00 gld.

Die Etablierung der Interlinguistik als Wissenschaft und ihre möglichen Auswirkungen auf den Sammlungsauftrag des Internationalen Esperanto-Museums in Wien (IEMW). Herbert Mayer. Vieno: Pro Esperanto, 1988. 50p. 30cm. 26,70 gld.

El la vivo de bervalda sentaŭgulo. Louis Beaucaire (1925-1984). La Laguna: J. Régulo, 1974; dua bindo, Roterdamo: UEA, 1989. 134p. 18cm. Stafeto: Beletraj Kajeroj 46. Sprite esperantisma "maldeceta epizodaro". 15,00 gld.

En la brikejo (1897). J. Wasniewski. Postparolo de Herbert Mayer. Vieno: Pro Esperanto, 1988. 18p. 21cm. Tre frua realisma rakonto kun freŝa naturpriskriba stilo. 7,20 gld.

Esperanto-kurso por televida disaŭdigo. Beijing: Pekina Esperanto-Asocio, 1987. 185p. ISBN 7-5382-0347-8. 19cm. Ĉinlingva kurso. 6,00 gld.

Esperanto simple. Kurso de la internacia lingvo en 7 lecionoj. Lilia Fabretto. Romo: Tutmonda Esperantista Vegetarana Asocio, 1988. 76p. 17cm. Ilus. Por itallingvanoj. 4,50 gld.

Ferio kun la morto. Karl Lindqvist. Beijing: Pekina Esperanto-Asocio, 1988. 149p. ISBN 7-205-00276-1. 18cm. Vigla, simplastila krimrakonto kun ĉinlingvaj tradukoj, glosoj. 4,50 gld.

Hirthara Petro (1845). Heinrich Hoffmann (1809-1894). Postparolo de Hedwig Fischer. El la germana trad. Rudolf Fischer. Neustadt an der Weinstrasse: D. Meininger GmbH, 1988. 48p. ISBN 3-87524-077-4. 20cm. Kolorilustrita eldono de fama germana infanlibro, amuza poemaro pri geknabaĉoj kaj aliaj. 15,60 gld.

Impreso en pluvo. Gong Xuesheng (1952). Munkeno: Esperanto Eldonejo, 1988. 47p. 21cm. Pensige metafora poemaro. 12,60 gld.

Infano el la alta maro kaj aliaj rakontoj, La. Jules Supervielle (1884-1960). El la franca trad. Hervé Gonin k.a. Parizo: UFE, 1988. 64p. 21cm. *Franca esperantisto*, n-ro 394 (Antologieto de la franca literaturo). Fabeloj verkitaj de "urugvaja" franca poeto, pri "revo kaj realeco, farso, angoro". 8,10 gld.

Intereso kaj utilo de komuna interlingvo, La. Div. aŭtoroj, red. Eddy Rosseel, Edward Symoens. Brussel: AIMAV, 1988. 86p. 20cm. Dek prelegoj en Esperanto (2), la angla (4) kaj la franca (4), pri lingvo-problemoj (precipe en Eŭropo) kaj diversaj eblaj solvoj. 30,30 gld.

Jarkolekto Esperanto 1988. 268p. 30cm. Bind. 36,00 gld.

Komunikado. Div. aŭtoroj, red. Philippe Cousson. Poitiers: Evangeliaj Kajeroj 4, 1988. 88p. ISSN 0984 7626. 21cm. Eseo el diversaj religiaj vidpunktoj. 12,00 gld.



*Ses el la klasikaĵoj
de Stafeto, binditaj
ĉe UEA el presfolioj.
Mendu ilin dum tio eblas!*

... kun siaspeca spico! Raymond Schwartz (1894-1973). La Laguna: J. Régulo, 1971; dua bindo, Roterdamo: UEA, 1988. 215p. 22cm. Antologio el la humuraĵoj de Schwartz, represitaj ĉefe el diversaj revuoj; i.a. enestas la tuta serio de *Laŭ mia... ridpunkto*. 30,00 gld.

Language in religion. Div. aŭtoroj, red. Humphrey Tonkin kaj Allison Keef. New York: CED, 1988. 141p. 28cm. Referaĵoj el konferenco en majo 1987, anglalingvaj kun Esperantaj resumo; traktas kiel ĉeftemojn la rolon de lingvo en la kredo, la praktikan funkcion de lingvo en diversaj eklezioj, kaj lingvon kiel religian komunikilon kaj organizilon. 24,00 gld.

Laŭta vekhorloĝo, La, kaj aliaj atento-kaptiloj. Stefan MacGill. Budapeŝto: Hungara Esperanto-Asocio, 1988. 200p. ISBN 963 571 246 4. 20cm. Paroliga legolibro, kun kvar amuzaj rakontoj, ekzercoj, rol-ludoj, desegnaĵoj ktp, kaj kelkaj notoj por instruistoj. 21,00 gld.

Lernolibro de Esperanto. Beijing: Pekina Esperanto-Asocio, 1987. 163p. 18cm. Por ĉinlingvanoj. 5,10 gld.

Libro de amo. "Peter Peneter" kaj "Georgo Peterido Peneter". Byblos: Je la ŝildanonco de "L'Akacio", 1969; dua bindo, Roterdamo: UEA, 1988. 262p. 20cm. Enhavas la faman amoran poemciklon "Sekretaj sonetoj" (1931) kaj diversajn similtajn poemojn, originalajn kaj tradukitajn. 21,00 gld.

Lingvonormiga reformo de Esperanto. Manuel Halvelik. Bailieboro: Esperanto Press, 1988 (neindikita). 203p. ISBN 0-919186-34-3. 29cm. Proponoj por adapto de Esperanto al la postuloj de aŭtomata analizeblo kaj optimuma kreo de sciencaj terminoj. 48,00 gld.

Litovio hodiaŭ. 1988, 1(30). Div. aŭtoroj. El la litova trad. P. Lukoseviciene, T. Lukosevicius, K. Puodenas. Vilnius: Litova Societo de Amikeco kaj Kulturaj Rilatoj kun Eksterlandoj, 1988. 83p. ISSN 0235-0769. 19cm. Fotoj. 4,50 gld.

Malegalajoj: Ĉu feto? Alain Cavalier. El la franca trad. Kultura Esperanto-Centro de Angers. Saint Aubin de Luigne: Monda Fonduso de Solidareco kontraŭ la Malsato, 1989. 15p. 21cm. Klarigo de evoluhelpa agado surbaze de ekzempla kazo de brazilaj kamparanoj. 2,70 gld.

Mi estas nur virino. Anna Swirszczynska (1909-1984). El la pola trad. Tomasz Chmielik. Varsovio: Pola Studenta Esperanto-Komitato, 1988. 37p. 20cm. Forte emociaj, defie intimaj liberversaĵoj pri virina vivo. 6,00 gld.

Per espero al despero (1910). Stanislav Schulhof (1864-1919). Postparoleto de Herbert Mayer. Vieno: Pro Esperanto, 1989. 26p. 21cm. La unua poemaro de frua Esperanta verkisto, fama pro la pesimisma "Desperanto". 8,70 gld.

Por la homo. A. Urbonas kaj K. Trečiakauskas. El la litova trad. Povilas Jegorovas. Vilnius: Mintis, 1988. 114p. 19cm. Bind. Rakonto pri la kuraco de knabino post akcidento, kiu vere okazis kaj famiĝis tra Sovetunio. 12,00 gld.

Por la traktata reglamentado de la afero Hoang Sa-Truong Sa (Paracels-Spratly). Hanojo: revuo *Vietnamaj Studaĵoj*, 1988. 25p. 12cm. Mapo. Klarigo de la vjetnama pozicio en teritoria disputo kun Ĉinio. 0,90 gld.

Sano. Strategio por ŝanĝo (1982). Mário M. Chaves. El la portugala trad. Paulo Sergio Viana. Brasília: Brazila Esperanto-Ligo, 1988. 120p. 23cm. Tabeloj ktp. Tre klara populara skizo de la krizo en la monda san-sistemo kaj de la programo de Monda San-Organizo kaj aliaj por ŝanĝi ĝin. 15,00 gld.

Sen pardono. Claude Piron. Vieno: Pro Esperanto, 1988. 20p. 21cm. Psikologia rakonteto kun glosoj kaj traduko por germanlingvanoj. 6,60 gld.

Sentoj kaj argumentoj (Notoj de esperantisto). VI. Ĉernov. Baku: Bakua Esperanto-Klubo "Hazar", 1988. 47p. 21cm. Esperantismaj aforismoj, ŝercoj ktp en Esperanto kaj la rusa. 3,00 gld.

Skota lingvo, hodiaŭ kaj hieraŭ, La. William Auld (1924). Eldonejo Kardo, 1988 (loko neindikita). 16p. 21cm. Konkiza prezento de la moderna skota, kun klarigoj pri la diferencoj inter ĝi kaj la moderna angla. 3,00 gld.

Sociaj aspektoj de la Esperanto-movado. Div. aŭtoroj, red. Senad Ćolic. Sarajevo: ELBIH, 1988. 136p. 19cm. Kolekto de tre diversaj referaĵoj el jubilejara konferenco en Banjaluka, inkluzive de kelkaj tre valoraj. 29,70 gld.

33 Rakontoj. La Esperanta novelarto. Div. aŭtoroj, red. Reto Rossetti kaj Ferenc Szilágyi. Enkonduko de Ivo Rotkvic. La Laguna: J. Régulo, 1964; dua bindo, Roterdamo: UEA, 1989. 328p. 23cm. Stafeto: Belliteratura serio 22. Bind. Klasika antologio, kun tre larĝa gamo de landoj (17), stiloj kaj temoj. 45,00 gld.

Ventovoĉo en la vilaĝo Yamanasi. Taniguti Misao. El la japana trad. Harada Takako k.a. Ootu: Ootu Esperanto-Societo, 1988. Komplete de la originala japana eldono (23x30cm, 32p. kun tutpaĝaj koloraj pentraĵoj de Suzuki Yasumasa) kaj Esperanta traduko (18x27cm, 16p., unukolora). Ekologia infanrakonto. 36,00 gld.

Vivi estas danĝere. István Nemere. Budapeŝto: Hungara Esperanto-Asocio, 1988. 159p. ISBN 963 571 2386. 20cm. Streĉa spionromano en simpla, glata lingvaĵo; prosalajra batalisto Daniel Skagen trovas sin portempa sekreta policisto, sed ĉu la polico samopinias? 21,00 gld.

Vojaĝo inter la tempoj. K. Kalocsay (1891-1976). La Laguna: J. Régulo, 1966; dua bindo, Roterdamo: UEA, 1988. 197p. 22cm. Stafeto: Movado 4. Gramatika studo pri la konjugacio en Esperanto. 27,00 gld.

Zamenhof, aŭtoro de Esperanto. Marjorie Boulton (1924). La Laguna: J. Régulo, 1962; dua bindo, Roterdamo: UEA, 1989. 267p + 24p. fotoj. Stafeto: Movado 3. 21cm. Klasika biografio, ankoraŭ la plej bona populara prezento. 36,00 gld.

Zamenhofa teksto de la Malnova Testamento, La. D. B. Gregor. Eldonejo Kardo, 1988 (loko neindikita). 11p. 21cm. Detala komparo inter la zamenhofa traduko kaj tiu publikigita de la Biblia Komitato en 1926. 3,00 gld.

MENDU ĈE LA LIBROSERVO DE UEA, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando. Bonvolu atenti, ke al ĉiuj netaj prezoj de libroj sendotaj al adresoj en Nederlando aldoniĝas 6%, al tiuj de diskoj, insignoj k.s. 18,5% por la enlanda imposto. Al ĉiuj netaj prezoj aldoniĝas 10% por sendokostoj. Minimumaj sendokostoj estas 5 gld. Antaŭdankon pro via mendo!

• **Alpoj-Adrio:** Kadre de la kreskanta kunlaboro en ĉi tiu regiono, la ĝisnunaj Trilandaj Esperanto-Konferencoj fariĝos ekde 1990 Kvinlandaj (t.e. al Aŭstrio, Svislando, Jugoslavio aldoniĝos Italio kaj Svislando). La lasta Trilanda Konferenco okazos de la 8-a ĝis la 10-a de septembro 1989 en Arnoldstein, Aŭstrio; detalojn petu de Martin Stuppig, Esperantostr. 175, A-9601 Arnoldstein.

Unu monaton pli frue la unuan junularan renkontiĝon de la tuta regiono organizas Kroatia Esperanto-Ligo, Amruseva 5/1, YU-41000 Zagreb, Jugoslavio.

• **Aŭstrio:** Ian rekordon eble atingis Esperanto-poŝtstampilo en la ĉefa viena poŝtejo: ekde la komenco de 1986 ĝi produktas 25 milionojn da surpresoj ĉiujare, varbante i.a. por la Internacia E-Muzeo en Vieno. La jaran koston de 4400 ŝilingoj pagas privatuloj; se vi deziras kontribui, donacu al la aŭstria poŝtĉek-konto 7490.534 je la nomo de Walter Klag – Esperanto-Werbestempel.

• **Bharato:** Pli ol cent esperantistoj el la regiono de Kalkato inaŭguris novan Esperanto-centron la 8-an de januaro 1989, samtempe festante – iom malfrue – Zamenhof-tagon. Aŭspicianto de la centro estas s-ro Kriŝnadas Muĥarĝi, pioniro de la bharata abelkulturo kiu antaŭ nelonge eklernis Esperanton. En la programo partoprenis i.a. ŝtatparlamentano Hemen Mazumder, lernejestro Bimal Pal, kaj la sekretario de la landa Esperanto-federacio, S.S. Pal.

• **Francio:** Unuiĝo Franca por Esperanto reprezentigis jam la trian sinsekvantan jaron en la granda pariza lingvo-foiro *Expo-langues*, komence de februaro. Unu monaton poste, grupo de francaj ekologi-emuloj prezentis Esperanton samurbe ĉe “Alimaniere labori kaj vivi”, foiro por pli ol 20 000 alternativuloj; la samaj homoj ĉeestos ankaŭ la 8-an Eŭropan Ekobiologian Foiron en Rouffach, la 8-an de majo (Emile Mas, Alternativesperanto, F-46170 Castelnau Montratier).

• **Irlando:** Dum nacifesta parado en mezirlanda urbo, grupo de ekologiistoj unuafoje ligis Esperanton kun sia celaro: la demando “Ĉu vi estas medi-amika?” estis prezentita irlande, angle kaj Esperante.

• **Italio:** Konsiliano Vito Totire submetis al la regiona parlamento de Emilia-Romagna leĝproponon, laŭ kiu la regiona registaro rekonas la valoron de Esperanto kaj stimulus ĝian lernadon, i.a. per sub-

venciado de publikaj kursoj. Pri eventuala traktado de la propono en la parlamento ni ankoraŭ ne havas informojn.

• **Japanio:** La 2-an de marto 1989, komence de sia oficiala vizito al Japanio, s-ro Roman Malinowski, prezidanto de la Pola Parlamento, akceptis en Tokio delegacion de Japana Esperanto-Instituto. En la delegacio estis i.a. s-ro Seikō Yamasaki (nova ĉefdirektoro de JEI), s-ro Kazuko Kikusima (administra direktoro), kaj s-ro Yosimi Umeda (direktoro). S-ro Malinowski, kiu estis la Alta Protektanto de la Jubilea Kongreso en Varsovio, estas ankaŭ la iniciatinto de la estonta Esperanto-Centro en Bjalistoko kaj prezidanto de la Fondumo Zamenhof, kiu gvidas la preparlaborojn por la Centro.

• **Kanariaj Insuloj:** Unu el la ĉefaj gazetoj de la insularo, *El Día* el Santa-kruzo de Tenerifo, publikigis kelkajn artikolojn pri Esperanto okaze de prelegvizito de Hugo Röllinger (FR Germanio). Unu el la artikoloj kunhavis Esperantan resumon de la prelego, unuafoja okazaĵo en Kanarioj.

• **Koreio:** Juna jugoslavia esperantistino, Zeljka Anic, faris prelegvojaĝon tra kelkaj urboj en januaro. Laŭ intervjuo en *La espero*, impresis ŝin la multeco de la esperantistaro sed malpli la parolkapablo – kiel oni trovas ankaŭ en Ĉinio, Afriko kaj aliloke. Kiel eksa LKK-ano de la IJK en Zagrebo, ŝi ankaŭ donis konsilojn pri la antaŭpreparoj de antaŭvidata IJK en Seulo.

• **Nederlando:** Raporto de la landa gazetara servo montras, ke la Universala Kongreso kaj aliaj internaciaj kongresoj de la pasinta jaro ebligis rompi la publikecan rekordon de la Jubileo. En 1988 aperis 233 artikoloj – inkluzive de 146 grandaj – en 106 ĵurnaloj kaj revuoj, kontraŭ nur 176 en 1987.

• **Sovetunio:** La 12-an de marto, kelkminuta reklamo por lerni Esperanton aperis en tutlanda programo de la sovetia televido. Ĝi proponis korespondan kurson, je kosto de 35 rubloj por unu studjaro, per la adreso de Kooperativo Espero, dom druĵbi, ul. Fontanka 21, SU-191011 Leningrad.

En Moskvo ekaktivis nova klubo sub la nomo Lev Tolstoj. Ĝi jam havas 50 anojn kaj povas raporti kelkajn informajn sukcesojn ĉe la amaskomunikiloj. Materiala subteno estas bonvena ĉe Esperanto-klubo, ul. Volĥonka 13, SU-119820 Moskva.

• **Togolando:** Sekve de la unua enlanda kurso por E-instruistoj, pri kiu ni raportis pasintjare (p. 202), GBEGLO Koffi kompilis memorkajeron titolitan “La kupe-soto” (akronimo de “Kajero de la Unua Pedagogia Esperanto-Seminario Organiza en Togolando”). Tiu 77-paĝa dokumento enhavas raportojn, artikolojn, poemojn kaj rakontojn, ĉiuj originale verkitaj de la seminarianoj. Fotokopiajn ekzemplerojn disponigas Hans Bakker, Kastelenstr. 231, NL-1082 EG Amsterdam, Nederlando, kontraŭ kopi- kaj sendo-kostoj.



• **Britio:** Sekve de tre altkvalita ekspozicio pri Esperanto en la Bodleja Biblioteko de la Universitato de Oksfordo, d-rino Marjorie Boulton transdonis al la bibliotekestro (*Protobibliothecarius*, laŭ la bela latina formulo) ekzemplerojn de *Plena analiza gramatiko* kaj *Esperanta antologio* (foto).

Fake

• **Dokumentoj:** Du gravaj heredaĵoj saviĝis lastatempe, dank' al lastmomenta trafa agado de la esperantistoj. Internacia Esperanto-Muzeo en Vieno sukcesis, kunlabore kun la internacia terminologia institucio Infoterm, akiri kelkcent kilogramojn da manuskriptoj el la heredaĵo de Eugen Wuster – la esperantista fondinto de la internacia terminonormigo. Kaj Esperanto-klubo de Helsinki forportis simile grandan kvanton da arkivaĵoj el la ŝirmejo de finna pioniro-eminentulo Vilho Setälä, tuj antaŭ buldoza mal-konstruo de la tuta loko. Gratulindas la konservo de tiaj unike valoraj materialoj, kies trakribro, ordigo kaj publikigo sendube daŭros jarojn.

• **Ekologio:** Brazila Esperanto-Ligo dediĉas sian ĉi-jaran kongreson en Campo Grande (MS) al la temo "Esperanto kaj ekologio: kiel marŝi duope?" Detalojn petu de BEL, CP 11-1105, BR-70084 Brasília.

• **Fervojoj:** La Ĉeĥoslovaka Fervoja Esplorinstituto okazigas ĉiun kvinan jaron internacian konferencon, kaj alprenis la kutimon ĉiufoje aldoni po unu al ĝiaj laborlingvoj. Al la ĉeĥa, la rusa kaj la germana aldoniĝis pasintjare Esperanto – kaj la livero de kvin E-prelegantoj el Nederlando, Hungario kaj Jugoslavio, plus kontentiga traduka servo, esperigas pri konstanta loko por Esperanto en tiu aranĝo.


• **Komunismo:** Kadre de la januara konferenco de ASE/SEU (februara numero, p. 22), fondiĝis sovetia Komunista Esperantista Kolektivo. Informojn pri la ampleksa laborprogramo donas Bepalov Vladimir Ivanoviĉ, ab. jaŝ. 913, SU-354000 Soĉi, Sovetunio.

• **Likenoj:** La aŭtoroj de la monumenta E-lingva konsultverko *Likenoj de okcidenta Eŭropo* projektas duan ilustritan determinlibron laŭ la sama skemo: *Nelikenigintaj fungoj likenloĝaj*. Antaŭmendojn por la 150-paĝa libro, kiu aperos en julio 1989, sendu al Société linnéenne de Provence, Mme R. Thomas, La Rosette 2, rue Berthelot, F-13014 Marseille, Francio; prezo po 40FF plus 20FF por la sendokostoj, agenda al la societo.

• **Paco:** Sekve de sia pasintjara konferenco en Udine (Italio), Unione Pacifista Universale disponigas tekstojn aŭ resumojn de prelegoj pri la temo "La decida kontribuo de la etnaj minoritatoj por la konstruo de la paco" en la lingvoj itala, slovena kaj Esperanto: Renzo Marcuzzi, CP 68, I-33100 Udine, Italio.

Pacifista movado "Tutmonde" informas ĉ. 1500 homojn en 40 landoj pri la monda pacifista movado pere de Esperanto: Apartat 313, E-08220 Terrassa, Hispanio.

• **Pentroarto:** Internacia Kultura Servo (Zagrebo) kaj Esperanto-Societo en Goricio (Italio, ĉe la jugoslava landlimo) kune aranĝis ekspozicion en la itala urbo de ok pintaj pentristoj el Zagrebo. Aperis bela reklam-afiŝo kaj luksa 40-paĝa katalogo en la itala, kroatserba kaj Esperanto. Interesitoj pri la ekspozicio skribu al IKS, Pf. 499, Zagrebo.



• **Unesko:** Ampleksan raporton pri la pasintjara seminario kun Internacia Unuiĝo de Studentoj (januaro, p. 12) prezentis ĉe Unesko TEJO-reprezentantoj Horst Gruner (dekstre) kaj Jan Koszmaluk, la 6-an de februaro 1989. Unesko mem subvenciis tiun aranĝon pri Nova Informa kaj Komunika Ordo.

Persone

• **Farani:** Pakistana aktivulo Saeed Ahmad Farani lastatempe aperigis libron pri la lingvo kaj kulturo de Panĝabo, lia nasko-regiono, en kiu li pledis por pli da subteno al instruado kaj utiligo de la panĝaba laŭ la modelo de la najbara bharata ŝtato.

• **Lins:** Laŭ invito de Pola Esperanto-Asocio, d-ro Ulrich Lins (FR Germanio) prelegvojaĝis en Pollando de la 12-a ĝis la 25-a de marto. La temo de liaj prelegoj en seso da urboj estis lia pasintjare aperinta verko *La danĝera lingvo: studo pri la persekutoj kontraŭ Esperanto*. Estis unuafoje, ke tia temo prezentiĝis en orienteŭropa lando. La Pola Radio elsendis la tuton de lia varsovia prelego.

• **Rossetti:** Okdekjariĝon festis en aprilo la veterano de la "skota skolo", Reto Rossetti, kiu tra duona jarcento konstante riĉigis la Esperantan literaturon. Lia sprita, polurita stilo sentebles kaj ĉe la originalaĵoj (*Kvaropo*, *El la maniko*, *Pinta krajono*) kaj ĉe virtuoza tradukoj

• **Radio:** Ekde la 3-a de aprilo 1989 aldoniĝis plia internacia elsendo en Esperanto: la programo "240 sekundoj en Esperanto" de Radio Vilnius, Litovio. Ĝi aŭskultebles dufoje semajne, kadre de duonhora anglalingva elsendo: lunde, 22h00-22h30 UTC, ondolongoj 31, 19, 16 metroj (9765, 9860, 15455, 15240, 17665 kHz); ĵaŭde, 21h30-22h00 UTC, ondolongoj 451, 49 metroj (666, 6100 kHz). Inter aktualizaĵoj pri Litovio troviĝos ĉiam almenaŭ unu sciigo pri la tiea E-movado. Leteroj bonvenas ĉe Radio Vilnius, SU-232674 Vilnius, Litova SSR, Sovetunio.

kiel la ŝekspira dramo *Otelo* kaj la komedia opero *La piratoj de Penzanco*. Ne nur per ekzemplo, sed ankaŭ per redaktado kaj konsilado al verkemuloj Rossetti ankoraŭ altigas la normojn de la Esperanta verkado; antaŭ 40 jaroj li lanĉis la Belartajn Konkursojn de UEA, kaj lastatempe revivigis la Licencion de Brita Esperanto-Asocio kiel internacian universitatnivelan atestilon.

• **Støp-Bowitz:** Sesdek jarojn kiel esperantisto atingis prof. C. Støp-Bowitz (Norvegio), kiu ankaŭ festis sian 75-jariĝon pasintan decembron. Aktiva ĉe niveloj loka (ano de la osla klubo de post 1930), landa (prezidanto de Norvega Esperanto-Ligo dum trideko da jaroj) kaj internacia (vicprezidanto de UEA 1974-1980, aktuala prezidanto de Internacia Scienca Asocio Esperantista), li estis ankaŭ grava kunlaboranto de *Plena ilustrita vortaro* kaj *Esperanta bildvortaro*. Sian movadologian verkon de antaŭ 40 jaroj, *La Esperanto-movado, ĝia historio, organizo kaj nuna stato*, li nun aspiras ĝisdatigi por nova, aktuala eldono.

NOVJORKA OFICEJO DE UEA 1988

PATRONOJ (minimуме \$100): Kanado: Bruce R. Crisp; Petro Collinge; Stevens T. Norvell Jr.; Janet Warren. Usono: John A. Mathews; Ruth Culbert. **SUBTENANTOJ** (minimуме \$25): Aŭstralio: Jean A. Lehan. Francio: Paul Coulot. Kanado: Brian D. Kaneen; Ethel M. Belli-Bivar; Kenneth F. Price; Marie-Raphaelle Penny; Mário R. da Fonsêca Sobrinho; Patrice Mongeau; Tom Anglin. Usono: Audrey Janisen; Ali A. Milani; Evaristo Garcia; Wendy Heller; Harry I. Weiner; Dorothy Heller; Hyman Meltz; John B. Massey; Alexander Karkovsky; Leonard Dzelzitis; William J. Mets; Maria L. Murphy; Philip Chenoweth; Pauline Ledeen; Rubén Feldman-González; Ingo E. Rucker; Stanley Drake; William Solzbacher. **AMIKOJ** (minimуме \$10): Kanado: Myra Larsen. Usono: Nan McHenry Karel; Leon Karel; Lucille C. Harmon; Mary Lou Hultberg; William R. Harmon; William L. Worrell.

SOCIETO ZAMENHOF 1989

Aŭstralio: L.V. Scott; Ralph Harry. Aŭstrio: Grete Breunlich. Belgio: Eliza Kehlet; Elfriede Ernst; Grégoire Maertens; Karel Van Steenberg; L. Drèze; Torben Kehlet. Brazilo: Elvira Fontes; Álvaro Rabêlo. Britio: Wilfrid G. Atkinson. Ĉina PR: Ian Jackson. Danlando: Ejnar Hansen. Finnlando: Aarne Ratalahti; Heta Kesälä; Irma E. Heikkilä; Juho Pyykönen; Liisi Oterma; Sirkka Mattlin; Veikko Tikkanen. FR Germanio: Harry Bily; Bruno Vogelmann; Elisabeth Hirsch; Elfriede Kruse; Ellen Eggers; Elise J.F. Woller; Martin Grundler; Helene Hiebel; Hans Schutt; Helmut Welger; Julie Winter; Helmut Klunder; Marieta Moschner; Jean Prager; Richard Hirsch; Peter Weide; Margarete von Waldowski. Francio: Alexandre Maczkowski; André C.J. Gaillard; Claude Longue-Épée; Gaston Waringhien; André Gilles; Gerard Peet; Pierre Guérout; Hélène Gauducheau; Jean-Paul Beau; Odette Bernet; Roger Despiney; Julien Ducrocq; Raymonde Perault; Thierry Lambert. Italio: Medardo Biagi; Michele Mariano; Vittoria Spina. Japanio: Wilhelm Schmid; Kōiti Simizu; s-ro Satoo; Takeo Sugano; d-ro Tosihide Kuwahara;

Toyozo Nisikawa; Yosimi Umeda. Jugoslavio: Jozica Zidanik. Kanado: W.D.B. Hackett. Korea Resp.: Moo-hyup Han; Yung-myung Kim; d-ro Chang Choongsik. Luksemburgio: Brian R. Moon; Claude Nourmont. Meksikio: Julie L. Regal. Nederlando: G. Abbas-De Hoop; Menno Abbas; Dini Kappert; Evert J. Woessink; G.T. Knol; H. Smits; Joaquim Calado; Louise Adelaar; H.C. Luijke; M. Meijwes; P.H. Damsté; Robert Moerbeek; Sija van Wijngaarden; Akiko Ŭusink-Nagata; Simon P. Smits; W.A. Verloren van Themaat; Gerda H.M. Wulfers-Meddens. Norvegio: Agnete Anjer; Olav Reiers l. Nov-Zelando: D.J. Langman; Jeannie Wilson. Svedio: Amy Nilsson; Bertil Bengtsson; Gunnar Börjesson; Sten Axel Broman; Edla Nilsson; Gustav Nygård; Harald Andersson; Henrik Karlsson; Inga-Maj Lindkvist; Jim Hornö; Karl G. Lennart Lagerkrantz; Leif Holmlund; Olle Olsson; Gunhild Tistad; Tore Johansson; Vasilka Börjesson; William Malmsten. Usono: Alfred Unterberg; Frederik J. Belinfante; Bruce Arne Sherwood; Cecelia Peterson; Charles W. Tustin; David Wolff; Doris Vallon-Wheeler; Gigi Harabagiu; Thomas A. Goldman; Thomas H. Goodman; Humphrey Tonkin; Ken Thomson; Lucille C. Harmon; L.A. Walther; Margaret L. Barkley; Marion E. Bigelow; Milton O. Brown; Pauline Ledeen; Robert A. Swenson; Ruth Culbert; William Solzbacher; Sidney S. Culbert; William R. Harmon; William H. Schulze; Julius Balbin.

NOVJORKA OFICEJO DE UEA 1989

PATRONOJ (minimуме \$100): Finnlando: Liisi Oterma. FR Germanio: Heinrich Nischwitz. Japanio: Nobuo Sakurai. Usono: Alfred Unterberg; Alberta Seabold Casey; Dorothy Holland-Kaupp; Thomas H. Goodman; Hiram Elwin Reed; Lura R. Chapman; Minerva R. Massen; Mary Murray; Neal D. McBurnett; Robert A. Swenson; William H. Schulze. **SUBTENANTOJ** (minimуме \$25): Belgio: Stella De Weerd. Brazilo: Cleber de Moraes Lemos. Finnlando: Hemmo Tietti; Juho Pyykönen; Onni Ilmari Kauppinen; Lauri Mustonen; Maire Paarmo; Veera Tietti. FR Ger-

manio: Hans Georg Strauss. Meksikio: Eugène Mustea. Svedio: Henrik Karlsson. Usono: Beatrice G. Acers; David C. Halley; Douglas E. Rogers; Eleanor B. Stein; Edward E. Reynolds; Franklin Montenegro Rodas; Adrian Hughes; Joan Gildemeister; Stuart E. Kittredge; Sonoko Kuzume; Miguel-Angel Altuna Aspiazu; Marion E. Bigelow; Milton O. Brown; S. Clark Pyfer; Alice Harris; Scott S. Smith; William A. Shanks. **AMIKOJ** (minimуме \$10): Aŭstralio: d-ino M.E. Furness; T. Elliott. Belgio: L. Drèze. Finnlando: Martti Pennanen; Pentti Järvinen. FR Germanio: Esperanto-Grupo Nurnberg; Richard Wluka. Israelo: Andreo Šalamon; Cvi Löwenkopf; Julius Hecht. Meksikio: Julie L. Regal. Nederlando: Robert Moerbeek. Norvegio: Douglas Draper; Sigmund Kveim. Svedio: Amy Nilsson. Usono: Annette Greenland; David Wolff; Enrique Ellemberg; Horace Bryce Hand; Janice M. Atkinson; Maya Kennedy; Lois G. Roberts; Pierre C. Jelenc; Prenda E. Cook; Ronald J. Glossop; Steven G. Church; Stephen J. Gerrie; Victor Munson.

PATRONOJ DE TEJO 1989

Belgio: Elvire De Coene; Stella De Weerd. Britio: J.M. Ibbotson; Charles Alan Shives; Patricia C. Sinclair. Ĉina PR: Ian Jackson. FR Germanio: Franz Knöferl; Maria Vitalyos; Thomas Bormann. Hispanio: Sílvia Simó Pujol. Israelo: Jehoŝua Tilleman; Josef Murĵan. Italio: Michela Lipari Sato; Sergio Martina; Vittoria Spina. Japanio: Joel Brozovsky; Hirotoĝu Hukumoto; Humiya Morita; Ikuko Yazima-Kitagawa; Bun'iti Isizaki; Zyun'iti Sibayama; Utako Kobayasi; Hiroo Kodama; Yosikatu Nagase. Kanarioj: Aurelio Solis y Pi; María Pi Maynar. Korea Resp.: d-ro So Gilsu. Nederlando: Dini Kappert; F.J. Pieter-son-Kruger; H. ten Hagen; W.F. Huppertz; Jenny Heetkamp-Senstius; J.S. Douma; J. Soeteman; Louise Adelaar; R. Vetter; Willem Spoelder; W.A. Massar-van Diepen; W.L. van Leeuwen. Nov-Zelando: D.J. Langman; Frank E. Swift. Usono: Miguel-Angel Altuna Aspiazu; Neal D. McBurnett.

Al ĉiuj tre koran dankon! UEA

Eldonejo Artur E. Iltis havas novan adreson: Postfach 1530, D-6670 St. Ingbert, FR Germanio. Petu prospektojn kaj prov-numeron de *Forumo*.

Kvindeko da bharataj esperantistoj, 11- ĝis 60-jaraj, serĉas korespondantojn tutmonde. Bangalora E-Centro, S.S. Pradhan, 97, 24th Cross III block east, Jayanagar, Bangalore 560011, Hinda Unio.

Informojn pri geedziĝaj kutimoj el diversaj landoj serĉas Internacia Servo Adresara, Eva kaj Rikardo Starcynski, str. Broniewskiego 3a/24, PL-59-840 Zawidów, Pollando.

Dudek gestudentoj 9- ĝis 12-jaraj ĉe la lernejo H.D. Cooke en Washington, D.C., volas korespondi kun geamikoj en aliaj landoj. Klaso de s-ino Satterwaithe, c/o Martha Flores, 8802 Alton Parkway, Silver Spring, MD 20910, Usono.

22-jara studento volas korespondi pri rokmuziko, japana arto, gitarludado kaj fotoarto. Andrej Birjukov, ul. Inĝenernaja, d. 75, kv. 53, SU-620010 Sverdlovsk, Sovetunio.

Monhelpon por la dezajno kaj konstruo de facile lernebla sakŝalmo "Esperanto" serĉas Phil Edwards, 3 Groeswen Cottages, Groeswen, Taffs Well, Mid Glamorgan CF4 7UR, Britio.

Tarifo: Ĉiu vorto de la anoncetoj kostas unu guldenon (unu internacian respond-kuponon). Pri ilia enhavo ne respondecas la redakcio. Ni donas nenian rabaton por la ripeto de anoncetoj. Por la tarifo de anoncoj, bonvolu vidi la kolofonon.

Anoncetoj

Kie troviĝas ĉevalsportistoj? Kiu pretus kunlabori pri tiurilata vortaro? Horst Spirat, Via Unità d'Italia 31, I-37039 Tregnago (VR), Italio.

Filologoj bv. kotizi por 1989 al Internacia Unuiĝo de Esperantistaj Filologoj (7,70 gld. UEA-konto iuef-y). La organo *Filologo* aperas senpage por membroj.

Ekspoziciaĵojn: afiŝojn, fotojn, desegnaĵojn, insignojn, gluetikadojn, poŝtkartojn, revuojn, librojn kaj ĉiujn ceterajn propagandilojn por mediprotektado kaj sana vivmaniero petas International Friendship Club "Esperanto", Pk. 76, SU-703000 Samarkand, Uzbekistan, Sovetunio.

Fotojn pri lerneja vivo aŭ tiutemajn gazet-eltondaĵojn el la tuta mondo ni bezonas por ekspozicio en nia lernejo en septembro. Ni rekompencas per fotoj pri la vivo de japanaj lernantoj.

Esperanto-klubo de la liceo Sumiyosi-Kôkô, Kizukisumiyosi 1957-4, Nakahara-ku, Kawasaki-si, 211 Japanio.

Kvardekjara familio nederlanda deziras korespondi kun familioj aŭ junaj knaboj tutmonde. Johano kaj Helena, Vossekuil 197, NL-6416 XL Heerlen, Nederlando.

Lernantoj 12- ĝis 16-jaraj studas Esperanton. Bonvolu kuraĝigi per sendo de bildkarto filatele afrankita. Mansel, Bp 1963, Noumea, Nov-Kaledonio. Reciprokos.

Klubkontaktojn tutmonde serĉas Klubo de Pola E-Asocio en Andrychów, ankaŭ sendaĵojn por letervespero en septembro 1989. Pawe Novak, Pk. 30, PL-34-120 Andrychów, Pollando.

La adreso de Bangia E-Klubo estis erare anoncita en la februara numero. Temas pri Luc Feidangai, Pf. 960, Bangui, Centrafrika Respubliko.

Korespond-adresojn de esperantistoj en Hungario peras Internacia Leteramika Servo "Direkta", Pf. 39, H-3601 Ozd I, Hungario.

Lernejaj E-grupoj 16- ĝis 18-jaraj serĉas grupkontaktojn alilande. Javad Banisaid, No. 30, str. Arfai - str. Mina - str. Mahalati, ave. 17 Shahrivar, Tehran, Irano.

Konkurso por verkado de originalaj romanoj

La Eldonejo de Hungara Esperanto-Asocio anoncas konkurson por verkado de originala Esperanta romano. La konkurson rajtas partopreni ĉiu esperantisto el ajna lando, per romano ankoraŭ ne publikigita. Limdato por la alsendo de konkursaĵoj estas la 31-a de decembro 1990. Adreso: Eldonejo de HEA, Pf. 193, H-1368 Budapest, Hungario.

Premioj: La unua, "Premio Hungario", konsistos el minimume 100 000 hungaraj forintoj (ĉi-momente ĉ. 4 000 nederlandaj guldenoj) plus ties dujara interezo. La dua, "Premio Budapeŝto", konsistos el minimume 50 000 hungaraj forintoj plus ties dujara interezo. La premioj estos pageblaj principe nur en hungaraj forintoj, kiuj estas utiligeblaj nur en Hungario.

Teknikaj detaloj: Ĉiu konkursaĵo devas havi minimuman amplekson de 340 000 literospacoj (ĉ. 55-60 000 vortoj); la maksimuma longeco ne estas fiksita. La temo estas libera, sed ĝi ne povas esti kontraŭa al la bazaj humanismaj principoj. Unu persono rajtas konkursi per pluraj verkoj. Principe oni ne ekskludas la eblon, ke ambaŭ premiojn gajnu la sama persono per du verkoj.

La verkoj devas sekvi esence la norman lingvouzon de Esperanto. La vortprovizo laŭeble restu en la kadroj de

PIV kaj ĝia suplemento, krom en kazoj kiam semantikaj kialoj aŭ artaj celoj necesigas aplikadon de neologismoj aŭ de nenormaj lingvaj formoj. Vortoj netroveblaj en PIV kaj ĝia suplemento devas esti glositaj.

La konkursaĵoj devas esti tajpitaj kun duobla interlinia spaco, kun en ĉiu linio ĉ. 60 literospacoj, kaj alsenditaj en tri bone legeblaj kopioj. La supersignoj devas aperi en sia ĝusta formo, eventuale mane aldonitaj sur ĉiuj tri kopioj. La konkursaĵoj surhavu nur kaŝnomon: la veran nomon kaj adreson oni aldonu en aparta fermita koverto, sur kiu oni skribu la kaŝnomon.

La proklamo de la premioj okazos dum la 76-a Universala Kongreso, somere de 1991. La gajnintoj laŭeble pli frue ricevos skriban informon.

Eldono: La kopirajto de la premiitaj verkoj – por esperantlingvaj kaj hungarlingvaj eldonoj – aŭtomate kaj sen aparta pago iros al la Eldonejo de HEA por ses jaroj. La Eldonejo de HEA havos opcion ankaŭ por la aperigo de la nepremiitaj konkursaĵoj dum du jaroj, kontraŭ honorario de 30 000 forintoj. Decidon pri uzo de tiu opcio ĝi devos fari maksimume tri monatojn post la proklamo de la premioj; se la decido estos nea, la aŭtoro ricevos ĉiun rajton pri sia verko.

RADIO POLONIA

Gravaj ŝanĝoj ekde la 8-a de majo 1989

(Universala Tempo – matene nur unu duonhora disaŭdigo)

1. 5:00-5:30 (31.50; 41.27; 50.04; 200) m
(9525, 7270, 5995, 1503) kHz
2. 11:00-11:25 (25.34; 31.50; 50.04; 200) m
(11840, 9525, 7145, 5995, 1503) kHz
3. 15:30-15:55 (25.39; 49.22) m
(11815, 6095) kHz
4. 17:30-18:00 (31.45; 41.18; 48.90) m
(9540, 7285, 6135) kHz
5. 20:30-21:00 (41.99; 31.50; 42.11) m
(9525, 7145, 7125) kHz
6. 21:30-21:55 (41.18; 41.27; 42.11; 48.90; 49.22;
50.04; 200) m
(7285, 7270, 7125, 6135, 6095,
5995, 1503) kHz

Oni povas peti senpagan novan programon ĉe:

Radio Polonia

Box 46

PL-00-950 Varsovio

Bonvolu represi ĉi tiun informon kiel eble plej vaste.

En verda, kvieta pejzaĝo agrablaj, riĉenhavaj somer-ferioj

- 16/6–30/6: **Internacia Amika Renkonto**
E-kursoj trinivelaj, Marin Bacev gvidos la unua-gradan.
- 2/7–17/7: **E-Kursoj**
Gvidos: J. Turbillon, M. T. Lloancy, D. Moirand.
Prezentoj grandparte dediĉitaj al Ducentjara Datreveno de la Franca Revolucio kaj ties influoj diverslokaj. Prelegos: S-ro Roose (ĝenerala prezento de la Franca Revolucio; la Franca Revolucio en Belgujo); S-ino Cheverry (Baugé-regiono fronte al la Franca Revolucio; vivo en Anĵu iom post la revolucio); S-ro Frangeul (projektoj de internaciaj lingvoj en la tempo de Enciklopedio kaj de la Franca Revolucio); S-ro G. Lagrange (naciismo kaj revolucio); S-ro Rollinger (reĝaj kasteloj en valo de Loire); S-ro Metivier (ĝeneralaĵoj pri la revolucio).
- 18/7–31/7: **Kursoj trinivelaj**
1-a grada: Przemek Grzebowski
2-a grada: Dennis Keefe
- 1/8–14/8: **Kursoj trinivelaj**
1-a grada: Przemek Grzebowski
- 7/8–13/8: **Semajno dediĉata al Centjara datreveno de E. Privat**
Prelegoj de S-ro Chmielik kaj de S-ro Metivier.
- 14/8–28/8: **Kursoj trinivelaj**
1-a grada: Przemek Grzebowski.

Plue, ĉiuj staĝoj proponos ekskursojn, art-laborojn, distrajn vesperojn.


Kultura Esperanto-Domo

Kastelo "Grésillon"

F-49150 BAUGÉ, Francujo

telefono: 41 89 10 34

40 76 77 95 (antaŭ la 15/6)



*unika libro pri unika okazo;
komuna kreaĵo de centjara movado;
distra kaj pensiga, sobra kaj inspira:*

jubileo

Dudeko da famaj aŭtoroj kaj sesdeko da landoj
en raportoj, eseoj, poemoj kaj bildoj

Mendu de la Libroservo de UEA: 57,00 gld. Triona rabato ekde tri ekzempleroj.

PARIZA FRENEZA SEMAJNO

NULIGITA

Pro la nesufiĉe granda nombro da aliĝintoj je 04.15, ni devas rezigni. La parizaj hoteloj, kiuj akceptos milojn da vizitantoj ĉi-julie okaze de la revolucia datreveno, ne permesis plilonge sengarantian rezervon. U.F.E.


SENNACIULO

Ĉu vi konas ĝin?
Monata organo de SAT

– *Laborista esperantismo* – *Kontraŭ rasismo*
– *Kontraŭ faŝismo* – *Por la homaj rajtoj* –
Eŝo de sociaj luktoj – *Donas la parolon al*
ĉiuj laboristaj tendencoj...

Proveksemplero kun abontarifo havebla kontraŭ
internacia respondkupono ĉe:

SAT, 67 Av. Gambetta, F-75020 Paris



Ĉiu parolado de Ivo Lapenna estas verko de fekunda menso,
prezentita kun la krea spontano de vera oratoro.

En **Retoriko** prof. Lapenna donis la metodon, regulojn kaj konsilojn;
per **Elektitaj paroladoj kaj prelegoj**, li provizis la modelon.

Trovu ĝuon kaj profiton en ĉi tiuj klasikaj verkoj:
Retoriko 51,00 gld.; *Elektitaj paroladoj kaj prelegoj* 33,00 gld.
Triona rabato ekde tri ekzempleroj.

